HUNGARA VIVO

6
1985
16,- Ft

Pri programoj por via libera tempo, pri enlandajripozebloj, pri kulturaj eventoj informas Vin

Turisma Informservo TOURINFORM per la telefonnumero 179-800, aŭ persone en la Oficejo TOURINFORM (Budapest, V., Petőfi Sándor u. 17/19./

TOURINFORM:

INFORMOJ PRI MULTAJ LOKOJ EN UNU LOKO

- Reguloj pri dogano, devizoj, pasporto, vizoj; limtrapasejoj
- Adreso kaj telefonnumeroj de vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, hotelaj kaj restoraciaj entreprenoj
- Restoracioj, trinkejoj, amuzejoj
- Muzeoj, artmemoraĵoj, naturprotektaj teritorioj
- Kuracbanejoj, plaĝoj
- Vojaĝoj per fervojo, sur ŝoseo, en aero
- Speciala meteorologia servo
- Poŝtaj servoj

		Per telefono	Persone
En la lingvoj hungara,	labortage	7-21 h	8-20 h
germana, angla,	sabate	7-20 h	8-20 h
rusa kaj franca	dimanĉe	8-13 h	8-13 h

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség. Felelős kiadó: Vaskó Tibor. Készült a Magyar Eszperantó Szövetség Házi Sokszorosítójában. Felelős vezető: Szabó Imre. Budapest, 1985. július. Törzsszám: hearota 85-021[illegible]. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben ös a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V. József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft , fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft. Megjelenik kéthavonta.



János Kádár salutis Hungaran Vivon

La personeco de János Kádár stampas trijardekan periodon en la moderna historio de la hungara popolo. La multflanka evoluo, kiun nia lando trapasis dum la lastaj tridek jaroj, estas sekvo de la politiko enkondukita kaj firme sekvata de li, el kiu politiko rezultis nacia konsento kaj socia stabileco en Hungario. Tiu politiko akiris signifan internacian prestiĝon por nia lando.

Estis por ni granda honoro, kiam en la jaro 1961, ĉe nia starto, nia redakcio ricevis salutleteron de li. Tiu atento donis al ni kuraĝigon kaj inspiron por nia agado. Nun, ĉe la lasta numero de nia 25a jarkolekto, ni povas ĝui plian signon de la alta atento al nia laboro, kaj ni plezure peras liajn salutvortojn ankaŭ al nia internacia legantaro.

☆☆☆

EŬROPA KULTURA FORUMO

En oktobro kaj novembro dum ses semajnoj kunsidis en la hungara ĉefurbo la Eŭropa Kultura Forumo, kun la reprezentantoj de 33 Eŭropaj kaj du Nord-Amerikaj landoj, subskribintaj la Finan Akton de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. Tiu ĉi kunveno okazis enkadre de la „procezo de Helsinki", sed ĝia specifa trajto estis, ke ĝin partoprenis ne nur politikistoj, sed ankaŭ artistoj, verkistoj ktp. – t.e. la rektaj kreantoj de la kulturo.

En la unua semajno okazis plenkunsidoj, kie la gvidantoj de la landaj delegitaroj eksplikis la starpunkton de sia lando pri la ĉefaj demandoj de la kulturo, kaj formulis sian koncepton pri la laboro de la Forumo. Post tio la laboro daŭris en kvar sekcioj. La *unua* sekcio okupiĝis pri la problemoj de pentroarto, skulptarto, artindustrio, arkitekturo kaj protektado de artmonumentoj; en la *dua* pri teatra arto, filmo, kaj pri la kulturaj programoj de radio kaj televido; en la *tria* oni debatis demandojn pri la literaturo, libroeldonado kaj literatura tradukado; en la *kvara* la partoprenantoj pritraktis la eblojn de reciproka konigado de la naciaj kulturoj, kaj temojn konekse kun la kultura heredaĵo.

La Eŭropa Kultura Forumo bele pruvis, kiel multfaceta kaj varia estas tio, kion ofte iom simplige oni nomas „Eŭropa kulturo". Tamen, tiu riĉa diverseco ne kontestas, ke ekzistas ankaŭ funda parenceco kaj kunaparteneco inter la kulturoj de la Eŭropaj landoj. En la Forumo plian fojon demonstriĝis, ke kaj la naciaj kulturoj aparte, kaj la Eŭropa kulturo kiel unu tuto, estas ĝisfunde humanisma kulturo, kies centra temo estas la homo.

La atmosferon de la intertraktoj dum la Forumo karakterizis esence konstruema sinteno kaj strebado pli bone kompreni

La partoprenantoj de la Forumo

la opiniojn kaj ideojn de la partneroj. Estis prezentitaj al la komisionoj aro da bonaj proponoj, sugestoj, kies utiligo kaj realigo povos amplekse kontribui al la kultura kunlaboro inter la Eŭropaj nacioj. Vaste oni pritraktis – plejparte en la kvara komisiono – ankaŭ la problemojn de la popularigo de la literaturoj de malmulte disvastiĝintaj lingvoj. Pri tiu punkto Hungario, kune kun aliaj malgrandaj landoj, estas speciale interesita, ja la hungara literaturo estas malmulte konata en Eŭropo ĝuste pro la lingva bariero.

Por Hungario estis granda honoro gastigi tiun ĉi unikan kunvenon de la Eŭropa kulturhistorio. Hungaroj vidas en tiu ĉi fakto ne nur plian manifestiĝon de la internacia prestiĝo de Hungario, sed ankaŭ specialan rekonon de la atingoj de la hungara kulturo; tion, ke malgraŭ ĝia malmulta disvastiĝinteco la Eŭropaj nacioj alte taksas ĝiajn plenumojn kaj volas ekkoni ilin. Fakte, la Forumo signifis unikan ŝancon por la hungara kulturo, ĉar dum ses semajnoj restadis en Budapeŝto aro da elstaraj kulturaj personecoj de Eŭropo. Dum tiu ĉi sufiĉe longa periodo ili povis ricevi bazan imagon pri la riĉeco, varieco de la hungara kultura vivo, kaj ankaŭ la hungara publiko povis pli proksime ekkoni – pere de gazetaj, radiaj kaj televidaj intervjuoj – famajn verkistojn kaj artistojn.

Kompreneble, en la debatoj aperis ankaŭ la diferencoj, fontantaj el la ideologia kaj nacia diverseco de la partoprenantoj. Oni havis malsamajn opiniojn kaj starpunktojn pri la engaĝiteco de la artoj, pri la rolo de la ŝtato en la kulturo, pri la artista libereco. Tiuj malkonsentoj kaŭzis, ke la Forumo ne povis akcepti iun ferman dokumenton, rezolucion, kaj

Parolas la gvidanto de la soveta delegitaro

tio estas fakto bedaŭrinda. Aliflanke, ĉi tio pruvas, ke la atmosfero de la Forumo estis sincera kaj malferma, el ĝi mankis ajna formaleco.

La prezidanto de la ferma plenkunsido, la hungara ministro pri klerigo Béla *Köpeczi* jene resumis la taskojn, kiujn havas ĉiuj partoprenintaj landoj post la Forumo: „Mi estas konvinkita, ke la Kultura Forumo kaj en Okcidento, kaj en Oriento estis unu el la grandaj esperoj de la Eŭropa intelektularo, kaj oni ne rajtas vanigi tiun esperon. Tial mi volus alvoki la ĉeestantajn reprezentantojn de la registaroj, ke ili ne permesu trotaksi la malkonsentojn kaj subtaksi la rolon de la kunlaborado. Ili helpu en tio, ke fortiĝu la spirito de la kunlaboro, dezirata de la plimulto, antaŭ ĉio de la kulturaj personecoj, kaj ni kunportu en ni tiujn pensojn, kiuj servas nian komunan sorton, Eŭropon kaj la pacon. La Kultura Forumo estis la *komenco* de io nova en la Eŭropa kultura kunlaborado; ni esperas, ke ankaŭ aliaj pensas same. La Forumo estas parto de procezo, kaj ni esperas, ke ĝi ne bremsos, sed male, antaŭenigos tiun procezon."

Turisma Simpozio

Esperanto-Sekcio de Vojaĝoficejo Express informas, ke en la kadro de „Budapeŝta Printempo '86" estos okazigota la 2-a Internacia Esperanto Turisma Simpozio en Budapeŝto.

Dato de la aranĝo 1986-03-13-18.

Temo de la simpozio: „Esperanto en la internacia profesionisma turismo".

Organizantoj: Hungara Turisma Oficejo, Vojaĝoficejo Express kaj la Budapeŝta Komitato de Hungara Esperanto-Asocio.

La simpozion aŭspicias Universala Esperanto-Asocio kaj Monda Turismo.

Detalajn informojn bonvolu peti de la **Esperanto-Sekcio de Vojaĝoficejo Express, Budapest V. Szabadság tér 16.**

BÉLA KÖPECZI

LA HUNGARA KULTURO EN EKSTERLANDO

Béla Köpeczi naskiĝis en 1921 en Nagyenyed (nun Aiud en Rumanio). Akademiano, ministro pri klerigo. Li aperigis multajn studojn kaj librojn pri la rumana kaj franca literaturoj, kaj pri la historio de la hungaraj-francaj interrilatoj, precipe dum la liberbatalo de Ferenc Rákóczi la Dua (1703-1711). Li estas aŭtoro ankaŭ de pluraj kulturhistoriaj kaj kulturpolitikaj libroj.

1

Oni ĉiam sentas angoron, parolante pri la pozicioj de la hungara kulturo en eksterlando. La fonto de la angoro estas ankaŭ tio, ke jam tradicie ni sentas nian solecon, izolitecon, mi povus eĉ diri, forfermitecon disde la grandaj kulturoj, disde la kulturo de la ekstera mondo.

Multaj jam formulis la demandon, kaj multaj respondis ĝin tre pesimisme: ĉu entute ekzistas ebleco por tio, ke la hungara kulturo atingu la eksteran mondon. Mi trovas, ke la pasintaj jardekoj – kaj nun mi aludas ne nur la kvardek jarojn depost la liberiĝo, sed ankaŭ la pli fruajn jardekojn – klare pruvis, ke tiu ebleco ekzistas. Nenia fatalo malpermesas, ke la hungara kulturo eniru en la sangocirkuladon de la monda kulturo. Unue aperis tia pozitiva precedenco en la muziko. Nun jam maleblus kontesti, ke en monda muzikhistoria verko la hungara muziko nepre devas havi sian ĉapitron, kaj neniu povus aserti, ke la universala muzikhistorio povus malhavi la kontribuon de la hungara muziko. Okazis ŝanĝo ankaŭ en alia arto, same uzanta internacian esprimmanieron – en la filmarto. Kompreneble, oni ne povas aserti, ke la hungaraj filmoj okupas tian pozicion en la monda filmarto, kiel la verkoj de Bartók aŭ Kodály en la muziko de la mondo, tamen, ili ĉeestas en la internacia filma mondo, vekas interesiĝon, speciale en intelektulaj rondoj. Pliboniĝis ankaŭ la pozicioj de la hnngara scienco en la mondo. Kaj ĉi tie mi aludas ne nur la natursciencojn, kiuj jam pli frue havis abundajn internaciajn kontaktojn, sed ankaŭ la sociajn sciencojn, la ekonomikon aŭ la historiografion, kies reprezentantoj kaj iliaj verkoj elvokas grandan atenton eksterlande, kaj rajte ni povas aserti, ke tiuj verkoj bone ligiĝas al la internaciaj tendencoj de la ekonomiko kaj historiografio.

Ni devas rimarki ankaŭ ŝanĝon pli ĝeneralan: grave kreskis la interesiĝo pri Hungario, kaj ne nur pri ĝia kulturo. Ĉio tio, kio okazis en nia lando post 1945, kaj speciale post 1956, en la sesdekaj-sepdekaj jaroj, elvokas interesiĝon en ekonomiaj-politikaj medioj. Tiu interesiĝo havas ankaŭ manifestiĝojn ekstreme simpligitajn: unu el tiuj estas la troigite optimisma konceptado pri la situacio de Hungario, kiu konceptado kompreneble ne estas reala: ofte ĝin elvokas la intenco kontraŭstarigi nian landon al aliaj socialismaj landoj. Malgraŭ tiuj naivaj, kelkfoje manipulitaj konceptoj – aŭ senkonsidere al ili – indas rimarki la faktan interesiĝon, kaj profiti el ĝi por nia kultura ĉeesto eksterlande.

En la afero de la eksterlanda ĉeesto de la hungara kulturo mi sentas ankaŭ personan engaĝitecon, ĉar ekde mia studenta aĝo min okupis la demando, kial en la mondo la imago pri Hungario estas tia, kia ĝi estas. La stimulon por tiu interesiĝo donis miaj Transilvaniaj spertoj, kaj ankaŭ la vasta diskuto, kiu disvolviĝis en la kvardekaj jaroj pri la temo „Nia famo en la mondo". Tiu persona engaĝiteco min instigis okupiĝi pri la hungaraj-francaj interrilatoj, kaj ankaŭ praktike partopreni en la agado enlanda kaj eksterlanda por la vastigo de la internacia kultura kaj scienca kunlaborado.

2

Konsiderante tiujn ŝanĝojn, kion ni povas fari nuntempe por la firmigo de la hungara kultura ĉeesto en eksterlando?

La plej grava tereno estas la progresigo de la hungarologia instruado kaj scienca laborado, kaj tiucela serĉado de novaj formoj de internacia kunlaboro.

Nuntempe en 78 universitatoj de 23 landoj laboras hungaraj lektoroj, kiuj okupiĝas plejparte pri lingvoinstruado, sed parte ankaŭ pri instruado de literaturo. El tiuj en 34 universitatoj agadas lektoroj, senditaj de ni.

Hungarologion ni povas koncepti kiel komplekson de plej diversaj studoj: al ĝi apartenas ne nur lingvo, literaturo kaj eble historio, sed ankaŭ ekonomiko, sociologio, etnografio ktp. Esence ni revenis al la malnova koncepto por hungarologio, por vidi, ĉu tiel eble ni povus interesigi en eksterlando pli vastan rondon de la intelektuloj kaj de la kulturaj institucioj koncerne la konojn pri Hungario kaj la ampleksigon de la ĉeesto de la hungara kulturo. Institucie tio signifas, ke en la universitata sistemo de la koncerna lando ni kreu lokon por hungarologiaj studoj. Tiel startis la starigo de la diversaj hungarologiaj centroj. Rezulte de tio naskiĝis en la usona urbo Bloomington, en la Indiana Universitato la unua tia bazo, kaj la dua en la kanada urbo Toronto – parte per la kontribuoj de la tieaj hungaraj elmigrintoj – kvankam ĝi ne havas tiel vastan agadon, kiel la hungarologia centro de Bloomington. Somere de la kuranta jaro oni anoncis en Romo la kreon de hungarologia centro, en decembro ekfunkcios ankaŭ en Pariza universitato hungarologia instrua kaj esplorcentro. En Vieno stariĝos samspeca centro dank' al la komuna strebado de la Finnougra Instituto kaj de la Instituto pri Orient-Eŭropa Historio. Ni havas similajn planojn ankaŭ por Varsovio kaj Berlino.

Kompreneble, en tiuj centroj ne eblos instrui ĉion kaj okupiĝi pri ĉiudirektaj sciencaj laboroj. La hungarologiaj centroj povos mem instrui la hungaran lingvon, literaturon kaj kulturhistorion, kaj krome ili povos kunordigi kaj helpi la agadon de tiuj, kiuj okupiĝas pri hungaraj temoj, en kiu ajn universitato ili laboras. Tiamaniere la personoj, okupiĝantaj pri hungaraj temoj, povas ligiĝi al funkcianta institucia reto, certigi la edukadon de novaj hungarologoj, kaj kreiĝas ebloj ankaŭ por komuna scienca laboro. Ĉi tie en Hungario ni devas krei la bazon por subteni la funkciadon de tiuj centroj. Ni estas konvinkitaj, ke niaj fortoj sufiĉos por tio, se hejme ni bone organizos la laboron.

La ĉeeston de la hungara kulturo nuntempe povas firmigi hungaraj institutoj en dek eksterlandaj lokoj, do, en pli da lokoj, ol en la tridekaj jaroj. Ni trovas unu el la pozitivaĵoj de la kultura politiko de Kunó Klebelsberg[1], ke li klopodis ligi la hungaran sciencan kaj kulturan vivon al la tendencoj de la ekstera mondo. Kompreneble li malfermis la pordojn antaŭ ĉio al okcidento, ja tio respondis al la tiama politika orientiĝo. Granda plimulto de la hungara intelektularo tiam estis konvinkita, ke Trianon[2] ŝuldiĝas ne malmulte al tiu imago pri hungaroj, kiu tiutempe vivis en Britio, Usono aŭ Francio, kaj tial ĝi aklame salutis la fondon de hungaraj institutoj, sed ties nombro estis malgranda: ili funkciis en Romo, Berlino, Parizo kaj Vieno. Se mi komparas la reton, kiun kreis Klebelsberg, kun tiu, kiun disponas ni, mi devas diri, ke kvante niaj ebloj multobliĝis. Sed tio ne nepre signifas, ke ni povas respondi ankaŭ al la kvalitaj postuloj, kaj ke nia ĉeesto estas tiel frape efika, kiel ni ŝatus tion. La institutoj faras laboron sufiĉe vastarn, tamen tic ligiĝas ĉefe nur al la perado de artaj produktoj. Foje-foje oni havas la senton, ke ili plenumas la laboron de simpla kulturdomo, kaj ne sufiĉe ili vartas la kontaktojn kun tiuj grupoj de intelektuloj, kiuj havas influon al la publika opinio kaj al la funkciado de la kultura instituciaro de la koncerna lando, nek kun la amaskomunikiloj, kiuj plej efike povus disvastigi la produktojn de la hungara kulturo. Dum la lastaj unu-du jaroj ni klopodis ŝanĝi tiun situacion, kaj la institutoj komencas partopreni en la hungarologia laboro, subtenas la laboron de tiuj centroj, plenumante samtempe ankaŭ siajn specifajn taskojn.

Baza kondiĉo de la plibonigo de la laboro estas tio, ke ĉi tie hejme ni organizu la konvenan informadon kaj dokumentadon, kaj gravas ankaŭ, ke ni havu konvenajn kulturajn diplomatojn, kiuj konas kaj la hungaran kulturan vivon, kaj la kulturan vivon de la koncernaj landoj, tiamaniere povantaj fari tie organizan laboron. Ili estas tiuj, kiuj povas teni senperan kontakton kun la amaskomunikiloj, kun la eldonejoj kaj aliaj kulturaj institucioj de la koncernaj landoj.

Bedaŭrinde, ni havas malmultajn tiajn intelektulojn, kiuj bone regas fremdajn lingvojn kaj kapablas plenumi la supre nomitajn taskojn – tiu manko treege malfaciligas la evoluigon de la kontaktoj. Nuntempe jam ne maleblas bone ellerni fremdan lingvon. Ekde la ĝeneralaj lernejoj ĝis la universitatoj ekzistas ebleco lerni fremdan lingvon, sed lingvolernado kompreneble ne ekzistas sen fortostreĉoj. Lige kun tio mi emfazu, ke ni klopodas krei la eblojn por lingvolernado kaj enlande, kaj eksterlande. La evoluigo de la enlanda lingvoinstruado estas en nia aktuala tagordo, kaj koncerne la eksterlandajn eblojn staru ĉi tie kelkaj ciferoj. Mezlernejanoj povas partopreni somerajn lingvotendarojn en Sovetio kaj GDR (ĉiujare 300 lernantoj vojaĝas en Sovetion, kaj 450 partoprenas rusajn lingvotendarojn enlande); el la universitataj studentoj pri rusa filologio 550 personoj pasigas ĉiujare unu semestron en sovetaj universitatoj, kaj 160 studentoj pri germana filologio povas veturi por unu semestro al GDR. En la aliaj socialismaj landoj ni disponas entute 50 lokojn dum unu semestro por studentoj-filologoj de la koncerna lingvo. Krome ĉ. mil studentoj povas veturi ĉiujare por kvar- aŭ ses-semajnaj lingvokursoj en Sovetion. En la okcidentaj landoj ni havas lokojn unuavice en la kadro de interŝtataj kontraktoj, sed krom tiuj per hungara ŝtata stipendio, sub la egido de UN, je personaj invitoj aŭ dank' al diversaj fondaĵoj dum la jaro 1984 pli ol kvarcent hungaroj veturis al tiuj landoj kun la celo de lingvolernado, kaj pasigis tie entute 830 monatojn. Kompreneble necesas plu vastigi la kadrojn de la eksterlanda lingvolernado, krom la interŝtataj kontraktoj ni devas organizi diversajn interŝanĝojn, utiligi la eblojn de turismo kaj ankaŭ tiujn de la privataj vizitoj.

La supran temon mi eksplikis tiel detale pro tio, ĉar la evoluigo de la kultura kunlaboro ne malmulte dependas de personaj faktoroj; tio kompreneble koncernas ne nur nin, hungarojn, sed ankaŭ niajn eksterlandajn partnerojn.

3

Rilate la eksterlandan ĉeeston de nia beletro, la unua problemo estas tio, ĉu troviĝas tradukisto? Ni spertas, ke pri la edukado de tradukistoj el la hungara lingvo la aferoj marŝas malbone eĉ en la socialismaj landoj. La problemo estas multe pli granda en la landoj de Okcidenta Eŭropo, malgraŭ tio, ke parto de la hungaraj elmigrintoj eminente laboras sur la kampo de la tradukado, kaj ni subtenas tiun laboron. Aparte gravas do, ke la eksterlandaj universitatoj en la hungarologiaj centroj eduku tradukistojn, kiuj devos ricevi kompletigan instruadon en Hungario mem – por tio ni devos trovi novajn formojn.

Ĉiam pli klara fariĝas ankaŭ la bezono informadi literaturajn kritikistojn kaj kulturajn ĵurnalistojn, kiuj povos raporti en la gazetaro, radio aŭ televido pri la aperintaj verkoj. En la nuna tempo la eksterlandaj revuoj kaj eĉ la specialaj dissendoj de la radio kaj televido apenaŭ rimarkas tradukojn el la hungara literaturo, aperigitajn kun grandaj malfacilaĵoj. Tiel eĉ la apero de la tradukoj ne certigas, ke la hungara beletro trovos la vojon almenaŭ al parto de la publiko.

Grava problemo estas ankaŭ la disvastigo de la produktoj de la enlanda fremdlingva libroeldonado. Estas absurda situacio, ke en Hungario aperas sufiĉe multaj fremdlingvaj eldonaĵoj ĉe la Eldonejo Corvina kaj la Akademia Eldonejo, kaj ili malhavas pli vastan eĥon, precipe la beletraj libroj. Cetere, eĉ la hungara gazetaro ignoras tiujn eldonaĵojn, kvankam estus inde informi nian publikon pri la propraj fortostreĉoj.

La popularigo de la beletro postulas la validigon de reciprokeco en la internaciaj kontaktoj. Sovetio kaj la ceteraj socialismaj landoj klopodas eldoni tradukojn el la hungara literaturo en konvena nombro. Ĉe la elekto kompreneble validiĝas la principoj de la kulturpolitiko de la koncerna lando, tial la aplikata valorhierarkio povas diferenci disde la nia, Nia klasika literaturo kaj la ĉefverkoj de la unua duono de la 20-a jarcento eldoniĝas en ĉiuj socialismaj landoj, la reprezentiĝo de la plej nova beletro estas malpli forta.

En la okcidentaj landoj la ĉefa zorgo estas tio, ke la eldonejoj ne vidas profiteblon en la aperigo de hungaraj beletraĵoj: escepto estas la Federacia Respubliko Germanio, kie aperas relative pli multaj tradukoj. En Francio dum longa tempo aperis tre malmultaj hungaraj verkoj, kaj ne atingis pli vastan sukceson ĉe la publiko eĉ la verkoj de aŭtoro tiel intime ligiĝanta al la franca kulturo, kia estas Gyula Illyés. Dum la vizito de prezidento Mitterand al Budapeŝto ni ricevis promeson, ke la franca registaro subtenos la eldonadon de tradukoj el la hungara beletro. Dum la pasintaj 2-3 jaroj aperis en Francio entute 15-20 libroj, sed plejparte ĉe malgrandaj eldonejoj, en malalta eldonkvanto, kun minimuma publika eĥo. Ĉar tion ni ne povis atingi, ke ankaŭ la gazetaro rimarku tiujn librojn.

Cetere en la kapitalismaj landoj la „spotanea" elekto ordinare trafas tiujn verkojn, de kiuj oni esperas politikan sensacion. Ŝajnas nekredebla afero, ke Tibor Déry ĝis 1956 estis tute nekonata en la okcidenta mondo, kaj liajn verkojn oni komencis aperigi post lia politika agado[3]. Ni devas bazi nian laboron ne sur la efemera sensacio, sed sur la rekono de la valoroj, se eble, sur la vasta publika rekono de la valoraĵoj. Ni fidas pri tio, ke en la debatoj de la Eŭropa Kultura Forumo naskiĝos konkretaj kaj realigeblaj proponoj, ja ankaŭ multaj aliaj landoj estas interesitaj pri tio, ke la mondo ekkonu la literaturajn valoraĵojn de la malmulte disvastiĝintaj lingvoj. El tio profitus ne nur ni, hungaroj, sed profitus ankaŭ la mondo.

El la hungara: Vilmos Benczik

1. Kunó Klebelsberg (1875-1932) hungara politikisto, inter 1922-1931 ministro pri religio kaj kulturo. Sur la bazo de sia konservative naciisma principo, laŭ kiu Hungario devas demonstri sian kulturan superecon kompare al la najbaraj popoloj, apartenintaj pli frue al la historia Hungario, li tre grave evoluigis la publikan instruadon kaj disvolvis esence pozitivan kulturpolitikon.

2 Kastelo en Versajlo, kie en 1920 oni subskribis packontrakton rezulte de kiu Hungario perdis du trionojn de sia teritorio, kaj duonon de sia loĝantaro. Inter 1920 kaj 1945 la centra celo de la hungara politiko estis revizii tiun packontrakton.

3 Tibor Déry (1894-1977) hungara novelisto kaj romanisto, inter 1957-1961 li estis en malliberejo pro kontraŭrevolucia agado. Unu el la plej elstaraj figuroj de la ĉi-jarcenta hungara prozo.

TIBOR SEKELJ

UNESKO REKOMENDAS ESPERANTON

La Konferenco kunsidis en la Kulturpalaco "L. Ĵivkova"

Dum sia 23-a sesio de la Ĝenerala Konferenco UNESKO adoptis rezolucion favore al Esperanto. La rezoluciproponon prezentis la *Jugoslava* delegitaro kune kun ses kunsubskribantoj, tiuj de *Bulgario, Ĉinio, Hungario, Kostariko, Pollando* kaj *Sanmarino.*

Kiel reprezentanto de UEA en tiu Konferenco, okazinta en Sofio, de la 8-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro 1985, mi kontaktis multajn reprezentantojn kaj informis ilin pri Esperanto, ĝia nuna stato de progreso kaj ĝia konstanta kaj multflanka kunlaboro kun Unesko. Aliflanke multaj esperantistoj diverslandaj direktis sin al sialanda edukministerio aŭ Unesko-komisiono por informi ilin kaj peti apogon al nia rezoluciproponо. Informon pri tia agado mi ricevis de s-noj R. Corsetti (Italio), Y. Isobe (Japanio), T. Vaskó (Hungario), S. Prasad Mitra (Hindio), H. M. Maitzen (Aŭstrio), R. Harry (Aŭstralio), Randrienekena (Madagaskaro), M.M. Ngingi (Kongo), P. Todorov (Bulgario), J.M. Mbele (Kameruno), kun plua kontribuo de d-rino B. Despiney kaj A. Staes, kaj certe multaj aliaj, kiuj ne anoncis al mi. Tia vasta kunlaboro montras vastan celkonscian agadon, kies efiko ne povas ne montriĝi.

Mi havis la okazon dufoje paroladi, la unuan fojon en la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco, kaj la duan fojon en la Komisiono IV, en kiu nia rezoluciproponо DR 218 estis diskutota. Dum tiu kunsido favore al Esperanto parolis ankaŭ la reprezentantoj de Jugoslavio, de Japanio kaj de Eburbordo, kiu diris ke lia lando varme bonvenigos la Universalan kongreson de esperantistoj en 1990, kaj ke li esperas ke tiu evento grave kontribuos al la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Interesaj kaj grandvaloraj estis miaj kontaktoj kun membroj de la delegitaroj el Sanmarino, Kostariko, Ĉinio, Hindio, Aŭstralio kaj multaj aliaj, inkluzive tutan vicon de Afrikaj landoj, inter kiuj mi distribuis informajn broŝurojn pri la lingva problemo en Afriko kaj la lingva problemo de la Movado de nealiancaj landoj. Laŭ mia peto, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro Amadou Mahtar M'Bow akceptis min por persona interparolo. Tiuokaze mi donacis al li mikrolibron (15x15 mm), en kiu mi kompilis la vorton „paco" en 100 lingvoj. La titolo de la libreto estis en Esperanto: „PACO".

Laŭ mia opinio eĉ se la rezolucio ne estus adoptita, la tempo kaj energio kiun mi investis, ne estis senutilaj. Sed feliĉe, la rezolucio estas akceptita ĉiuvoĉe, kaj la Esperanto-movado post 31 jaroj denove havas seriozan subtenon de la plej alta organo de tiu prestiĝa mondorganizo. Restas al ni la tasko kiel eble plej vaste profiti el ĝi.



Tibor Sekelj, la reprezentanto de UEA

CELEBRADO DE LA CENTJARIĜO DE LA KREADO DE ESPERANTO

La Ĝenerala Konferenco,

K o n s i d e r a n t e ke dum sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, ĝi per sia rezolucio IV.1.4.422-4224, notas la rezultojn atingitajn pere de la Internacia Lingvo Esperanto sur la kampo de internacia intelekta interŝanĝo kaj de reciproka interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonas ke tiuj koincidas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

M e m o r i g a n t e ke Esperanto ekde tiam multe progresis kiel ilo de interkompreniĝo de popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, penetrante en la plimulton de regionoj de la mondo kaj en la plej multajn homajn aktivadojn,

R e k o n a n t e la grandajn eblecojn kiujn prezentas Esperanto por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsama nacieco,

N o t a n t e la tre grandan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de la Universala Esperanto-Asocio, en la diskonigado de informoj pri la aktivado de Unesko, samkiel ĝian partoprenon en tiu aktivado,

K o n s c i a pri la fakto, ke en 1987 Esperanto festas sian centjariĝon de ekzisto,

1. G r a t u l a s la Esperanto-movadon je ĝia centjariĝo,

2. P e t a s la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto, kiel ilo por pli bona interkompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj,

3. I n v i t a s la Ŝtatojn-Membrojn signi la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldonoj de specialaj poŝtmarkoj ktp., kaj iniciatu la enkondukon de studprogramo pri la lingva problemo kaj Esperanto en siaj lernejoj kaj institutoj de supera lernado,

4. R e k o m e n d a s al la internaciaj neregistaraj organizoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon uzi Esperanton kiel ilon por la diskonigo de ĉiuspecaj informoj inter siaj membroj, inkluzive informojn pri la laboro de Unesko.

En la jaro 1975 kunvenis al Helsinki por partopreni en la *Konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo* la reprezentantoj de 33 eŭropaj landoj kaj tiuj de Usono kaj Kanado: la tie naskiĝintaj interkonsentoj malfermis liberan vojon por la tre atendita malstreĉiĝo kaj por la fortostreĉoj celantaj la konservadon de la paco en nia kontinento kaj en la tuta mondo. Dum la ĵus pasinta jardeko – en la spirito de Helsinki – okazis similaj kunsidoj en Beograd kaj en Madrido, kaj meze de oktobro 1985 en la hungara ĉefurbo komencis sian antaŭvideble ses-semajnan laboron la *Eŭropa Kultura Forumo.* La tagordo de la Forumo enhavas punktojn interalie pri la problemoj de la literaturo kaj socio, teatra vivo, arkitekturo, protektado de artaj monumentoj, belartoj, filmarto, radio kaj televido. Konekse kun tiuj temoj dum la Forumaj semajnoj okazis en Budapeŝto multaj gravaj aranĝoj kaj kunvenoj. Inter tiuj elstaras la *Ekspozicio de la Internacia Pentroarto,* kiu estis malfermita en la plene rekonstruita Budaburgo, en la teretaĝaj salonoj de la Hungara Nacia Galerio.

Mihály Gergely

LA PENTROARTO de Eŭropo en Budapeŝto

Je la alvoko de la hungara prepara komitato 28 eŭropaj landoj, Usono kaj Kanado alsendis malgrandan kolekton (3-7 verkojn el unu lando) por prezenti sian postmilitan pentroarton. La plimulto de la verkoj venis el la publikaj kolektoj de la koncernaj landoj, dum kelkaj landoj decidis ekspozicii la verkojn de unu elektita pentristo.

La unua kaj ĉefa virto de la ekspozicio estas tio, ke ĝi ekzistas. Tio, ke, malgraŭ la ĉiam pli streĉita internacia atmosfero de la lastaj jaroj, en Budapeŝto povis kunsidi la gvidantoj kaj reprezentantoj de la kultura vivo de Eŭropo, kaj ke kadre de tio la pentristoj de 30 landoj povis prezenti en komuna ekspozicio siajn arton kaj opinion pri la mondo. Neniu kondiĉo limigis la partoprenon, ĉiu lando povis libere decidi pri la karaktero de la sendotaj pentraĵoj.

Estis hazardo – ĉiukaze bonvena hazardo – ke sur la unua etaĝo samtempe okazis ekspozicio de pentraĵoj, elektitaj el la privata kolekto de barono Thyssen-Bornemissza (troviĝanta en la svisa urbo Lugano), ĉiuj ili ĉefverkoj de la eŭropa pentroarto de la jarcentoj 15-20. Tiu ĉi laŭkvante modesta ekspozicio (47 pentraĵoj) prezentas la bildojn de tiel elstaraj figuroj de la pentroarto dum la lastaj kvincent jaroj, kiel Jan van Eyck, Albrecht Dürer, Anthonis Mor, Rubens, Piero della Francesca, Paris Bordone, Veronese, Zurbaran, Vincent van Gogh, Kandinski, Paul Klee, Pablo Picasso, Fernand Léger, Georges Braque, Marc Chagall.

L. G. Nordström: Dimensia situacio

La proksimeco de la du ekspozicioj elvokas tre interesajn pensojn ĉe la artamantoj, kaj instigas ilin fari komparojn. Jen, kelkaj el la tiel naskiĝintaj pensoj.

La plej multaj kontribuintoj de la Ekspozicio de la Internacia Pentroarto estas tute nekonata ekster la limoj de sia lando, brilaj nomoj, kompareblaj al la supra listo, tute mankas. Rigardante la ekspoziciitajn preskaŭ 140 pentraĵojn, oni tuj rimarkas, ke *la ĉefa karakterizaĵo de la pentroarto de la eŭropaj landoj estas la parenceco de la formaj esprimmanieroj.* La moderneco kaj la simileco de la pentroarto en la landoj de Okcidenta kaj Orienta Eŭropo atingis tiajn mezurojn, ke la plej multaj bildoj povus esti libere interŝanĝitaj inter si. Ne nur la artaj rimedoj kaj la forma realiĝo estas similaj, sed ankaŭ la temoj, aluditaj de la titoloj. Tio estas fakto ĝojinda, ĝin ebligis la progreso (ekonomia, kultura ktp.) de la lastaj jardekoj. Sed por mi (kaj mi kredas, ke ankaŭ por multaj aliaj) ĝuste tiu ĉi eco de la ekspozicio donis la plej pensigan lecionon. Ĉar nove kaj denove trairante la salonojn, ĉiam pli scivole kaj poste ĉiam pli maltrankvile, zorgoplene mi serĉadis: en kia formo la plimulto de la bildoj respegulas la ĉefajn sortoproblemojn de la nuna Eŭropo, la proekzistajn ĝojojn kaj angorojn de la nuntempa homaro? La multaj linioj kaj kolormakularoj kun aŭ sen titolo ne povas veki resonancon eĉ en homoj estetike edukitaj, ĉar oni devus ellerni la komunikan kodon de ĉiu artisto aparte. Kaj mi havas la suspekton, ke ĉe la plej multaj tiaj verkoj tio ne valorus la penon, ĉar ili riĉigus nin nek per arta travivaĵo, nek per intelekta mesaĝo.



L. G. Nordström: Dimensia situacio

En la vico de la artaj eksperimentoj kaj formaj bravaĵoj estas refreŝigaj kaj esperigaj esceptoj la sekvaj bildoj. Walter Pichler (Aŭstrio): Pendigito; Georgi Baev (Bulgario): Antaŭsento; Stella Michaelidou (Cipro): Protesto, Familio; Wladyslaw Hasior (Pollando): Okupo de Arkadio; Knut Rose (Norvegio): Stranga avangardo, Lastaj mezuroj; Frans Widerberg (Norvegio): Stelo; Rasolino Martelli (San Marino): La kruco de l' soldato. Apartenas al la esceptoj ankaŭ du hungaraj pentraĵoj: Mozaikprojekto de Szentendre (Jenő Barcsay) kaj Attila József: La kanto de l' Kosmo (Béla Kondor).

Ĉu la artamantoj rajte atendas, ke la pentraĵoj respegulu la ĉefajn karakterizajn trajtojn de nia epoko? Ĉu estas prava la supozo, ke en la arto, en la plimulto de la artverkoj de ajna epoko iel devas aperi ankaŭ la homo de la epoko? Aŭ ĉu tiel funde, eble definitive ŝanĝiĝis la ĝisnuna poetiko de la pentroartó? Se estas tiel, ĉu tiam ne estas plene motivita la maltrankvilo de tiuj multaj artamantoj, kiuj, vizitante la ekspoziciejojn de Hungario kaj Eŭropo, fariĝas ĉiam pli nekomprenaj: ĉu la pentroarton faras pli moderna tio, ke ĝi forturnas sin de la homo? Ĉu la nuraj formaj rimedoj, la surfacaj manieroj diktataj de la pasemaj modoj kaj ismoj taŭgas por krei artverkojn – per si mem, sen inda, grava, sed almenaŭ interesa, originala, okulkatena temo? Krei tiajn artverkojn, kiuj ankaŭ dum la sekvaj jarcentoj tiel firme gardos per sia sorĉbalzamo la homon, eternigitan per la arto, kiel la bildoj de tiu alia malgranda ekspozicio en Budapeŝto gardas plurajn epokojn kaj rolintojn de kvincent jaroj de Eŭropo? Tiel, kiel gardas eĉ nun sian epokon en Budaburgo la postrestintaj arkitekturaj, skulptartaj, juvelartaj kaj pentroartaj verkoj de dek unu jarcentoj de la hungara pasinteco? Kaj nur dank' al la sugestia forto de tiuj artverkoj povas esti plena la historia memkono de nia popolo, dank' al tiuj kulturaj trezoroj ni ne bezonas honti antaŭ aliaj popoloj.

Tiel memkompreneble, spontanee kreiĝis en la vizitanto de la granda ekspozicio la supraj meditemaj demandoj, ke jam nur pro la tirebla konkludo estis inde aranĝi tiun ĉi komunan prezentiĝon de la eŭropa pentroarto.

D. Mytras: Portreto de M. Lauros

H. T. Fridjonsson: Sentitole

LIBROOFERTO POR 1986

Kvankam dum la jaro 1985 aperis relative malmultaj novaj libroj en Budapeŝto, oni ne maldiligentis en la hungara ĉefurbo. Pluraj interesaj verkoj estas en diversaj fazoj de preparo, kaj dum la komencaj monatoj de 1986 ili eliros unu post la alia.

Reapero de klasikaĵoj

Certe multaj legantoj ĝoje akceptos la novaĵon, ke represiĝos unu el la plej interesaj romanoj de Julio *Baghy*: **Hurra!** Laŭ multaj kritikistoj ĉi tiu *pli ol 400-paĝa verko* estas unu el la plej bonaj Esperantaj romanoj. (Ĝi aperis en la jaro 1930.) La bazo de la intrigo estas, ke mizantropo testamentas 230 milionojn da dolaroj al sia naskiĝurbo Strutmagen en la lando Bagonio, sub kondiĉoj tre humiligaj por la Urba Konsilantaro. Se tiu ne konsentas plenumi la kondiĉojn, la sumego devas esti „disdonita egalproporcie inter la prostituinoj, loĝantaj en la urbo Strutmagen..." La reeldonon akompanos ampleksa postparolo, analizanta la verkon.

Sándor Szathmári (1897-1974)
(Foto de L. Csibó)

Ne malpli da ŝatantoj de la Esperanta prozo akceptos kun aklamo la novaĵon, ke sub la titolo **Perfekta civitano** aperos la plena novelaro de Sándor *Szathmári*. Tiu ĉi volumo enhavos ĉiujn pecojn de la libroj „Kain kaj Abel" kaj „Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj". Szathmári estas sendube unu el la atutoj de la tuta Esperanta prozo: tiu ĉi ankaŭ pli ol 400-paĝa volumo liveros al la literaturamantoj atentoĉenan kaj samtempe tre pensigan legaĵon. Ankaŭ tiu ĉi volumo aperos kun ampleksa analiza postparolo.

Nemere ne lacas

Nia populara romanisto, István Nemere ankaŭ en 1985 transdonis al la Eldonejo de HEA du romanojn. La unua el tiuj, **Alta akvo** jam estas presata, kaj aperos verŝajne en februaro. Ĝia baza temo estas ekologia, sed ĝin variigas ankaŭ amhistorio. La dua romano, **Serĉu mian sonĝon** atendas kompostadon, kaj eliros verŝajne dum la somero. Ni havas lian promeson transdoni dum 1986 du pliajn manuskriptojn: **Terra** (sciencfikcia romano) kaj **Vivi estas danĝere** (aventurromano). La lastaj du verkoj aperos iom fine de 1986.

★

Kompreneble, ne nur Nemere verkas romanojn. Dum la fruaj monatoj de 1986 aperos nova *Lorjaka* verko sub la stranga titolo **Mariagnes** (kombino de du virinaj nomoj: Maria kaj Agnes). Krome eliros originalaj prozaĵoj de O. *Knĩchal*, J. *Modest*, N. *Nedelĉeva*.

Esperantologiaj verkoj

Sur tiu kampo la plej interesa libro estos certe la ĉ. 160-paĝa monografio de Zoltán *Barna:* **La laborista Esperanto-movado en Hungario 1913–1934.** Tiu ĉi detale analiza verko – kiu estis la doktoriĝa disertaĵo de la aŭtoro – antaŭvidas sukcesan akcepton ne nur ĉe esperantologoj, sed ankaŭ ĉe la vasta publiko. Estas ĝojinda novaĵo, ke dum 1986 reaperos la kolekto **Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado** kaj la monumenta verko de L. Kökény kaj V. Bleier: **Enciklopedio de Esperanto.** Reaperos krome en tria eldono **Baza Literatura Krestomatio.**

Tradukoj el la hungara

La atuta volumo de tradukoj el la hungara literaturo estos **Ĉe Danubo,** kolekto de la elektitaj poemoj de Attila *József* (1905–1937). Ĝi enhavos la kremon de la verkaro de la plej granda figuro de ĉijarcenta hungara poezio. La plej multaj tradukoj en la volumo venas el la plumo de K. *Kalocsay* kaj I. *Szabó*.

Eliros krome du verkoj de lastatempe forpasintaj aŭtoroj: la mondfamiĝinta dramo **La familio Tóth** de István *Orkény* (1912–1979) kaj la romano **Obsedita de l' suno** de István *Gáll* (1931–1981).

Aliaj temoj

Inter alitemaj libroj elstaras la tralaborita reeldono de **La sporta lingvo en Esperanto** de Tibor *Ujlaky-Nagy*. Bernard *Golden* helpos al ni perfektiĝi en la lingvo per sia kolekto de prilingvaj eseoj **Kompletige al la lernolibro.**

★

Tiu ĉi riĉa oferto kompreneble povos realiĝi nur, se la publiko montros indan interesiĝon al niaj libroj, kaj vigle aĉetos ilin. Ni devas diri, ke lastatempe nia vendado iomete stagnas, necesos do, ke literaturamantoj ĉie alvoku la atenton de aliaj esperantistoj pri niaj libroj, kaj se necese, ili kunlaboru por kolektado de mendoj, organizado de perado ktp.

V. *Benczik*

Por la atento de bulgaraj esperantistoj

Dank' al ĵusa interkonsento inter Hungara Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Kursejo ekde la 1-a de januaro 1986 ĉiuj Esperantaj libroj, eldonitaj en Hungario, estos aĉeteblaj en Bulgario.

Bulgaraj esperantistoj, dezirantaj aĉeti niajn librojn – temas pri pli ol 60 titoloj! – tuj sendu sian mendon al Bulgara Esperantista Asocio (Por IEK), Bul. Ĥristo Botev 97, 1303–Sofia.



Hungaraj fabeloj – ĉinlingve

Ĉe Pekina eldonejo ĵus eldoniĝis ĉinlingve *Hungaraj fabeloj* de Elek *Benedek*, kiu jam en dua eldono rikoltas sukceson ĉe la esperantistaj legantoj en la traduko de Mária *Benczik*. La libreton tradukis el Esperanto en la ĉinan lingvon s-ano *Giang Hongzhang*, kunlaboranto de *El Popola Ĉinio*.

Ĉi tiu ne estas la unua fojo, kiam Esperanto servas kiel pontlingvo inter la hungara kaj ĉina kulturo: antaŭ tri jar dekoj el Esperanto estis farita ankaŭ la ĉina traduko de *Johano la Brava* de Sándor *Petőfi*.

Grabowski-premio por Nemere

Ĉijare la juĝkomisiono de la Fondaĵo Grabowski aljuĝis la *unuan premion* (750 usonaj dolaroj) al István *Nemere*, „pro eksterordinara riĉigo de la Esperanta prozliteraturo per noveloj kaj romanoj dum la pasintaj jaroj."

Nia Redakcio sincere gratulas la premiiton, kiu jam akiris nenombreble multajn agrablajn leghorojn al la esperantistaj legantoj, kaj kiu, laŭ la atesto de la informoj sur la apuda paĝo, ankoraŭ tute ne perdis la diligenton.

„Infanoj de l' atombombo" – hungarlingve

La ĉi-jara aŭgusta numero de la prestiĝa hungara literatura revuo „Uj Irás" (Nova Skribo) aperigis tiun ĉi animskuan verkon en la traduko de Imre Szabó. La ĉefredaktoro de la revuo, Ferenc Juhász, kiu estas unu el la plej elstaraj figuroj de la nuntempa hungara poezio (vd. en Hungara Angologio, p. 394–398) estis tiel impresita de la veokrio de la japanaj infanoj, ke li verkis prozpoemon, kiu aperis per lia manskribo kvazaŭ enkonduke al la „Infanoj de l' atombombo". Jen, la Esperanta traduko de tiu prozpoemo, kiun traduki japanen estus tre bela gesto:

Ferenc Juhász
(1928–)

La Unua Henego de Apokalipso

Ho, la infanaĝo; La mia estis tio: humilo, honto, angoro, timo de koro. Ĝi estis tamen ankaŭ espero kaj arda florar-vastejo, verdpintaj karikoj lagorande, orlamen-maldensejoj en arbaroj de someraj tondregoj, kaj la ĉielo: la ekmatena bluo, la ekvespera lilo, la blanko de ardo-nebulo. Ho, kiom da fojoj mi kuŝis dors-al-tere rigardante al-ĉiele, mi, adoleskanta poeto plena de knaba sopiro-revado! Kvankam el mia ĉielalto same faladis ŝrikantaj larmoj de feranĝeloj: la murdo, la ovoj de morto! Kaj, ĉu povas levi la rigardon al la ĉielo tiu infano, ĉu povas suprenrigardi al la tagblua ĉielo, al la aŭrora virgecobelo tiu, kiu vidis ŝvebi tie Apokalipson, tiu, kiun la Unua Henego de Apokalipso por fajro-uragano kaj varmego-plaga radiado-balailo alterige turmentpremis, en ŝtonojn malamkatenis, surdi kaj blindi malbenis? Tiu, kiu infane vidis – se kuraĝis vidi, se ne tuj fritiĝis al li la okuloj kiel ovoj ŝelrompite fetitaj en kaserolon –, ke brulas la aero, brulas la akvoj, flamas ĉiu ŝtonero kaj la homoj disfandiĝas, forsekiĝas kiel la ploro, kaj la tombaroj rampas sur la ruĝan tersurfacon, kaj brulas la tombaroj, kaj ploras la tombaroj; kaj konvulsias la tombaroj en la homoj, kiel vermoj, raŭpoj en la kadavroj, kaj vaporneniiĝas la homoj kiel nebulo, nebuleto, nebula diskradiĝo. Ho, Bombo, Atombombo: ne alvenu via regno denove! Tiuj du morto-ovuloj, tiuj du brulkiso-sigeloj estas monstra teruriĝo de nia honto! Tio, kio estis kaj ankoraŭ povas esti, al kio ne estu permesate ree esti! Fajro-kontraŭrevolucio, disfluantaj kristalblokoj de la varmegoobstrukco, radiado-uragano kaj poste ĝiseterne neĝados, ĝisfunde glaciiĝos la maroj, homo manĝos homon, kaj ne plu estos birdoj, ne plu estos floroj ! La infanoj tamen nur ridetu, ili homiĝi pere de la sorto pretu, kaj dum la korpo maturiĝos por amo plena: ili povu kredi, ke ĉiu estas komprenema, kiu volas ke la homo estu homo vera!- Mi volas kredi je la infana vivo-fido apera! Jen, tio la espero! Kaj la blua ĉielo, kaj puraj noktaj steloj en la kosmo feliĉa.

Tradukis: Imre Szabó



NE-KATOLIKAJ PREĜEJOJ en BUDAPEŜTO

Sur la kovrilpaĝo videblas unu el la plej belaj kaj samtempe malplej konataj barokstilaj artmonumentoj el la centra parto de la hungara ĉefurbo. La ortodoks-kristana (pravoslava) preĝejo de la Peŝt-urbaj serboj estis konstruita en 1698, poste, en la jaro 1733 trakonstruita de nekonato, plej verŝajne de Jozefo Mayerhoffer. Laŭ la Bizanca tradicio en la preĝejo antaŭ la altaro staras „bildmuro" (ikonostasion), kiu kovras la oferon far la pastroj antaŭ la okuloj profanaj. Aŭtoro de la belaj ikonoj de tiu muro estis Karlo Sterio meze de la pasinta jarcento.

En Hungario ĝenerale oni renkontas katolikajn templojn. Multaj eksterlandanoj eĉ pensas, ke ĉiu (aŭ preskaŭ ĉiu) religiema loĝanto de Hungario estas katoliko. Vere, ke la plejmulto el la kredantoj de nia lando apartenas al la katolika eklezio, sed ekzistas ĉe ni reprezentantoj de nekatolikaj popoloj kaj krome ankaŭ hungaroj, apartenantaj al diversaj kristanaj (protestantaj) eklezioj. Vivas en Hungario ankaŭ Moseanoj, alivorte judoj. Preĝejoj – kirkoj, sinagogoj, kunvenejoj – de tiuj religioj ne staras ĉiam malfermitaj, kiel la katolikaj temploj, krome ili estas malpli multenombraj kompare al tiuj. Tamen nun sur tiu ĉi malgranda spaco eblas mencii nur kelkajn el ili, situantajn en Budapeŝto.

Se iu jam vizitis nian ĉefurbon, tiu eble memoras, ke ĉirkaŭ la interna parto de Pest (urboparto oriente de Danubo) troviĝas la t.n. malgranda bulvardo, alivorte ringo. Ĝi iras apud la loko, kie staris la iamaj urbomuroj. Se oni pasas laŭ tiu strato, ne tre malproksime unu de la alia oni renkontas tri ne-katolikajn preĝejojn. Apud la subfervoj-stacio de Deák tér (placo Deák) staras kirko de luteranoj en klasika stilo, konstruita inter 1799 kaj 1809 de Mihály Pollack. La fasado de la templo devenas el la jaro 1867, ĝi estis farita laŭ projekto de József Hild. Veturante al la direkto de Danubo, la sekva preĝejo estas sinagogo en „orienta" stilo de la pasinta jarcento, projektita kaj konstruita de Viena arkitekto Ludwig Förster en 1853. Irante plu oni trovas sur la placo de Calvin (Calvin tér) kirkon de kalvivanoj, konstruitan inter 1816 kaj 1830 laŭ la projektoj de József Hofrichter.

La fakto, ke tiuj tri preĝejoj staras en unu strato, havas eksplikon. Ĝuste tiun, ke en la 18-a–19-a jarcentoj en Hungario inter la urbomuroj rajtis konstrui templojn nur katolikoj kaj parte ortodoksaj kristanoj. (La templo de la grekaj ortodoksanoj staras apud Danubo.) La protestantoj kaj des pli la judoj devis diservi ekstermurare. Ili do konstruis siajn adorejojn kiel eble plej proksime al la urbopordegoj, sed ekster la oficiala urbolimo – la muraro.

De tiu tempo tiuj protestantaj preĝejoj kaj la sinagogo jam staras fakte en la urbocentro, dume konstruiĝis pluraj aliaj kirkoj, ekzemple en la t.n. Aleo (hungare: Fasor, hodiaŭ Gorkij fasor) staras po unu preĝejo de ambaŭ tiuj eklezioj el la komenco de la 20-a jc.

Ĉe la fino de tiu ĉi artikoleto mi mencias malgrandan islaman sanktejon de Budapeŝto. Ĝi troviĝas en Buda (okcidenta urboparto). Tiu preĝejo, konstruita en la 16-a jc., estas fakte maŭzoleo de turka derviŝo Gül Baba. Post la liberigo de Buda disde la turka okupado (1699) ĝi – kiel aliaj iamaj moskeoj – servis kiel katolika preĝejo. Nur fine de la pasinta jarcento ĝi estis redonita al Islamo, kiun ĝi servas ankaŭ nuntempe.

Péter András *Rados*

JUBILEAJ TAGOJ DE HUNGARA Esperanto-Asocio

En la sidejo de la Nacia Konsilio de Sindikatoj la 26-an de oktobro 1985 je la 11a horo komenciĝis la solena kunveno de Jubileaj Tagoj de HEA, okaze de la 25-a datreveno de la fondiĝo de HEA kaj 30-a datreveno de la fondiĝo de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro.

La solenaĵon malfermis d-ro Imre *Pethes*, vicprezidanto de HEA kaj salutis la ĉirkaŭ 300 partoprenantojn kaj la reprezentantojn de pluraj hungaraj instancoj kaj organizaĵoj: Károly *Palotai*, vicprezidanton kaj Károly *Szlovatsik*, sekretarion de la Nacia Konsilio de Sindikatoj; Anna *Somos-Papp*, vicsekciestron de la Centra Komitato de Hungara Socialisma Laborista Partio; György *Petrus*, sekciestron de la Registara Oficejo pri Gazetara Informado; Attila *Csizmás*, sekciestron de Landa Prezidio de la Patriota Popolfronto; Éva *Horváth*, sekretarion de Hungara Packonsilio; László *Végh*, vicprezidanton de la Hungara-Soveta Amikeco-Societo; Sándorné *Fazekas*, sekciestron de la Tutlanda Konsilantaro de la Hungaraj Virinoj; Klára *Akots*, sekciestron de Centra Komitato de Hungara Komunisma Junularo kaj d-ro Géza *Lőrinczy*, ĝen. sekretarion de Hungara Naturamika Asocio.

Skribe salutis la jubilean kunsidon interalie Ferencné *Cservenka*, vicprezidanto de la Hungara Parlamento, d-ro Sándor *Kormos* (Ministerio pri Klerigo) kaj Ferenc *Rottler*, ĝen. sekretario de TIT (Sciencpopulariga Asocio).

Eksterlandajn Esperanto-organizaĵojn reprezentis d-rino Flóra *Szabó-Felső*, ĝen. sekretario de UEA, Clement *Tholet*, ĝen. sekretario de MEM, Nikola *Aleksiev*, honora prezidanto de MEM kaj Bulgara Esperantista Asocio, d-ro Andrej *Lukáč*, prezidanto de Slovakia Esperanto-Asocio, Kurt *Güse*, membro de la Prezidio de Esperanto-Asocio en Germana Demokratia Respubliko, Djordje *Dragojlovič*, sekretario de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj Lech *Kosieniak*, membro de Prezidio de Pola Esperanto-Asocio.

Pro siaj plurjardekaj Esperanto-laboroj ricevis oran gradon de la distingo „Pro elstara sindikata laboro" Béla *Berceli*, estinta ĉefsekretario de HEA. Arĝentan gradon de tiu ĉi distingo ricevis

Béla Berceli, kiu en diversaj postenoj dum pluraj jardekoj servis la Esperanto-movadon, ricevis oran gradon de la insigno „Pro sindikata laboro"

Ambrus *Tóth*. Memordiplomo pro elstara sindikata laboro estis transdonita al Lajos *Korsós*.

La plej novan Esperanto-distingon – honorinsignon de HEA – ricevis Szilárd *Bálint*, Károly *Fajszi*, Éva *Farkas-Tatár*, Imre *Jakó*, d-ro József *Mátéffy*, Antal *Münnich*, Elizabeta *Pallós* kaj László *Zseni*.

Honorinsignon de GDREA ricevis Tibor *Vaskó*, sekretario de HEA.

Dum la solena kunveno Clément *Tholet*, ĝenerala sekretario de Mondpaca Esperantista Movado, transdonis la Honorinsignon de MEM al Hungara Esperanto-Asocio pro fruktodona porpaca agado.

En la festa parolado d-ro Endre *Baráth*, ĉefsekretario de HEA, prezentis la historion de hungara Esperanto-movado de la komenco ĝis hodiaŭ, akcentante la rolon de esperantistoj en la progresaj movadoj de Hungario.

Károly *Palotai*, vicprezidanto de la Nacia Konsilio de Sindikatoj taksis la partoprenon de esperantistoj en la sindikata movado, kaj la rezultojn de la hungara Esperanto-movado ĝenerale. Li konstatis, ke la esperantistoj sukcese servis intereson de ambaŭ movadoj, kaj kontribuis al la klerigo de laboristoj kaj la paca kunvivado inter la popoloj.

Sekciokunsidoj en Kulturdomo Láng

Sabate posttagmeze vigle kaj longe kunsidis la sekvaj komisionoj de la jubileanta asocio: instrua, turisma, paca, pro-

D-ro Endre Baráth transdonas la Honorsignon de HEA al d-ro József Mátéffy, antaŭa prezidanto de HEA

paganda kaj junulara. Pri la diskut temoj kaj rezultoj koncize raportis la koncernaj sekretarioj kadre de la Komitatkunsido, okazinta dimanĉon posttagmeze. La sekciokunsidon pri paco alparolis Clement *Tholet*, ĝen. sekretario de Mondpaca Esperantista Movado.

Amika vespero

Sabate vespere okazis amika interkona vespero kun partopreno pli ol 150 esperantistoj. La viglaj konversacioj kaj opinio-interŝanĝoj jam komenciĝis dum la vespermanĝo, kaj daŭris ĝis la dua horo nokte. Kaj la eksterlandajn gastojn kaj la estraranojn de HEA multaj demandis pri aktualaj demandoj de nia movado. Dum la vespero kompreneble ne mankis ankaŭ muziko kaj danco.

Kadre de la interkona vespero okazis enketo pri niaj Esperanto-revuoj. D-ro Vilmos *Benczik* (HV), d-ro Árpád *Máthé* (BI) kaj Ervin *Fenyvesi* (Világ és Nyelv) respondis la – ne ĉiam laŭdajn demandojn.

Kulturprogramo kaj ekspozicio

Dimanĉe antaŭtagmeze riĉa arta programo amuzis la spektantaron en la Kulturdomo „Láng". Altnivele sin prezentis kanthoro, kantante kaj hungarlingve kaj esperante popolkantojn, madrigalojn kaj originalajn esperantlingvajn kantojn. La malnova esperantisto Árpád *Szegedi* denove sorĉis nin per lertaj magiaĵoj. La malnova teatro-grupo „Gorgo" prezentis – laŭ la novelo de Buzzatti – teatraĵon verkitan de Kamil Kárpáti; „La ovo". Fine de la kultura programo novan esperantistan kantiston aplaŭdis la spektantaro: József *Dinnyés*, kiu prezentis siajn kantojn kun granda sukceso.

Nikola Aleksiev salutas la solenan kunvenon

Forumo

Kadre de la Forumo demandis pri diversaj temoj Sándor *Kovács* (Eŭropa Forumo; gazetaro); János *Zakar* (SELE-85), Károly *Sós* (kulturprogramoj; naturprotektado, artaj ekspozicioj, pionir-tendaro); Lajos *Csonka* (gazetaro, arkivado, radio-dissendoj); Róza *Halász* (E-kongreso en Hungario); Sándor *Gyenes* (distingado de esperantistoj); József *Cseh* (SEC; libroeldonado) kaj Péter *Tihanyi* (Esperanto-kongreso).

Respondis la demandojn estraranoj de HEA.

Publika Komitatkunsido de HEA

Prezidis ĝin Prof. Ottó *Haszpra*, vicprezidanto de HEA. Enkonduke raportis la sekci-gvidantoj, resp. reprezentantoj de la koncernaj kunsidintaj komisionoj. Dekoj da alparoloj kompletigis la traktitajn temojn. En la turisma sekcio oni diskutis la jubilean planon de HEA. La priinstrua sekci-kunsido – gvidita de d-ro István *Szerdahelyi*, prezidanto de ILEI – emfazis la gravecon de eldono de du instrumaterialoj: porinfana kajero kaj libro por estontaj instruistoj. La sekci-kunsido pri paco akcentis la porpacan gravecon de interpersona korespondado. Péter András *Rados*, gvidanto de la Propaganda Komisiono de HEA en sia raporto fiksis la celon de nia propagando: elformi pozitivan bildon pri Esperanto en la hungara socio.

En la nomo de la kvinmembra kandidatiga komisiono de HEA por la elektoj en 1986 alparolis János *Szilágyi*. Li petis la departementajn komitatojn, la diversajn komisionojn kaj unuopajn esperantistojn sendi siajn proponojn pri komitatanoj kaj estraranoj de HEA por la periodo 1986-1990. Ĉiuj kvin membroj de la komisiono (D-ro István *Bácskai*, prezidanto; Árpád *Abonyi-Nagy*, Katalin *Faragó*, Bernadette *Mihályi* kaj János *Szilágyi*) atendas opiniojn kaj proponojn. La Jarkunsido, kiu elektos la novan Komitaton kaj Estraron okazos la 19/20-an de aprilo 1986.

La hungara esperantistaro inde omaĝis al la kvaronjarcenta jubileo de sia Asocio. Pri la Jubileaj Tagoj sur la unua paĝo raportis la sola dimanĉa tagĵurnalo, kaj dum la sekvaj tagoj aperis pluraj raportoj en aliaj gravaj tagĵurnaloj.

–op–

La partoprenantoj de la solena kunveno
(Fotoj de Z. Fejér)

D-ro Andrea Chiti-Batteli, sekretario de la itala grupo de Eŭropa Parlamento

En la Eŭropa Ekonomia Komunumo, en la Eŭropa Parlamento kaj en aliaj komunaj organizaĵoj de la okcidentaj landoj la lingvaj problemoj kaŭzas re- kaj reflamiĝantajn diskutojn unuavice pri la privilegio de iuj lingvoj, pri la komunikaj problemoj de la tradukado, respektive pri la enormaj kostoj.

En la Eŭropa Parlamento fondiĝis internacia grupo de Esperanto-amikaj deputitoj. Al tiu ĉi grava grupiĝo apartenas ankaŭ la itala D-ro Andrea Chiti-Batteli, kiu decidis prezenti al Eŭropa Parlamento ampleksan studon pri la lingva problemaro. Kun afabla permeso de la itala parlamentano ni publikas la resumon de lia studo.

1. Ĉu esti, aŭ ne esti: tiun demandon devas alfronti niaj lingvoj

La opajn etnajn grupojn kaj iliajn lingvojn rekte minacas la pli gravaj ŝtataj lingvoj. La franca repuŝas la lingvojn de Bretagne kaj Alscani, la itala tiujn de Friuli, Val d' Acoste kaj Sud-Tirolo, la hispana (kune kun la franca) la katalunan kaj la vaskan. Sekve estas plene kompreneble, ke la defendantoj de tiuj etnoj ĝis nun priatentis nur pri tiu rekta minaco.

Tamen, ene de kelkaj jardekoj kaj tiuj regantaj, kaj tiuj minacataj lingvoj devas alfronti multe pli minacan danĝeron: la mondskale fortigitajn poziciojn de la angla, kiel de efektiva internacia peranta lingvo (lingua franca).

Ne ekzistas ia dubo pri tio – ni memoru nur pri la sorto de la praaj Eŭropaj lingvoj en la Romia epoko: pri ilia forvelko kaj pri la ekskluziva ekregado de la latina. Kiel samajn ekzemplojn, eblas mencii la Nord- kaj Sud-Amerikajn indiĝenajn lingvojn, kiuj post la malkovro de la Nova Mondo malaperis definitive pro la efiko de la lingvoj hispana, angla kaj franca. La sola diferenco estas nur, ke pli frue la malkreska procezo de la lingvoj okazis dum jarcentoj, sed en la nuntempa mondo tio povas plenumiĝi ene de unu aŭ du generacioj. Ja la disvastiĝon de la angla helpas ne nur la ekonomiaj kaj politikaj fortoj de la anglalingvaj landoj (unuavice tiuj de Usono), sed la decida influo de la amaskomunikiloj, precipe tiu de la televido (kaj televidaj programoj emisiotaj baldaŭ ankaŭ pere de satelitoj – kio la nunan situacion eĉ plie akrigos).

Vivanta nacia lingvo ne povas esti neŭtrala kaj sterila rimedo de la komunikado. La lingvo estas reala manifestiĝo, portanto de koncerna mondkoncepto; sekve ĝi estas neeviteble malpacienca kaj strebas iom post iom eksigi kaj anstataŭi ĉiujn aliajn pensmanierojn (mondkonceptojn).

2. La situacio de Esperanto

Al tiu danĝero povas esti nur unusola logika radikala respondo: enkonduki, kiel internacian perantan lingvon, iun lingvon, kiu ne havas en si mem la ruinigajn fortojn de la angla.

Kiam post la disfalo de la Romia imperio la latina fariĝis specifa mortinta lingvo, tiam ĝi perdis sian malkonstruan influon kaj en la mezepoko, poste en la renesanca periodo fariĝis taŭga por servi kiel peranta lingvo por la elitaj sciencaj kaj artistaj rondoj, ne lastvice por la eklezio; kaj per tiu funkcio ĝi tute ne minacis la staton de la franca, germana, hispana kaj aliaj lingvoj. Tiu historia konkludo klare montras al ni, kio estus la ĝusta solvo: lingvo, kiu estas nenies gepatra lingvo, kaj kiun popolo aŭ ŝtato kun politika kaj kultura potenco ne altrudas, ĉefe ne iu el la gravaj ŝtatoj kaj popoloj de la kvin kontinentoj.

Tial, ĉar la internacia komunikado estas pretendo ne nur de iu minoritata intelektularo aŭ elita tavolo (ja ni vivas la epokon de la amaskomunikado), – tiun problemon povas solvi nur lingvo, kiu estas unuflanke senŝtata, t.e. neŭtrala lingvo, aliflanke estas facile alproprigebla. Al tiuj kondiĉoj kapablas konveni nur logike planita, artefarita lingvo. Nur Esperanto estas uzata sufiĉe delonge, nur tiu lingvo havas sufiĉe vastan „infrastrukturon" (t.e.: ampleksan literaturon kaj multe da lingvouzantoj) por tio, ke ĝi tuj plenumu la taskon de la internacia perado. Kaj tio eĉ plie gravas: ĝi estas la unusola lingvo, kiu konvenas al la ŝtatinteresoj de iu ebla Eŭropa Unuiĝo, nome al la strebadoj por la sendependeco; samtempe al tio ankaŭ, ke Eŭropo havu gvidan rolon en la helpo akceli la realiĝon de simila sendependeco en la Tria Mondo, sur politika kaj kultura kampoj same.

3. La nunaj psikologiaj baroj de la radikala solvo

Bedaŭrinde, en la nuna situacio estas utopie esperi, ke Eŭropo elektus ĝuste tiun ĉi solvon. La ĉefan malhelpon prezentus verŝajne ne la sociaj fortoj de la angla, ĉar la angla jam nuntempe estas en pli kaj pli vasta rondo uzata kiel peranta lingvo.

La ĉefa obstaklo aperas sur la psikologia kampo: multaj havas tiun ĝeneralan subkonscian kontraŭsenton, ke la uzado de lingvo artefarita, sen ajna historia tradicio, signifus kaj persone kaj socie „tian abruptan perdon de la nacia identeca konscio", kio estus neniel trankviliga por la homoj.

4. La prepartaktiko de la lingvistika kibernetiko

La baro ŝajnas unue nevenkebla, tamen el la inerteco formovas la aferon la moderna lingvistika kibernetiko, ĉefe la propono de profesoro Helmar Frank laboranta en la Paderborna Universitato (FRG). La esploroj rezultigis, ke la studado de Esperanto, pro ties logikeco kaj facila ellernebleco, estas la plej bona kaj plej utila preparo al la studado de la naciaj lingvoj; pli konkrete al la studado de la angla lingvo. Nia propono estas, ke oni devus instrui Esperanton en la ĝeneralaj lernejoj de Eŭropo minimume du jarojn, tamen ne memcele (kiun tiutempe neniu konsideras dezirinda), sed simple kiel la plej simplan kaj utilan preparon por la lernado de la angla (aŭ alia nacia lingvo), kio postulus malplej da fortostreĉoj kaj certigus la plej eminentan rezulton.

5. Longdaŭra solvo pere de la Eŭropa Komunumo

Se la ĵus menciita metodo estus enkondukita en ĉiuj landoj de la Eŭropa Parlamento, tiam ene de dek aŭ dudek jaroj karakterizus ĉiujn landojn la kono de Esperanto; kaj ĉar tiun lingvon eblas ellerni (eĉ plie: ne forgesi) dekoble pli facile ol la anglan (aŭ iun ajn alian lingvon) povus okazi, se iu Eŭropa Unuiĝo vere ekestus, kaj tiu unuiĝo devus elekti oficialan lingvon, tiukaze laŭ la ĉi-supraj faktoj eblus konsideri, eĉ sugesti, ke Esperanto fariĝu la komuna oficiala lingvo (pri kio en la nuna stato memkompreneble ne estas eĉ plej malgranda ŝanco).

6. La ĝusta strategio

Por realigi tiun projekton, estas bezonataj tri aferoj:

1. Ni devas tuj subteni, ke Esperanto estu enkondukita en la lernejoj kiel prepara instruobjekto, pro la supre skizitaj kaŭzoj;

2. Ni devas subteni la establadon de interdisciplinaj institutoj, en niaj universitatoj (se eble kunlabore de la diversaj Eŭropaj landoj), kiuj okupiĝus pri la studado de la problemaro de la internacia komunikado, kun aparta atento pri la politikaj sciencoj, sociologio, pedagogio, lingvistiko kaj kibernetiko;

3. Ni devas streĉi niajn fortojn por la politika unueco de Eŭropo, t.e. subteni la projekton de Eŭropa Parlamento pri la reformado de la Eŭropa Komunumo.

Evidente tio estas la intereso de ni ĉiuj, tamen unuavice de tiuj, kiuj vivas en malgrandaj lingvaj, etnaj komunumoj kaj kiuj subtenas iliajn aferojn.

László Deme
profesoro de ĝenerala lingvistiko

EN LA AFEROJ DE LA INTERNACIA PERANTA LINGVO

La proponon prezentotan al la Eŭropa Parlamento ni povas konsideri grava kaj ĝojiga iniciato, kiu bone demonstras, ke la ekonomia, socia kaj politika simileco en si mem ne sufiĉas por la senĝeneco de la reciproka komunikado; ĝi sugestas samtempe, ke la ĉi-kampaj diferencoj ne nepre baras kompreni unu la alian – almenaŭ en lingvaj–lingvopolitikaj demandoj ne.

Ne necese aparte ekspliki: tio, kio premas la membrojn de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, estas problemo ankaŭ por la landoj de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo (KEI). Tamen ni ne timas ion tian, ke la rusa, lingvo de la plej granda ŝtato en nia komunumo, eklipsus la naciajn lingvojn. Sed, la komunikado, la interkompreniĝo, la lingva flanko de la daŭre fortiĝanta kunlaboro kiom da kostoj, strebadoj – kaj ne lastvice: kiom da malfacilaĵoj, eĉ riskoj signifas – tion pritaksi ne estas malfacile.

Kaj krome, ja nia vivo ne estas limita nur al nia ŝtataro: de tago al tago vastiĝas niaj kontaktoj ankaŭ kun la okcidentaj landoj. Se ni volas komerci kun ili, aŭ interŝanĝi kulturajn, sciencajn kaj industriajn spertojn (ja ni havas ankaŭ la motivon „ni donus", ne nur „ni ricevus"): la lingvaj malfacilaĵoj estas pli kaj pli premaj. Pro la neceso traduki eĉ niaj plej bonaj pensoj misformiĝas, malfruas aŭ restas hejme poreterne. – Tial ni devas kapti la okazon kaj aliĝi al la iniciato, kies sukceso multe helpus ankaŭ nin en la solvo de la komunikaj problemoj, kaj en nia propra ŝtataro, kaj inter la du ŝtataroj.

Ĉar – kvankam la nomo Eŭropa Parlamento ŝajne kaŝas tion – ekzistas ne unu Tut-Eŭropo, sed du Duon-Eŭropoj; kiuj en tre multaj demandoj estas malsamkarakteraj kun diversaj interesoj; tamen ili renkontiĝas en multaj aferoj, ekzemple ankaŭ tiu problemo – la komunikado inter ni – estas komuna.

Ni do sekvu la pensojn de sinjoro Chiti-Batteli, analizante ilin el nia vidpunkto!

1. Ĉu esti aŭ ne esti...

Tion, ke la fortiĝintajn kaj normitajn Eŭropajn lingvojn, reprezentantajn prestiĝajn kaj historie elformiĝintajn kulturojn, la angla forpuŝos kiel gepatrajn lingvojn el la ĉiutaga uzado, kaj sekve la popolamasoj estas devigitaj al definitiva lingvoŝanĝo, tion mi ne timas. Tamen la evoluon de tiuj lingvoj povos haltigi kaj limi, se – kiel komuna dua lingvo – la angla fariĝus la unusola lingvo de la teknika kaj scienca progreso; ĉar iu tavolo de la homoj – eble nur pro komfortamo – strebus alproprigi tiun plej altan kulturon jam sen la apliko de la propra gepatra lingvo.

Kaj pro tio, ĉar la gepatra lingvo – ĉiuj lingvoj, kiuj formiĝas pere de historia vojo kaj havas socian (mikrosocian) bazon – estas vere samtempe reprezentantoj de speciala pens- kaj vidmaniero: la plene-duone „alilingviĝinta" homaro tre baldaŭ komencus vidi per fremdaj okuloj, pensadi per fremda kapo; almenaŭ sur iu certa nivelo, en certaj temoj. Kaj tio estus komenco de iaspeca disduiĝo de konscio, de ia fremdiĝo disde ni mem.

Do tiujn, kiuj predikas pri la paca akcepto de la „konkreta situacio" kaj tiel nomataj „realaĵoj", t.e. konkeroj de la angla lingvo, tiujn estus grave informi vastronde pri tio, ke tiu ĉi procezo – eĉ se por la naciaj lingvoj ne – signifas por la historie formiĝintaj kulturoj, vid- kaj pensmanieroj vere la pereon, sed almenaŭ la repuŝon.

2. La situacio de Esperanto

Ni povas konsenti kun la aŭtoro de la studo: la latina povis fariĝi sendanĝere la komuna lingvo de kulturo tiam, kiam ĝi perdis sian „nacian" – fakte: potencan – fonon; kiam ĝi povis fariĝi ĉies posedaĵo, ĉar ĝi estis jam nenies. El la vivantaj lingvoj nur unusola ekzistas tia: Esperanto. Tamen, ke ĝi estus „logike planita, artefarita lingvo" – tio estas historia miskompreno. Plie verus karakterizi tiel, ke ĝi formiĝis pere de la selektado kaj unuiĝo de la komunaj ecoj de la vivaj lingvoj, liberiĝante de iliaj historie krustiĝintaj balastoj. Sed ja, same formiĝis el historie ekestintaj dialektoj, pere de konscia helpado, multe da laŭnormaj, t.e. naciaj literaturaj lingvoj.

Esperanto do enhavas la komunan el la propre specialaj ecoj, la ĝenerale homan el la naciaj. Eĉ se ĝi estas „farita", tamen ĝi neniel aperas kiel kontraŭnatura. Kaj ĉu fakte mankas la socio malantaŭ ĝi? Vere, mikrosocion ĝi ne havas; sed en la profundo tie troviĝas kune kun ĉiuj siaj akumulitaj nociaro kaj pensaro la „makrosocio": la homaro mem.

3. La nunaj baroj de la radikala solvo

La ĉefa estas eĉ ne psikologia. Ja tio, kion oni kutime nomas la „sociaj fortoj" de la angla, tio estas ververe la ekonomia-politika potenca prestiĝo de la landoj kun angla gepatra lingvo – antaŭ ĉio Usono kaj Granda Britio. Kaj anglomanio estas grimpado al tiu potenco, kaj la rekono de la angla kiel „mondlingvo": submetiĝo al tiu ĉi potenco.

Vere, ekzistas ankaŭ „psikologia baro": la homaj maldiligento kaj senrespondeco. Ja la granda plimulto de la rifuzantoj eĉ ne konas Esperanton, ili havas pri ĝi nur nebulajn suspektojn, akiritajn el tria mano. (Eĉ lingvistoj!) Kio koncernas ĝian artefaritecan karakteron, pri tio ni parolis jam. La konstato „sen ajna historia tradicio" veras nur tiel transformite: „sorbinta en si mem ĉiujn komunajn tradiciojn". – Kaj ĝuste Esperanto estas, kiu ebligas, ke ĉiu konservu en ĝi sian „nacian identecan konscion"; ĉar uzante tiun lingvon neniu pensadas per fremda kapo, sed per la propra, kaj esprimas sin ne en la lingvo de iu aliulo, sed en la propra, en nia komuna.

4. La prepartaktiko de la lingvistika kibernetiko

Esperanto vere povus havi tre gravan rolon en la baza preparo por la lernado de ĉiuj aliaj lingvoj. La unua fremda lingvo estas ja decida faktoro por la sekvaj. La unulingva homo pensas, ke lingvo kaj nociaro, eĉ nociaro kaj ĉirkaŭanta realaĵo havas la rilaton de la plej plena identeco unu kun la alia; do ke la mondo estas tia – kaj ĝi povas esti nur tia –, kia ĝin spegulas la gepatra lingvo. La unua fremda lingvo atentigas, ke ankaŭ la gepatra lingvo estas „nur lingvo"; ĝi deigas la vid- kaj pensmanieron disde la gepatra lingvo; ĝi liberigas el la absoluta dependeco de la gepatra lingvo. Tiusence

ĉiu fremda lingvo, se tiu estas la unua ellernota, fariĝas bazoprepara kaj helpa por la studo de ĉiuj ceteraj.

Sed la sukceso de la lingvolernado en enormaj mezuroj dependas de la motivoj: ĉu ĝi okazas kun ĝojo kaj ambicioj aŭ seneme. Kaj tiel jam tute ne estas egale, ĉu la lernado de la unua fremda lingvo estas facila aŭ ne, ĉu ĝi portos travivaĵon de sukceso aŭ tiun de fiasko. – Kaj el tiu vidpunkto povas konkuri kun Esperanto nek la angla kun historia ortografio kaj speciala artikulado, kiu estas kaj semantike kaj stilistike neellerneble multfaceta; nek la rusa, kiu postulas kiel bazan kondiĉon la ellernadon de la Cirilaj literoj. – Esperanto tute male: se ĝi certigas sukceŝtravivaĵon kaj pere de tio faras la lingvolernadon ŝatinda, tio multe helpus psikologie ankaŭ en la ellernado de tiuj lingvoj.

5. Longdaŭra solvo

La sorton de Esperanto, kontraŭe al Chiti-Batteli, mi ne ligus al tio „se iu Eŭropa Unuiĝo vere ekestus". Por tio ni devus atendi mondskalan, sed almenaŭ Eŭropan venkon de socialismo, ĉar ĝis ekzistas du mondsistemoj, dume tiaspeca strikta unuiĝo estas neimagebla. – Tamen, tute male, eblas imagi, ke la Okcident-Eŭropa Parlamento nomata „Eŭropa Parlamento", kaj niaflanke la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo samtempe instigu la enkondukon de Esperanto kiel komuna dua lingvo; ĉiu el ili ambaŭ sur sia propra kampo, tamen tiukaze jam ankaŭ en la kontaktoj. Tio ne malhavus efikon al la landoj de la tria mondo.

Ofte deklarata kaj sincera strebado estas flanke de la socialismaj landoj pace kunlabori kun ĉiuj landoj, sendepende de ilia socia ordo. La akcepto kaj instruado de ĝenerala kaj komuna dua lingvo estus samtempe rezulto kaj helpilo de tiu strebado. – Al la demando: ĉu la hungara registaro antaŭvidas konsultiĝojn kaj komunajn kampanjojn en la intereso, ke Esperanto kiel lingvo povu servi utile al la popoloj en kiel eble plej vasta rondo, la tiama hungara vic-ĉefministro, István Sarlós salutante la Universalan Kongreson en Budapeŝto, 1983, kiel Prezidanto de la Honora Komitato de UK, respondis: se la hungara registaro „ricevos pripensitan kaj respondecan proponon aŭ peton pri tio, kion en tiu afero fari estus celkonvene, tiu nepre estos objekto de la plej bonvola konsidero."

6. La proponita strategio

Por ekigi tiun movon kaj por ke en tiuj strebadoj ni povu reciproke subteni unu la alian, sur nia kampo – kaj kie estas eble, kunlabore kun la Esperanto-amika deputitaro de la Eŭropa Parlamento – riveliĝas kiel gravaj la sekvaj paŝoj:

1. Instigu Hungara Esperanto-Asocio, ke en la hungara parlamento, novelektita en junio 1985, fondiĝu grupo de la Esperanto-amikaj parlamentanoj.

2. Hungara Esperanto-Asocio prezentu proponon al la hungara registaro, ke

a) ĝi helpu, pli intense ol ĝis nun, la lernejan instruadon de Esperanto, kaj al tio diplomigon de Esperanto-fakaj instruistoj;

b) faru iniciatajn paŝojn por la plivastigo de la uzado de Esperanto en la kontaktoj kun la landoj de KEI; se eble eĉ pli vaste.

3. Hungara Esperanto-Asocio serĉu kaj kontaktu tiun organizon, al kiu eblus proponi, ke (kunlabore kun UEA, sed ne en ĝia kadro) ĝi estigu, unuigante la fakulojn de Orient- kaj Okcident-Eŭropo, komisionon, kiu

a) mezurus, ke Esperanto-lingvo laŭ ĝia vorttrezoro en kiuj fakoj konsidereblas jam funkcikapabla en la perado de la modernaj kulturo, scienco kaj tekniko, respektive sur kiuj kampoj ĝi bezonas evoluigon;

b) instigus kaj helpus ĉiulande la nacilingvan amasinforman laboron pri la realaj karaktero kaj valoroj de Esperanto.

Pri tio ni verâajne vane esperadus, ke la „mondlingvaj" popoloj (unuavice tiuj kun la angla gepatra lingvo) memvole kaj entuziasme abdikus pri siaj historie ekestintaj lingvaj privilegioj. Do ne necese ĝisatendi, ke ili paŝu, eĉ niajn paŝojn ni devas komenci ne ĉe ili. Se nur kelkaj landoj ekhavus interkonsenton, jam dividiĝus la ŝarĝoj de tradukado (oni devus traduki ĉiujn gravajn verkojn nur unufoje: al Esperanto), malakriĝus la zorgoj de la turismo (en iu ajn lando de la kontrakto sufiĉus koni la saman fremdan lingvon: Esperanton...)

Sed tion jam multope multfoje oni diris. Ni devus nun jam fari ion!

El la hungara: Imre Szabó

Jaroslav Seifert,

Nobel-premiito por literaturo 1984

Kanto Novjara

Dum tra novjara noktomez'
jam luno glitis ŝove
ne gapu lunon, knab', sen ĉes',
komencu vivi nove.

Ĉi tion ĉiam diras mi
en tiu nokt' sorĉfama.
Post jarkomenco, aĥ, fikci',
plu ĉio estas sama.

Mi kiel vivis, vivas plu
kaj velkas bonintenco,
el tuta bonintenca flu',
ne venas jam eĉ penso.

Al azenet' min ligas am',
ĝi en malriĉ' humilis
kaj membrojn al Jesuinfan'
per spir' varmigi iris.

Mi boni volis en konkur'
kun tiu dia besto
krom akvotrink' manĝanta nur
la kardojn en modesto.

Ĉi-jare ankaŭ mia spir'
Krist-manojn fridajn blovis.
Jesuinfan' kun trista mir'
medite lipojn movis:

„Kie vi estis ree, knab',
vol' via febla, vana! "
Hontiris mi kun klina kap'
de kripo Kristinfana.

El la ĉeĥa tradukis: Jiří Kořinek

Imre Szabó

Romanco

Per ĉiuj miaj kordoj
– diris la violono –
Per mia tuta memo
– diris la arĉo –

Sed la mano
ripozis kreteske
skiziĝante

Földeák János
(1910 –)

TROMPANTOJ

La posttagmeza somera suno verŝis sian lumon tra la kvarklapa fenestro kvazaŭ pligrandigante la murojn de la ĉambro. Árki mire ĵetis rigardon ĉirkaŭen. Ne la unuan fojon li faris viziton ĉe la familio de Misa Szabó, sed hodiaŭ taglume la loĝejo ŝajnis al li nova. Mirigis lin la konata meblaro; liajn okulojn frapis ties praktika uzebleco; eĉ ne unu el ili estis simpla objekto por servi kiel dekoro.

Sed estis surpriza por Árki en la loĝejo ankaŭ la okulfrapa seriozeco de sinjorino Szabó, ŝia preskaŭ rita mangesto, per kiu ŝi almontris la sidlokon. Kvazaŭ li estus nekonata, la unuan fojon akceptita fremdulo ĉi tie; jene traktis lin la virino.

– Vi ŝajnas mishumora, Anikó – li diris sidiĝante en la fotelo vid-al-vide al ŝi.

– Vere. Mi havas nenian kaŭzon por ridi.

– Ĉu eble pro mi? – riskis la demandon Árki kaj li ne deturnis la rigardon de sur la plaĉa, belforma virino.

– Tute ne temas pri „eble", Geoĉjo, sed fakte pro vi! – respondis sinjorino Szabó kun forta emfazo. – Tial mi petis de vi ĉi viziton inter kvar okuloj... Mi devas paroli kun vi!

En la vortoj de la virino sentiĝis deciditeco, kiu metis en embarason Árki-n: ĉu pro la elpatrujiĝo antaŭ dudek jaroj, kaj la ofendiĝo eĉ hodiaŭ ne estingiĝis en Anikó? Kaj kio ekvivigis ĝin nun aŭ kial ŝi silentis pri ĝi ĝis nun? De kiam li revenis el eksterlando – jam antaŭ tri semajnoj –, preskaŭ ĉiun duan vesperon li gastas ĉe la familio neniam rimarkante, ke Anikó rankoras kontraŭ li. Ankaŭ ŝia edzo Misa akceptis lin kiel malnovan amikon, kvankam tiutempe en kvindek ses pro virtuozeco, por pruvi sian amindumanlertecon, Misa konkeris de li Anikó-n. Nome, ankaŭ al li plaĉis la knabino.

Se li ne scius jam delonge, ekde la forlaso de la lando, ke Anikó post kelkaj semajnoj edziniĝis al Misa kaj de tiam ili vivas en geedzeco, eĉ, ŝia filino sin prezentis al universitato kaj ŝia filo venontjare jam estos bakalaŭro, sincerdire li ne estus vizitinta ilin. Rajte li esperis, ke post dudek jaroj li ne estos akceptita kun kolero. Vere, ili ambaŭ bonvenigis lin... Ĉu nur en Anikó reviviĝis ĝuste nun ia malnova ofendiĝo?

– Hieraŭ Misa diris al mi la novaĵon, ke vi petis la pluvalidigon de via restadpermeso – ekvoĉis la virino post kurta silento.

– Jes, mi petis – malpeziĝis Árki. Li pensis pri alia prirespondigo ĝuste pro la invito en duopo ĵare de Anikó kaj laŭ ŝia morna konduto li atendis ion alian. – Ĉu vi havas objeton, ke mi volas resti ankoraŭ?

– Mi havas motivon kontraŭdiri, Geoĉjo! Ĝuste pro tio mi volas ekkoni vian intencon koncerne mian filinon, kian intencon vi havas kun mia filino?

Árki triumfe ekridetis.

– Viaj okuloj estas eminentaj, vi tre rapide rimarkis ion pri ni ambaŭ – li flatis la virinon. – Georgeta estas via admirinda kopio. Vi renaskiĝis en via filino. Gastante ĉe vi, se mi ne vidus vin kaj vian filinon sciante, ke vi estas du personoj, mi supozus, ke vi estas Georgeta. Vi, la antaŭ dudekjara Anikó...

– Do, vi petis la pluvalidigon de la restadpermeso pro Georgeta – diris koncize la virino la kaŭzon de la entuziasmo de Árki.

– Se vi mem divenis la kaŭzon, estus sensence nei...

– Vere, nun jam estus superflue nei, sed min nur tio interesas, kian planon vi forĝas pri Georgeta? – postulis denove la virino.

Árki kontente ĝuis la situacion.

– Ho, havu paciencon kara Anikó! – li diris superece. – Ricevinte vian inviton mi ne pri tiaĵo kalkulis. Viaj vortoj trafis min neatendite... Iom pli poste mi volis priparoli la aferon kun vi kaj Misa...

La virino nervoze interdiris:

– Kaj kial vi ne prokrastis la aferon al pli posta tempo kun Georgeta? Kial ne post mia interparolado kun ŝi?

La eksterordinara rigida sinteno de Anikó ne ofendis lin. Per memrespekta voĉo li klarigis plu.

– Ĉar mi tion opiniis ĝusta, se unue mi reguligas la aferon kun Georgeta, unue ni devas kompreni unu la alian reciproke... Ankaŭ mi devis atendi por ne esti akuzata de vi kaj de via edzo pri senrespondeco.

– Ĉi-kaze via senrespondeco estas eĉ pli grava.

– Tial, ĉar mi atendis?

– Ankaŭ tial...

– Ĝuste male Anikó... Se mi ne rimarkas, ke Georgeta de tago al tago pli kaj pli simpatiadas kun mi, kredu al mi, mi ne estus kuraĝinta... Mi devis certiĝi! Kaj ĉar Georgeta parolis antaŭe kun vi ol mi kun vi, el tio ne tiru konkludon kvazaŭ mi volus teni la aferon en sekreto...

– Terura situacio! Terura! ... – saltleviĝis sinjorino Szabó kaj nervoze iris-reiris en la ĉambro. Poste ŝi haltis antaŭ Árki. – Eĉ paroli oni ne povas pri tio, ke Georgeta kaj vi! ... Tutsimple tio maleblas, ĉu vi komprenas? ... Mal-eb-las! ... – ŝi protestis akcentante la vorton ankaŭ per silabado.

La pasia eksplodo de Anikó ne timigis lin. Jam kiel knabino ŝin karakterizis kaprico kaj drameco.

– Mi tre bedaŭras, ke Georgeta anticipis nian komunan aferon – li diris sin ekskuzante. – Jene mi enfalis en tian situacion kvazaŭ mi volus ignori vin ambaŭ. Eĉ la supozo estas ofenda por mi... Mi tute ne komprenas vin Anikó, kial opinias vi ambaŭ terura kaj malebla, ke Georgeta kaj mi ne nur simpatias unu kun la alia, sed ankaŭ sentrilate...

– Ho, ne daŭrigu, ĉar vi frenezigas min! – ĵetis krion sinjorino Szabó kaj refalis en la fotelon. Ŝi apogis la kapon per la manoj.

Árki atendis, ke la virino trankviliĝu.

– Kaj Misa? Ĉu li samopinias pri ni kiel vi? – li demandis fidante la amikajn rilatojn kun Misa.

– Misa scias pri nenio! Georgeta parolis nur al mi pri la afero de vi ambaŭ – respondis sinjorino Szabó akravoĉe.

Árki la duan fojon malpeziĝis.

– Jene la situacio estas jam tute alia! Ĉu vi ne pensas Anikó, ke Misa alie opinias? – li avertis la virinon.

Sinjorino Szabó tiel subite sin klinis antaŭen kvazaŭ ĉi tion iam ŝi estus terminta.

– Vi ne povas edzinigi vian filinon! – ŝi kriis denove pasie.

Árki nevole ekridis.

– Ej Anikó, ne igu vin ridinda! Inter Georgeta kaj mi la aĝdiferenco estas nur deknaŭ jaroj. Ĉi fakton ni jam priparolis unu kun alia. Ĉi-jare mi atingos la aĝon de kvardek jaroj; ĉu eble vi prenas min por senpova kadukulo? Oni jam geedziĝis kun pli granda aĝdiferenco...

– Sed tio maleblas por vi ambaŭ, Geoĉjo! Maleblas! ... Absolute maleblas! ... – ripetis senĉese en plena ekscitiĝo sinjorino Szabó. Dume ŝi senhalte mansvingis.

– Tion diras vi, Anikó, sed min interesas ankaŭ la opinio de Misa. Tion mi volas aŭdi el lia buŝo! – obstinis Árki.

– Vane vi parolos kun Misa, eĉ tiam estos maleble! Kaj se vi parolos kun li, la afero finiĝos per familia tragedio! ...

– Ne troigu, Anikó! ... Kial okazus familia tragedio, se Georgeta kaj mi...?

Sinjorino Szabó ne lasis fini la frazon.

– Ĉar la patro de Georgeta estas vi kaj ne Misa! – ŝi kriis malesperiĝe al Árki kaj eksplodis je ploro. Apenaŭ ŝi povis daŭrigi. – Neniu scias tion, nur mi! Kaj nun ankaŭ vi! ... Jen la vero, Geoĉjo! Nun vi jam scias. Vi devigis min.

Árki embarasite silentis post la aŭditaĵoj. La plorsingulto de Anikó eĉ pli konfuzis liajn pensojn ol la senco de la vortoj.

– Geoĉjo, eĉ la nomo de mia filino, Georgeta, ne estas per hazardo. Ĝin mi savis de vi por mi. Almenaŭ la simileco de viaj nomoj konservu la sekreton, ke vi ambaŭ apartenas unu al la alia... Per Georgeta mi trompis ne nur Misa-n, sed ĉiun, kiu nin konas. Tion mi faris ne el ruzo, sed pro timo. Mi estis deksepjara, sensperta kaj mi timis, terure mi timis la honton. Tion mi volis eviti kaj prefere mi elektis la eblon de trompo. Sed nun, ankaŭ post dudek jaroj, komprenu Geoĉjo, ne nur mi estas respondeca pro la trompo – vane mi metus ĝin sola sur min –, ankaŭ vi estos respondeca de nun. Kiel vi volas dividi la respondecon kun mi, se entute vi volas dividi ĝin, tio dependas de vi – diris ankoraŭ la virino baraktante por sufoki la ploron.

Árki kun elstariĝintaj okuloj, tutkorpe ekscitite rigardis Anikó-n. Eĉ nun li ne povis konscii kion li aŭdis.

Intertempe la virino venkis la malesperiĝon.

– Ĉu eble vi dubas pri mia parolo? – ŝi demandis atakvoĉe.

– Plie mi ne komprenas ĝin, Anikó – konfesis Árki.

– Kion vi ne komprenas?

– Ke Georgeta estas mia filino...

– Se vi ne komprenas, mi memorigos vin pli detale – diris la virino per firma voĉo. – Ĉu vi scias, kiam vi vojaĝis en Aŭstrion? Kiun tagon?

– Jes Anikó, la tridekan de oktobro en kvindek ses.

– Vi precize memoras. Ankaŭ mi neniam forgesos tiun tagon, eĉ ne tion kiel naŭze ni kverelis unu kun alia, ĉar mi ne iris kun vi. Jes, vi veturigis Laci-n Berze kun vi sur via motorciklo.

– Kiu post du semajnoj pentis kaj repatrujiĝis.

– Kaj li tuj serĉis min kun via al mi skribita letero, per kiu vi

sciigis min pri via vojaĝo en Svisujon kie vi restos definitive. Via letero trafis min kiel kapobato, ĉar antaŭ la alveno de Laci Berze, mi eksciis kelkajn tagojn antaŭe, ke mi estas graveda de vi... La konscio pri ĝi estis terura. Mi kuregis al miaj amikinoj: kiu konas fidindan kuracisto-konaton, kiu helpus al mi? Eĉ ne unu el ili konis tian kuraciston. En mia malesperiĝo mi volis fuĝi al vi, sed tiutempe la limgardado estis jam restarigita. Intertempe Misa venis vizite por min konsoli, ĉar vi forlasis min. Vi povas kompreni, ke mi tiel alkroĉiĝis al Misa kiel dronanto al savzono, ja mi sciis jam delonge, ke li min amas, nur mi ne prenis tion serioza, mi plie kredis al vi. Plie, ĉar vi min erarigis per via perfortemo.

– Mi ne perfortis vin, Aniko! – protestis Árki. – Jam la unuan fojon vi kuŝiĝis kun mi memvole kaj ankaŭ pli poste ĉiam...

– Ne timu, mi ne neos tion – diris mokvoĉe la virino. – Vere, vi ne perfortis min. Eĉ min petegi vi ne bezonis, ĉar mi fidis vin, ke vi min amas. Sed ĉio ĉi jam apartenas al la paseo same, ke tiam mi tuj transloĝiĝis al Misa kaj ni geedziĝis. La ceteron vi jam povas diveni. Ankaŭ mian trompon por defendi min...

Árki denove embarasite moviĝadis enfotele. Ek- kaj ekkaptis lin la dubo, kiun eĉ la logiko de Anikó ne forigis. La dubo pikis lin demandi:

– Kiam naskiĝis Georgeta? Diru precize ankaŭ la tagon...

La virino konjektis la motivon de la demando, ĉar ŝi pike respondis:

– Volonte! Ja decas, ke la vera patro sciu la naskiĝtagon de Georgeta... La dudek trian de majo vespere je la naŭa. Ĉu mi montru al vi la paperojn?

– La dudek trian de majo mil naŭcent kvindek sep, ĉu ne? – Árki enpense komencis kalkuli laŭ la fingroj la monatojn. – Oho Anikó, ja Georgeta povas esti ankaŭ antaŭtempe naskita! – li diris triumfe kaj ne senkaŭze. – Ne prenu min idioto! Tion mi scias pri la infan-naskiĝoj, ke la naskoj oftas en la sepa monato – li kompletigis cinike sian opinion.

Atendante similan „elturniĝon", sinjorino Szabó memfide respondis:

– Vi pravas Geoĉjo, tiaj naskoj tre oftas. Feliĉe, ke ankaŭ Misa sciis tion... La ofteco de la antaŭtempaj naskoj estis mia savo. Krome tio, ke la pezo kaj matureco de Georgeta estis sufiĉe sub la meznombro, do oni kredis la antaŭtempan naskon. Sole mi sciis, ke la korpa nematureco de Georgeta estis la konsekvenco de miaj malfacilaj vivkondiĉoj dum la gravedeco. La magra, nesufiĉa nutraĵo kaj mia tiama laboro en la fabriko. Kaj la konstanta timo pro la eventuala senmaskigo.

Árki nun ne trovis breĉon en la logiko de konfeso de la virino, per kio li povus iele refuti ŝiajn asertojn. Jam ne ŝajnis al li triumfo kiel iam, ke li konkeris Anikó-n al si de Misa, kiu estis tiam enamiĝinta ĝis la oreloj al ŝi kaj la apenaŭ dekses-jara knabino fariĝis lia amantino. Kaj Anikó tamen repuŝis lian peton en kvindek ses veturi kun li en Aŭstrion.

– Post la naskiĝo de via filino tial mi entreprenis tuj novan gravedecon – daŭrigis sinjorino Szabó –, ke mi donu kompenson al Misa pro Georgeta, se mia trompo iel tralikiĝus... Ke mi naskis filon, la feliĉo de Misa iĝis pli kompleta kaj per paso de tempo mi trankviliĝis. Unuparte pro pentofaro, aliparte por danki al Misa, ke mi ne trompiĝis pri li, eĉ mi sincere enamiĝis al li klopodante fariĝi bona edzino kaj parulino. Vi povis konvinkiĝi, ke Misa eĉ hodiaŭ senŝanĝe amas min... Nun vi havas eblon ĉion detrui, Geoĉjo! Car se vi ne kredas al mi koncerne Georgeta-n, mi demaskos nian junaĝan amrilaton kaj nian trompon! ... Ne, mi tute ne povus prisilenti, ke vi edzinigos vian propran filinon. Tion neniam!

La minacanta protesto nun vere ekŝancelis Árki-n. Nun li klare komprenis la sencon de la vortoj de Anikó, sed en la konsterniĝo lia korinklino por Georgeta ne nobliĝis en patran amsenton. El lia subita disreviĝo fontis malamo. Eĉ la beleco de lia filino heredita de ŝia patrino faris malan efikon al li. La viro sobriĝante el la trompiĝo preskaŭ malamike atakis Anikó-n.

– Kion vi diris al Georgeta?

– La duonon de la vero! – respondis decidvoĉe sinjorino Szabó. – Nur tion, ke ĝis via elpatrujiĝo vi amindumis min kaj mi fidis vin, ke nia rilato ne ŝiriĝos. Ke nin ligis unu al la alia krom la amindumado ankaŭ alio; pri nia amrilato mi silentis, ĉar unue mi volis kun vi...

– Kaj Georgeta? – malpacienciĝis Árki.

Anikó eĉ nun senhezite respondis:

– Georgeta-n konsternis tre forte, ke vi min forlasis sen vorto kaj adiaŭo.

– Kompreneble vi prisilentis, ke mi insiste petis vin veni kun mi, sed vi rifuzis – voĉmurmuris Árki.

– Eĉ nun ne estas malfrue senkulpigi vin per tio! ...

La akra rebato de la virino trafis Árki-n kiel kapobato, li saltleviĝis. Dum kelkaj momentoj li staris defie antaŭ ŝi, poste ekhontis. Sed ne tiom, ke li estus bremsinta sian emocion.

– Tamen tute ne pensu Anikó, ke vi estas heroo! ... Vi estas malkuraĝulino, ne heroino! Malkuraĝulino, malkuraĝulino! – li kriadis kolerege, poste sin turnis sur la kalkanoj kaj ĉe la hastado ek- kaj ekpuŝiĝante plurfoje al la mebloj, li elkuris el la loĝejo. Nur la eĥiĝanta klakado de la fermiĝintaj pordoj akompanis lin.

La konduto de Árki por longaj minutoj mutigis sinjorinon Szabó, precipe la mallaŭda kalumniado. Ne atendante de Árki entuziasmon por ilia filino, tamen ŝi esperis de li homan komprenon kaj dankon pro la ne ĉiutaga patrina faro en la defendo de ilia komuna sekreto, kiun ŝi estis nun devigita perfidi. Longe ŝi sidis frakasita pro la trompiĝo, poste iris al la fenestro kaj malfermis ĉiujn kvar klapojn por freŝigi la aeron post Árki.

Sinjorino Szabó neniam atendis tiel ekscitite sian edzon kaj filinon kiel nun. La brutala mokado kaj la ofenda foriro de Árki ne senkaŭze maltrankviligis ŝin; kaj se tamen en sia furiozo li serĉis ilin kaj kiu scias, kion li diris al ili pri ŝi, kiajn kalumniajn mensogojn? Sed ŝi rimarkis pri la konduto kaj animstato de Misa kaj Georgeta nenion angoran. Ili enpaŝis la loĝejon kaj kun la tradicia afableco salutis ŝin. Misa kiel ĉiam kun ludema brakumo ŝin kisis; ankaŭ Georgeta delikate donis kison al ŝi kaj kiel kutime tuj scivolis pri la vespermanĝo. Tamen Anikó ne kuraĝis interesiĝi pri Árki. Por maski sian maltrankvilon, kun duobla rapideco ŝi primetis la tablon en la kuirejo por vespermanĝo.

Misa babiladis pri la dumtagaj travivaĵoj, manĝis bonapetite, dum Georgeta senridete silentis. Tio vekis la suspekton de sinjorino Szabó, ĉu povas esti, ke Georgeta sekretigas ion per la silentado? Eble Árki tamen parolis kun ŝi? Tial kaptis ŝin angora sento ĉe la ektintado de la telefono.

Vane ŝi klopodis, Misa sidis pli proksime al la pordo. Eĉ per mangesto li residigis ŝin, eliris por levi la aŭdilon en la ĉambro.

La telefonparolado ne igis Georgeta-n speciale scivola. Kvankam sinjorino Szabó streĉite atentis, pro la distanco ŝi ne aŭdis klare la vortojn de sia edzo, nur tion ŝi perceptis, ke li parolas kun Árki. La de temp' al tempa rimarkebla konsterniĝo en la akcento de Misa, poste lia ekkolero, pli kaj pli nervozigis ŝin: kion diras Árki, ke en la respondoj de Misa fojfoje sentiĝas ankaŭ furiozo? Vidante la senŝanĝan indiferenton de Georgeta, enpense ŝi pretigis sin por la plej granda malbono: la filino scias ion, ŝi nur klopodis vuali ĝin. Eĉ tio ne povas esti per hazardo, ke Árki tiam telefonas, kiam Misa kaj Georgeta jam venis hejmen.

Sinjoro Szabó en plena ekscitiĝo revenis al la vespermanĝo.

– Prezentu al vi, oni ne pluvalidigis la restadpermeson de Árki! Pro tio li ekkoleris, tuj enpakis ĉion kaj hodiaŭ li forvojaĝos. Tion li telefonis! ... Li vokis nin el la flughaveno petante pardonon, ke alimaniere li ne povis diri adiaŭon al ni. La aviadilo startos post unu horo... Ankaŭ vin ambaŭ li salutas...

La patrino kaj la filino senvorte interrigardis: sinjorino Szabó jam kun malpeziĝinta koro, sed eĉ nun ne kun absoluta trankvilo. Ŝi timis la eksplodon de Georgeta pro ŝia sento-trompiĝo. Sed Anikó eĉ surprizon ne vidis sur la vizaĝo de sia filino, kiu kvitancis la eventojn indiferente per kurtaj kapbalancoj kvazaŭ ŝi per tio reciprokus la angoran rigardon de sia patrino atente sur ŝi ripozantan.

Misa ne rimarkis la silentadon de sia edzino kaj Georgeta, tiom li pelis sin en la bedaŭron pro la subita forvojaĝo de Georgo Árki.

– Nekompreneble, ke li ne ricevis la pluvalidigon! Same estas nekompreneble, kial li ne apelaciis kontraŭ la rifuzo, ja ankoraŭ kvin tagoj staris je lia dispono? ... Almenaŭ se ĝis tiam li estus restinta ĉi tie – li indignis laŭte.

El la hungara: István Nagy

Radioelsendoj el Hungario

La Esperantaj elsendoj de la 3-a programo de la Hungara Radio estas aŭskulteblaj dimanĉe, je la 13-a horo kaj 05 minutoj. La kvinminutaj elsendoj enhavas turismajn kaj movadajn informojn. Ili estas kapteblaj nur pere de modulitaj frekvencoj (ultrakurtonde) laŭ la megahercoj: 67,04; 67,97; 68,24; 68,36; 68,48; 68,72; 69,38; 70,10; 70,43; 70,64 kaj 72,08. Aŭdebla en Hungario kaj en la apudlimaj regionoj de la najbaraj landoj. Nepre skribu al la redakcio: Radio Pécs, Esperanto, Pécs, Pf. 200, Hungario, H-7601.

PANORAMO

Parolas Imre Pozsgay, ĝenerala sekretario de la Popolfronto

Kongresis Popolfronto

Inter la 13-15 de decembro 1985 okazis en Budapeŝto la 8a Kongreso de la Patriota Popolfronto. Tiu ĉi plej amasa socia-politika movado unuigas en siaj vicoj ĉiujn popoltavolojn, kiuj deziras labori por la progresigo de sia patrujo. Konforme al tio, en la Popolfronta movadc kune partoprenas komunistoj kaj anoj de religioj, hungaroj kaj alinaciaj civitanoj de Hungario, laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj.

En la Kongreso la hungaran Esperanto-movadon reprezentis d-ro Endre Baráth, ĝenerala sekretario de HEA, kaj d-ro Vilmos Benczik, ĉefredaktoro de HV. La Kongreso elektis d-ron Vilmos Benczik membrc de la Nacia Konsilio de la Patriota Popolfronto.

La Eiffel-meblovendejo

Kurioza meblovendejo

En la centro de Budapeŝto, proksime al la sidejo de Hungara Esperanto-Asocio, malfermiĝis nova meblovendejo – jen informo ne aparte interesa krom por tiuj, kiuj nuntempe volas aĉeti meblojn. Tamen, ĝi ne estas ordinara vendejo, ĉar ĝi instaliĝis en ejo, kies planojn siatempe faris Alexandre Gustave Eiffel, kies ĉefa kreaĵo estas la mondfama Pariza turo. Eiffel cetere partoprenis ankaŭ en la projektado de la Budapeŝta Okcidenta Stacidomo kaj de la Ponto Margarita.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Parlamenta kunsido

La 20an kaj 21an de decembro en la Parlamentejo okazis la vintra kunsido de la Hungara Parlamento. La deputitoj akceptis amendon al la konstitucio, kaj al la leĝo pri balotado, pritraktis kaj akceptis la 7an kvinjaran planon de la hungara ekonomio (validan por 1986-1990), kaj ankaŭ la buĝeton de nia ŝtato por 1986.

Estis akceptita ankaŭ leĝo pri la financoj de la komunumaj konsilantaroj: tiu leĝo disponigas pli da rimedoj al la lokaj organoj de la administrado.



La Parlamentejo

Koncerto por la vivo

Fine de novembro la plej elstaraj figuroj de la hungara rock-muziko aranĝis grandan koncerton en la Sporthalo „Budapest", kies profiton ili transsendis al konto, kiu kolektas la helpojn de hungaroj por la malsatantoj en Afriko.

La koncerto estis la plej ampleksa kaj parada, iam okazinta en Hungario. En ĝi partoprenis ĉiuj ŝatataj ensembloj de la hungara junularo, kaj tiel ĝi altiris tre grandan publikon.

Sceno el la koncerto

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

I. I. PALKIN (1898–1985)

Esperanta movado en nia lando havis grandan perdon. La 13-an de Aŭgusto 1985 j. en Moskvo post longdaŭra malsano forpasis la elstara kaj famekonata veterano-esperantisto k-do PALKIN I.I.

La kremacio de li okazis la 16/VIII-85 en Moskva Centra Krematorio, kiun ĉeestis multaj Moskvaj gesamideanoj.

Dum multaj jaroj k-do Palkin I.I. estis por USSR peranto de abonado por Esperantaj eldonaĵoj (ankaŭ de HV). Li estis kunligita kun multaj eksterlandaj eldonejoj kaj asocioj. La akurateco de liaj kunligoj kaj plenumado de ĉiuj mendoj, donis al li ĝeneralan famon inter gesamideanoj, kiuj estis akurate priservataj de li.

Lastatempe en lia granda laboro al li sukcese helpis lia edzino (ankaŭ esperantistino) k-dino Erjuhina L.V.

Por ekonomikistoj

Renovigis sian agadon la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

Inter la konstatitaj urĝaj taskoj por la Fakgrupo estas tiu de kunordigo de la aperigo de fakaj artikoloj pri la ekonomia situacio en apartaj landoj, cele al granda plioftigo de tiaj artikoloj. La Fakgrupo aparte serĉas kontaktojn kun verkontoj, promesante fakan helpon laŭpove.

En la komerca kampo, la Fakgrupo jam starigis la bazon de „peradservo", ebligante kontaktojn inter tiuj, kiuj „serĉas" varojn de ĉiu speco. Potencaj uzontoj de tia peradservo estas simile konsilataj sin turni al la konstanta adreso kun helpopeto.

Ankaŭ en la komerca kampo, la Estraro esploras la eblecojn plioftigi reprezentadon de Esperantistoj en specimenfoiroj, kaj aparte bonvenigus proponojn tiurilatajn.

Adreso de la Fakgrupo estas ĉe Mondkomerca Eldonejo Esperantista, P.D. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando.

„Velura Sezono" en Jalto

En la Krimea urbo Jalto (Sovetio) ekde 1981 ĉiujare fine de septembro oni aranĝas en la kadroj de Semajno de Internacia Amikeco esperantistan kulturan aranĝon, nomatan „Velura Sezono".

Ĉijare Jalto akceptis ĉ. 70 esperantistojn el sep respublikoj de Sovetio. Prezentiĝis en la aranĝo esperantistaj muzikistoj, kantistoj, okazis arkeologia ekskurso kaj aliaj interesaj programoj.

Omaĝo al veterano

La 12-an de oktobro 1985 la Odesa Esperanto-klubo „Blanka Akacio" festis la 90-jariĝon de sia membro Ilja Arkadjeviĉ Vagramov. La aĝa, sed vigla samideano ankoraŭ diligente partoprenas la movadan vivon, kaj rakontas al la pli junaj generacioj pri siaj riĉaj vivospertoj. S-ano Vagramov post la Oktobra Revolucio dum certa tempo servis kiel soldata gardisto antaŭ la kabineto de Lenin.

Hungaraj studentinoj per kantado gajigas la etoson de la kunveno en Kafe Molodjoĵnoje (Foto de I. Stepanov)

Inter Odesaj esperantistoj

La ĉefredaktoro de HV en septembro kaj oktobro pasigis ofice ses semajnojn en la soveta urbo Odeso. Tie li havis abundajn kaj amikajn kontaktojn kun la Odesaj esperantistoj, faris prelegon pri HV kaj la libroeldonado de Hungara Esperanto-Asocio. D-ro Benczik faris ankaŭ propagandan prelegon pri Esperanto en Kafe Molodjoĵnoje (Junulara Kafejo), kie ĉ. 50 gejunuloj ricevis informojn pri la Internacia Lingvo kaj ĝia movado.

Por gajni novulojn

Atentovekan ekspozicieton oni faris en la 214-a Industria Faklaborista Instituto de Gyöngyös por furorigi nian mirindan lingvon kaj varbi novajn membrojn por la E-klubo de lernejo, kiu funkcias jam dum la dua studjaro. Tiu aranĝaĵo estis malfermita dum la tuta monato septembro, kaj montris bazan bildon pri Esperanto.

La ekspozicieton aranĝis József Fórizs kaj László Knáb.

Sovetaj esperantistoj – atentu!

En oktobro kaj novembro 1985 laŭ la mendo de Mejknjiga Hungara Esperanto-Asocio pere de la hungara eksporta firmao „Kultura" liveris Esperantajn librojn tre grandkvante al Sovetio. Laŭ la informoj, kiujn ni havas, tiuj libroj iris en la Drujba-vendejojn de la sekvaj urboj: Kiev, Leningrad, Minsk, Moskva, Novosibirsk, Rostov na Donu kaj Vilnius.

Antaŭvideble tiuj libroj aĉeteblos en la vendejoj proksimume tiam, kiam oni ricevos tiun ĉi numeron en Sovetio. Estas konsilinde, ke esperantistoj en aliaj urboj petu la helpon de siaj amikoj en la supre nomitaj urboj, por ke la libroj kiel eble plej baldaŭ elĉerpiĝu, kaj Mejknjiga remendu. Antaŭdankon!

REVUO DE REVUOJ

Kiam mi tajpas ĉi tiujn liniojn, en Budapeŝto jam kunsidis la Eŭropa Kultura Forumo, kies grava celo estas interalie la alproksimigo de la apartaj naciaj literaturoj (ne nur beletraj) *al la aliaj.* La ŝlosilon de tiu – komplikega – problemo ni posedas, tion ni bone scias. Sed ĉu ankaŭ la delegitoj, la interkonsenti rajtigitoj? Sur la tablo troviĝos ankaŭ diskutpropono pri Eo, signifa precipe por konigi tiun ŝlosilon, „veran perilon de kulturo". Belga profesoro uzis tiujn vortojn (UN KAJ NI, 38.) en revuo de Unesko, kun kuraĝe verdiraj prijuĝoj – ĝuste nun adreseblaj al la Forumo: „kun la ebla escepto de angleparolantaj socioj, *ĉiuj aliaj nacioj profitos* el la neŭtrala planlingvo; la saĝa vojo estas uzi E-on kiel universalan lingvon."

Ne balasti E-on, sub titolo de precizigo – estas kvazaŭ moto de diverstemaj artikoloj en diversaj gazetoj. Tiun bone funditan postulon teni eĉ slogane super nia gazetaro jam estus tre bonvene. Kaj en VELO, kaj en THE WORKER ESPERANTIST (343.) B. *Golden* trafe aludas kaj frape rifuzas novajn sufiksojn de bonintencaj proponintoj inventemaj formojn „unu pli bizarajn ol la alia". Jes, nenio pli facilas, kaj pri tiaj ankaŭ W. *Prent* aldonas mokon karikaturan, pronomaregon.

Aliloke, en ESPERANTA FINNLANDO (4.) la temon tuŝas Osmo *Buller* neeviteble en kritika studo pri la romano de K. *Piĉ* (La Litomiŝla tombejo). Ke li vidas en la romano negativan Esperantismon, indan – ne nur alegorie – je tombo, abunde priskribita en la ofte virtuoze pentranta verko, tion nun ni lasu flanken. Ankaŭ tiun konstaton, ke en ĝi la esperantista fremdiĝo iras ĝis la fino. Sed al tio ligeblas, ke laŭ Buller la lingvaĵo de la aŭtoro same pruvas seneliran fremdiĝon. Tiu protesto alcelas ne nur la abundajn duobligojn de E-aj vortoj, sed eble pli forte la aron de fremdaj novsufiksoj, kies pleja argumento volas esti la precizigo de l' sencoj. Senfina vojo! – sur ĝi kun pezaj balastoj devus troti nia flugilojn perdinta Pegazo, nia literaturo.

Pri ortografio de propraj nomoj verkis studon A. *Vaitilaviĉius* (HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO, 5-7.), kiu grandparte koncernis geografiajn nomojn, elvokis kompreneble vastan diskuton (8.), kiun eĉ etparte ne eblas ĉi tie resumi. En la beletro – oni konsentis – konvenas uzi nur E-litere transskribitajn nomojn, kiel rajte proponis R. *Eichholz,* sed aliloke oni almenaŭ ne almetu E-finaĵojn al originalaj (lok)nomoj (streketojn!). Apartajn sufiksojn, por diversgrade diferencigi nomojn de uloj aŭ landoj, oni ne subtenis, la tiela komplikigo estus ja troa.

Multaj latinliteraj nomoj troveblas en LA JAPANA BUDHANO (211.) en la grandparte japanlingva teksto, tamen ĉiuj per *originala* ortografio. Interese: la ĉinaj, tibetaj nomoj kaj esprimoj ricevas en la revuo latinliteran transskribadon, evidente laŭ (ia) prononco. Cetere en tiu ĉi numero *Dazai* huzimaru verkis longan studon pri la hungara orientalisto, S. *Kőrösi Csoma,* ankaŭ pro liaj budhanaj rilatoj kaj pro la E-libro pri lia vivo.

Ĉi-jare, precipe aŭtune bedaŭrinde okazis grandaj tertremoj (Meksikio, k.a.) en diversaj regionoj de nia Tero. Kvazaŭ koincide, SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ (2.) en junio publikigis i.a. sciencan studaĵon de Daniela *Deneva,* kiu profunde traktas la eblojn kaj metodojn pri *prognozado* de tertremoj. La bulgara sciencistino klarigas aparte la nuntempe sekvatajn tri metodojn, montras la esploradon pri la antaŭsignoj, ties fidindecojn ankoraŭ tre variajn, eĉ novan, eble surprizan direkton: aktive efiki por forigi la streĉitan ter-energion. Mi provas diri, ke sen streĉita mensa energio eblas sekvi ŝian prezentadon, ne ĉiutagan.

Post pravaj kritikadoj, LA VOĈO de HANDIKAPULOJ (1-2.) atingis jam sin mem. La modeste, tamen bone aspektanta revuo, laŭ multaj flankoj okupiĝas, konsilas, kuraĝigas kaj distras en sia specifa tereno. Kaj certe tion bezonas handikapuloj, tian brave, kun amo kaj lerto redaktitan *propran* gazeton, kiu nepre meritas ampleksan subtenon de la feliĉaj „eksteruloj"! Eble ili dividiĝas *laŭ verdaj tipoj,* kiujn la gaja „sociologia" kategoriado en OVO (5.) priskribis (kaj desegnis) per satira-sprita plumo, per altiraesprima lumo. Nia tendaro verŝajne neniam ĉesos prezenti temaron al pik-okulaj pafistoj, prave, kaj eventuale edukcele. Brave.

Eble ankaŭ iri plu sur tiu vojo – la celo iĝas tiam pli nebula, kompreneble, same kiel ĉe montara vojo descendanta en humidan valon. Moknomojn inventi, mokas I. *Nagy* kaj aliaj en la humurbuŝa LA KANCERKLINIKO (35.) laŭ mia kompreno rifuzeme – povas esti facila ludo, precipe se temas pri popoloj... Ĉu indas stimuli tiun ne sendanĝeran ludon, ili ŝajnas demandi. Mi devas konsenti: malinda afero, tre-tre fora de la internacieco. Prefere forlasu ĉi tiun ludon.

Ervin *Fenyvesi*

István Nemere

LA TREZORO

6. La liberiganto

– Vi ja ne povas heziti – diris onklino Gracia – Nun jam vi riskas la vivon de Laŭra!

– Vi pravas, onklino. Laŭra por mi valoras pli multe ol ia ajn trezoro.

– Do, iru – la virino transdonis al li la papereton kun la teksto de la testamento. Petro ĝemis kaj malrapide forlasis la loĝejon.

Rapide li aliris perpiede la placon Marcus. Li estis tiome ekscitita kaj samtempe malgaja, ke tute li ne rimarkis, ĉu iu lin postsekvas? Sur la stratoj viglis la trafiko, sur la bulvardoj fluis veraj aŭto-riveroj. Petro post ioma hezito trairis la placon kaj haltis ĉe la fontano.

* *

– Nun tre multe da aferoj dependas de vi – diris la svelta, larĝŝultra blonda junulo. Li staris angule de la sama placo. Kvin liaj kunuloj aŭskultis lin atentemaj. Ĉirkaŭ ili svarmis la trafiko. – Kiam vi ekvidos la celon, tuj algluiĝu, nerimarkitaj. Sed ĉiu el vi faru tion memstare, aparte de la aliuloj. Dume ni interkontaktiĝos!

Petro jam pli ol dudek minutojn atendis ĉe la fontano. Apude senĉese fluis la aŭtoj. Li decidis: li estos malmola! Li batalegos por Laŭra – kvankam li eĉ ne konjektis, kiel kaj kion li scipovus fari kontraŭ la banditoj.

Poste ĉio okazis tre rapide. Nigra aŭto bremsis rande de la trotuaro, sed ĝi verdire eĉ ne haltis. Tra la malfermita fenestro eliĝis mano faranta movon postuleman. Petro volis diri ion, sed la nekonato jam prenis la paperon el lia mano. La junulo nur tion vidis, ke en la aŭto sidis du viroj. Poste la aŭto fulmrapide foriĝis.

Kiam Petro „vekiĝinta" turnis sin kaj postrigardis la aŭton, ĝian ciferplaton jam kovris la sekvaj aŭtoj. Li malbonhumora ekiris hejmen; nur la espero restis por li, ke la banditoj plenumos sian promeson.

* *

Ekstere jam delonge estis vespere, kiam Laŭra aŭdis brueton el la direkto de la pordoj. En ŝia malliberejo estis malhele. La juna virino lacega sidis sur la seĝo. El la ŝnuroj ŝi ne povis liberigi sin – kvankam ŝi longe provis fari tion. Ŝi tre timis, ke la banditoj revenos kaj... Ĉu Petro konsentis kaj pagos por ŝia libereco? Ĉu okazas io rilate ŝian liberigon, aŭ oni faras por tio nenion?

Ŝi aŭdis do brueton ĉe la pordo. Ŝi komencis atenti. La nekonata homo aganta aliflanke verŝajne ne apartenis al la grupo de la banditoj – li moviĝis tro silente, tro singarde, kvazaŭ timanta, ke oni lin rimarkos. Li metis en la seruron ok aŭ dek ŝlosilojn – finfine la lasta turnis la seruron. Ombro glitis en la ĉambron...

– Kie vi estas, sinjorino? – demandis iu viro flustranta.

– Ĉi tie. Oni min ligis al seĝo. Kiu vi estas?

La nekonato ne respondis. Li trovis la seĝon, kaj la virino preskaŭ tuj sentis, ke ŝiaj ligiloj defalas. Kvazaŭ ŝin tuŝis sorĉisto... Jam ŝi estis libera. La nekonato moviĝis decideme; li kaptis ŝian brakon kaj kondukis ŝin al la pordo. Poste ili iris sur la malhela koridoro. Ĉe la angulo, sur la ŝtuparo kuŝis senmova viro. Laŭra konjektis: tiu gardis sian ĉambron kaj li antaŭe renkontis sian liberiginton...

– Ĉu vi mortigis lin?

– Ne. Mi batis lian kapon, kaj li svenis.

Ili jam staris sur mallarĝa strateto. Ankaŭ ĉi tie estis malhele, Laŭra ne vidis la vizaĝon de la viro. Li turnis sin al la fino de la strato:

– Iru tien, sinjorino. Ĉe la stratangulo estas kafejo, antaŭ ĝi haltejo de taksioj. Multan feliĉon!

– Da... dankon, sinjoro – diris Laŭra, sed post sekundo ŝi jam vane ĉirkaŭrigardis. La viro malaperis. Kvazaŭ lin englutus la tero. Ŝi nenion komprenis el ĉio ĉi, sed ŝi sciis: ŝi ne povas resti plu ĉi tie. El malantaŭ la nigraj muroj kvazaŭ observus ŝin malamikaj rigardoj. Se ŝi rememoris la banditojn kaj iliajn minacojn, tuj denove ŝi ektimis. For, for de tie ĉi...!

Kurante ŝi ekiris al la stratangulo...

* *

... kaj anhelante aliris la etaĝon, metis sian fingron al la butono de la sonorilo kaj puŝis, puŝis ĝin tiel longe, ĝis oni malfermis la pordon.

– Laŭra! – kaj la brakoj de Petro ĉirkaŭis ŝin. La virino nur tiam kredis vere, ke ŝi savis sin el la terura danĝero. Ŝi sciis: nur nun ŝi estas sekura.

* *

Sekvonttage matene Laŭra kaj Petro pertelefone aranĝis ĉe siaj ĉefoj, ke oni liberigu ilin por unu tago, pro „tre gravega afero familia". Poste kun onklino Gracia ili sidiĝis en aŭton kaj ekveturis al la urbo Paronne. Sur la ŝoseo estis granda trafiko, do vane ili provis konstati, ĉu oni postsekvas ilin aŭ ne? Sed ili triope esperis: la banditoj nun jam okupiĝas pri serĉado de la trezoro, kaj ne pri Laŭra kaj Petro.

– Kion ni faros en Paronne? – demandis Laŭra. Ŝi senĉese tenis la manon de Petro. Nun la edzo signifis por ŝi la sekuron, la savon.

– Nenion – respondis onklino Gracia kun la mallongeco tiel karakteriza por ŝi. – Ĉar ni tute ne alveturos la urbon. Antaŭ Paronne estas la vilaĝo nomata Monto de Sankta Erasmo: tie ni haltos kaj orientiĝos.

Petro ne sciis, en la vortaro de onklino Gracia kion signifas la vorto „orientiĝi". Eble la maljunulino – helpe de sia fama armilo, la fera ombrelo – „pridemandos" la tieajn loĝantojn? Ŝi por unu tago fariĝos teroristino, perforte ŝi devigos la kamparanojn montri la trezoron? Sed eble stultaĵo estas

imagi, ke tie iu ajn scias pri la heredaĵo. Ja eĉ ili, la koncernatoj scias pri ĝi preskaŭ nenion!

Kiam posttagmeze ili alveturis la vilaĝon, ili iom perdis sian ekscitiĝon. La vidaĵo estis belega. Inter verdaj montetoj, en sino de arbaroj, borde de eta lago staris malgrandaj blankaj domoj, svelta turo de preĝejo, sur kampoj bonodorantaj sekiĝis fojno, paŝtis sin bovinoj kaj ĉevaloj. Kaj ĉio ĉi sub brilegbelega sunlumo kaj bluega ĉielo...

– Tiel ĝi aspektas, kiel en fabelo – flustris Laŭra. Ankaŭ Petro apenaŭ scipovis spiri pro la agrabla miro. Ĉu ankoraŭ ekzistas tiaj vilaĝoj? Ĉu ĉio ĉi ne estas sonĝo?

La koro de onklino Gracia batis pli rapide. Jes, la vilaĝo... apenaŭ ĝi ŝanĝiĝis. Foje ŝi jam estis ĉi tie, somere, kun ŝiaj gepatroj. Kiam? En la infanaĝo. La dato ŝajnis esti nekredebla. Tiel antaŭlonge...?

Ili jam staris meze de la ĉefa placo, apud la aŭto. Ili ne povis vidi, ke rande de la vilaĝo, sur monteto staris iu kaj observas ilin per binoklo. Poste la viro turnis sin al siaj kunuloj:

– Kiaj porkoj! Jen alvenis tiuj du gemalfeliĉuloj. Estas ĉi tie ankaŭ la virinaĉo, kiu hieraŭ fuĝis el nia malliberejo! Videble ili ne rezignis pri la heredaĵo.

– Do, mi aliros ilin kaj... – unu el la viroj elprenis sian pistolon.

– Nenien vi iros – retenis lin la ĉefo. – Ni restos ĉi tie kaj atendos. Eble ili trovos tion, kion ni vane serĉis ĝis nun? ... Tiam ni aliros ilin kaj simple forprenos la trezoron...

(Daŭrigota)



Szilárd Bálint

LA KURACISTO KAJ LA VIRINO

En la kontoro de la malliberejo oficiro kun indulgema rideto transdonis al altstatura, mezaĝa viro personajn aĵojn kaj iom da mono. El kuracista necesujo, inter aliaj kirurgiaj instrumentoj, la oficiro elprenis forcepson.

– Jen, tiu akuŝilo alportis por vi du jarojn en nia domo! Espereble vi evitos ĝin uzi denove por la sama celo, ĉu ne?

La ekskaptito elpaŝis el la domego kaj ĉirkaŭrigardis jam ekstere. Antaŭ la malliberejo kolomboj flugadis, libere kaj gaje klakis la flugiloj. Estis somera posttagmezo, la vento revigliĝis kaj la varmego iom mildiĝis. Doktoro Alm ekiris, sen scii kien en la grandurbo. Ekveturi al sia fora urbeto, kie li kulpis, ankoraŭ li ne havis emon. Sed nun la nekutima homsvarmo tro ĝenis lin, tial li direktis sin al la verdaspekta monteto, la arboj kaj ĝardenoj kvazaŭ altiris lin. Ĉe iu ĝardena pordo divenprove li turnis la klinkon – ĝi malfermiĝis, kaj li eniris. Trans longa laŭbo li atingis la domon. Neniu estis rimarkebla. Li enpaŝis ĉarman halon, surtable flavaj rozoj pompadis en vitra bovlo. Li trovis banĉambron – dolĉaj odoroj frapis lian nazon, preskaŭ volupte li sentis egan emon bani sin laŭ propra plezuro...

La juna Kata lace dormetis en sia ĉambro, kiam ŝin abrupte vekis laŭta plaŭdado el la najbara banĉambro. Nenia dubo, iu sin banas! Sed kiu? Nur la ĉambristino estas hejme, sed ŝi havas alian banĉambron, kaj ŝi certe ne kuraĝus uzi tiun de Kata. Ŝi surprenis veston kaj malfermante la pordon de la banĉambro, pro miro ŝi preskaŭ ŝtoniĝis sur la sojlo.

– Kiel vi trafis ĉi tien? ! – ŝi ekkriis time, vidante la nudan viron en la bankuvo.

– Aliloke mi ne trovis banĉambron, bonvolu pardoni! ... Sed donu prefere ian viŝtukon aŭ ĉi mi ekstaru? – respondis la viro raŭke.

Senvorte Kata alĵetis la plej proksiman tukon. La viro kaptis ĝin kaj deskuis la akvon desur sia kapo. Kovrante sin, li per trankvilaj movoj ekstaris kaj sen videbla embaraso li rigardis al la virino.

– Kiu vi estas? Kion signifas tiu stranga vizito? ! – demandis akratone Kata.

– Tute ne decas interparoli nude... kvankam mi vidis certe pli da nudaj virinoj, ol vi de nudaj viroj... Prefere en la salono baldaŭ mi klarigos kaj vi ekscios ĉion. Sed jam nun mi deklaras, ke mi ne estas rompŝtelisto!

La timo de Kata iom foriĝis. Tiu persono pro ia nekonata, sed ne malica kaŭzo venis, eble trovi azilon? ! Sed kial? Kiu li estas? La ina scivolemo venkis la timon. Kiam Kata eniris la salonon, li jam sidis ĉe la tablo, akcepteble vestite, apude videblis nigra kuracista necesujo, je nova surprizo de Kata.

– Mi estas doktoro Alm, akuŝisto... – klinis sin la viro ekstarante.

– Via vesto estas korekta... kvankam tre ĉifita... strange.

– Ne miru! Antaŭ du jaroj mi surhavis ĝin, de tiam ĝi restis pakita...

– Diru jam, kial vi penetris en mian domon?

– Indulgon mi petas... la ĝardena pordo ne estis ŝlosita. Kaj mi urĝe bezonis banadon, sed neniun mi trovis por peti permeson. Se vi volas, mi jam tuj foriras...

– Restu trankvile... mi deziras ekkoni mian neinvititan gaston – ridetis Kata kaj refleksmove glatigis sian jupon.

– Mi laboris en hospitalo. Kun mia edzino, juna akuŝistino, ni harmonie vivis, ĝis mi rimarkis ŝokite, ke ŝi kokras min kun la ŝoforo de nia hospitalo...

– Ĉu vi tiam eksedziĝis pro tio?

– Mi hezitis ankoraŭ. Baldaŭ ŝi faris kontraŭ granda sumo abortigon en loĝejo. Ĝi malsukcesis, kaj senhelpe, ŝi urĝe vokis min por helpi. Mi rapidis tien, sed mi devis sendi la virinon en hospitalon, kie ni nur malfacile savis la vivon de la virino...

Sekvis peza silento. Kata atendis, nenion dirante.

– Sekvis tribunala proceso. Mia edzino, la ŝoforo, eĉ la patrino de la virino atestis: *estis mi* kiu faris la malpermesitan abortigon! Post dujara mal-

liberejo ĵus mi liberiĝis... Do, mi foriras...

– Kien vi iros? Ĉu vi havas monon?

– Kien? Mi ne scias, monon malmulte mi havas.

– Se tiel estas, restu kaj vespermanĝu. Morgaŭ ni parolos kiel plu.

La nova loĝanto de la gastoĉambro restis tre ĝentila. La ĉarma vidvino eĉ incitiĝis pro lia detenemo, ke li ne rimarkas ŝian virinecon... Iuvespere Kata enpaŝis en lian ĉambron kaj petis fari tuj zorgan kuracistan ekzamenon. Senveste ŝi eltenis la longan ekzamenadon, kaj kuŝante sur la lito ŝi aŭskultis la trankviligan prijuĝon, ke nenia malordo troveblas en ŝia organismo. Ŝajnigante lacecon, ŝi restis kuŝanta sur la dupersona lito, kaj baldaŭ ekdormis. La kuracisto ĉesis rigardi ŝin. Li rezistis la deziron, kaj endormiĝis en la fotelo, lasante la virinon kuŝi sola ĝis mateno.

– Kion vi pensas nun pri mi, post tiu nokto? – demandis Kata ĉe la matenmanĝo.

– Ankaŭ mi volas ekscii vian opinion – sonis la respondo.

– Pri vi kiel kuracisto? Aŭ pri la viro? – incitetis Kata.

– Jes, pri ambaŭ! Solvi nian problemon...

– Grandaj azenoj ni estas... – ridetis Kata. – Sed ni havas du solvojn. La unua estas favora por via profesia kariero... Tamen, aŭdu! Ne estas vi *vera* kuracisto, se vi ne trovos terapion por niaj sekvontaj rilatoj – kiel viro!

★

Kara Leganto! La redakcio ne konas la sekvaĵojn, tial ni petas vian helpon. La plej bona solvo ricevos libropremion, kaj la solvo (en 30 tajpitaj linioj) aperos en Hungara Vivo. Limdato: unu monato post la alveno de tiu ĉi historio.

DAŬRIGO
de la novelo „POLIGAMIO"
aperinta en la numero 1985/3
Daŭrigas: Ladislav Podmele, Prago, CS.

– Ni parolu sincere, kiel homoj – diris la edzino. – Mi povus forlasi vin, sed tro longe ni kunvivis. Niaj amikoj kaj niaj infanoj pensas, ke ni estas ideala paro. Do, ĝi estus mizera solvo. Solvus nenion, nur produktus novajn problemojn. Eble mi kredas al via rakonto, ĉar laŭ mia scio vi neniam mensogis al mi. Do, mi hezite kredas al viaj vortoj, sed kio okazus, se reveninte hejmen, vi trovos en via lito kaj piĵamo mian kolegon. Kion vi dirus? Ĉu ekzistas egalrajteco inter viro kaj virino en la seksa rilato? Sed bedaŭrinde mankas al mi tiu kolego, kiu volus veni en nian hejmon kaj lasi sin kapti en la lito. Mi tion ne povas riski. Kaj cetere neniun kolegon mi amas. Mi estas laca. Mi kontentiĝis per via amo, vere mi amas vin, eĉ se vi kulpis kontraŭ mi. Ĉu mi estu grandanima? Kaj mi diru al vi: vi havas pli junan kaj pli belan inon. Do, iru kaj amu ŝin, eĉ eble mi povus ŝin viziti kaj rakonti al ŝi pri mia eksedzo ĉion bonan? Mi estas preta fari tion, se vi transdonos al mi ŝian adreson...

– Mia kara, kia azeneto vi estas! En la vivo ĉiam ekzistas hazardoj, kiam la senkulpaj homoj ne povas defendi sin... – diris la edzo kaj karesis la vizaĝon de la edzino.

– Lasu min daŭrigi... se vi elektus tiun junulinon, tiam vi devos foriri el nia komuna domo, sed vi posedis nian domon antaŭ ol ni geedziĝis. Ĝi estas do via domo kaj ne la mia, tio estas do nerealigebla solvo. Mi scias, ke vi, kiel mi, laboras multe kaj vespere ni ambaŭ estas lacaj. Ĉio iras laŭkutime, la vespermanĝo kaj la enlitiĝo. Mia korpa aspekto jam ne estas juna, mi ne iras al kosmetikisto por beligi min, kaj la konkurantino estas tiu juna kaj bela knabino. Mia kara... mi pripensis ĉion! Pardonu al mi, ĉar mi estis malbona edzino por vi. Mi komprenas, ke vi kiel viro havas multon por riproĉi al mi. Diru al mi, ĉu vi fakte kaj vere amas tiun knabinon? Sed diru tion prave kaj sincere. Tio gravas por mi!

– Maria, ĉio estis fakte nur hazardo! Pli frue mi neniam vidis ŝin, mi scias nek ŝian adreson, nek la tutan nomon, kredu al mi!

– Mi kredas! Baldaŭ estos sabato kaj dimanĉo. Kien ni veturos? Mi volas ĉion forgesi, vivi pli intime kaj pli ame. Mi promesas tion al vi. Ĉu vi konsentas pri mia propono?

La edzo estingis la lumon de la lampo, senvorte prenis al si la edzinon, kaj en la mallumo nur la murhorloĝo tik-takis kiel la vivo.

Teatra Festivalo denove

Inter la 14-17. de marto 1986 okazos la kvaran fojon Teatra Festivalo en Budapeŝto. Jen, la programo:
1986-03-14, vendredo:
Masters: La mortintoj de Spoon River
Koncerto de Olivier Tzaut
1986-03-15, sabato:
M. Gyárfás: Gutoj (unuaktaĵo)
Gastrolo de eksterlanda trupo
1986-03-16, dimanĉo:
F. Kafka: Letero al la Akademio
J. Elem: Betonterapio
1986-03-17, lundo:
Masters: La mortintoj de Spoon River
Koncerto de Olivier Tzaut
Ĉiuj spektakloj okazos en la Teatro "Radnóti"; ili komenciĝos je la 19a horo.
La Vojaĝoficejo "Express" (Budapest V., Szabadság tér 16. Tel.: 317—777, interna n-ro 84) ofertas tranokteblojn kun matenmanĝo kaj teatra bileto por tago kaj persono laŭ la jenaj kondiĉoj: por civitanoj de socialismaj landoj en 3-4 litaj ĉambroj de laborista hotelo kontraŭ 280,- forintoj; por civitanoj el nesocialismaj landoj en 3-4 litaj ĉambroj kontraŭ 8,- USD, en dulita ĉambro kontraŭ 16,- USD. En altkategoria hotelo oni pagas por la samaj servoj 40,-USD. "Express" povas akcepti mendojn ĝis la 6a de marto 1986.

Klasikan Nord-Hindian fruvesperan *ragaon* sen la kono de la Hinda kulturo apenaŭ povas *kompreni* lapona kamparano, sed jes ja li povas eksenti ĝian belecon. Tio signifas, ke ankaŭ muziko ne povas transsalti la distancojn inter kontinentoj, landoj aŭ sociaj-politikaj sistemoj, sed ĉiukaze ĝi estas pli efika ponto inter la popoloj, ol la naciaj lingvoj. Kaj se ni akceptas la tezon, ke muziko ne konas limojn – kvankam ni ne forgesu: ankoraŭ ekzistas ankaŭ *artefaritaj* baroj – la plej internacia regiono de la lando de l' muziko estas la *rock*, kiun iuj konsideras la popolmuziko de nia epoko.

Sed, kiel ĉiuj komparoj, ankaŭ tiu ĉi maltrafas iom. La *rock*-muziko, kiel ia „Esperanto de l' muziko" ŝuldas sian furoran mondsukceson unuavice al la nerezistebla forto de la anglausona kulturo kaj ekonomio post la dua mondmilito. Tiel povis kreiĝi la paradoksa situacio, ke adoleskanto en Tokio aŭ en la hungara urbo Kecskemét dezirante ludi muzikon komencas tion fari ludante la *rock-and-roll*-ojn de Chuck Berry – sed tiu *komuna* muzika lingvo de la popoloj de la mondo samtempe estas ankaŭ la *nacia* muziko de usonanoj. *Rock-and-roll* estas io simila al la *dolaro*.

Ĉar *rock* estas ne nur muziko, sed ankaŭ granda, ĉiam pli granda negoco, el la supre skizita situacio sekvas, ke internacian kasan sukceson oni povas atingi nur en internacia stilo kaj lingvo, t.e. anglalingve. En la ensemblo *Abba* estis nenio sveda aŭ skandinava, eble nur la karakterize trankviliga, agrabla, pura precizeco, memoriganta pri Volvo-aŭtomobiloj.

Sed dum la strebado al supernacia karaktero manifestiĝas per la imitado de anglaj kaj ĉefe usonaj modeloj, en la lasta jardeko estas rimarkeblaj ankaŭ klopodoj nete kontraŭaj al tio: per la riĉa arsenalo de la muzikaj kaj spek-

Tamás Szőnyei

De internacieco al nacieco kaj reen



Levente Szörényi

taklaj rimedoj de lokaj fontoj doni nacian karakteron al siaj produktoj.

La iniciaton tiukampe faris verŝajne unu el la avangardoj de la angla *punk*-movado, la ensemblo *Cash* en la jaro 1976: ĝia kanto *I'm So Bored With The USA* (Tiel min enuigas jam Usono) ili esprimis ion pli, ol nuran malŝaton al stultaj televidaj serioj. Sed kompreneble ankaŭ la angla *punk* baldaŭ fariĝis prototipo, tamen en tiuj landoj, kie la junaj muzikistoj povis baldaŭ trapasi la verŝajne ne preterpaseblan fazon de imitado, tie la efiko de la komenca impulso de *punk* poste kontribuis al la kreado de originalaj kaj valoraj verkoj. La plej frapa ekzemplo por tio estas la renoviĝo de la pop-muzika vivo en FRG kaj Okcidenta Berlino fine de la 70-aj, komence de la 80-aj jaroj, kiam debutis tiaj ensembloj, kiel *DAF, Plan* kaj *Einstürzende Neubauten*, kies sukceson pruvas unuavice ne la multaj milionoj da venditaj diskoj, sed la rekono fare de la pretendema publiko tutmonde.

Tiuj du tendencoj bone rimarkeblas ankaŭ en la pli ol 20-jara hungarlanda historio de la beat-pop-rock-muziko. La unua leciono kompreneble estis la prezentado de la aktuale furorantaj eksterlandaj kantoj, kiuj tiam ankoraŭ ne estis aŭdeblaj en la muzikaj programoj de la Hungara Radio. Nuntempajn orelojn ŝokus la primitiva tonaro de la praaj hungaraj *beat*-ensembloj ĉe la prezento de eksterlandaj kantoj, sed tio estis periodo ne preterpasebla.

Estis la jaro 1965, kiam la ensemblo *Illés* unue iom malcerte, sed poste ĉiam pli aplombe komencis kanti hungarlingve – fakte tiam naskiĝis la hungara *beat*-muziko. La kantotekstoj de János *Bródy* estis verkitaj pri kaj por la tiamaj gejunuloj, sed la ensemblo *Illés* pioniris ankaŭ en tio, ke ĝi povis organike kombini la elementojn de la hungara popolmuziko kun la anglausona *beat*. En la evoluo de tiu ensemblo bone rimarkeblas la ŝanĝoj en la muziko de la granda modelo *Beatles* kaj ĝenerale la ŝanĝoj de la eksterlandaj tendencoj. Kiam la ensemblo *Illés* disiĝis, ĝia posteulo, la ensemblo *Fonográf* tendencis al la *country*-muziko: en tio ili vidis eblecon por populariĝo en okcidentaj landoj, sed tio estis nur vana iluzio, ĉar tiu *Fonográf-country* simple ne estis io *vera*. Pri tio baldaŭ konsciiĝis ankaŭ la estro de la ensemblo, Levente *Szörényi*, ĉar en la kantoj de lia disko *Reveno hejmen* (1980) kaj en la postaj verkoj la elementoj de la hungara pópolmuziko ĉeestas pli emfaze ol iam ajn antaŭe.

Estas karakteriza simptomo de la okulumado al eksterlando, ke senfine ni povus citi fremdlingvajn vortojn, kiujn hungarai ensembloj prenis kiel nomon: *Atlantis, Bikini, Corvina, Dolly Roll, Echo, Express, Gemini, Hobo Blues Band, Juventus, Koral, Lord, Mini, Omega, Pannonia, Panta Rhei, P. Box, Prognozis, Rolls, Senator, Solaris, Taurus, V'Moto Rock...* ĉu troviĝas pli? Certe jes.

Kion pruvas tiu listo? Antaŭ ĉio tion, ke la supraj ensembloj pensis ne nur pri la hungara muzika merkato: per la internaciece sonanta nomo ili

revis havi pli bonan ŝancon en eksterlando, kaj estas vere, ke en la socialismaj landoj la hungaraj ensembloj ĉiam havis bonan reputacion, ĉar ilia nivelo estis tre proksima al tiu de la anglajusonaj modeloj – kvankam ili neniam povis atingi tiujn. Kelkaj el tiuj ensembloj povis prezentiĝi en Okcidenta Eŭropo, Usono, eĉ en Japanio, sed tre karakterize plej multe vendiĝis la diskoj de la internaciece fasonita ensemblo *Neoton*, kiu alcelis grekojn per la kanto *Marathon*, hispanojn per *Santa Maria...* Kio koncernas la ceterajn ensemblojn, krom malmultaj esceptoj kiel *LGT*, ilia muziko estas ĝenerale nur tolerebla, foje teda, foje rideton elvokanta imitaĵo, tamen tiu juĝo ne kontestas la fakton, ke kreiĝis kelkaj vere bonaj kantoj, profundaj aŭ spritaj tekstoj, sagaca instrumentado, ke okazis memorindaj koncertoj.

Dum dudek jaroj la pop-muziko „plenkreskis" en Hungario. Ne estas maloftaĵo diskoalbumo vendita en 100 mil ekzempleroj, kelkaj diskoj eĉ jam atingis la eldonkvanton de 250 mil kio estas konsiderinda rezulto en lando havanta 10 milionojn da loĝantoj. Hungara Radio dissendas nekompareble pli da pop-muziko, ol antaŭe. Fondiĝis „Rock Teatro" en Budapeŝto. La hungara pop-muziko jam havas siajn legendajn mortintojn, la iamaj pioniroj aranĝas 10-15-20-jariĝajn jubileajn programojn, tiujn oni surfilmigas, kaj ili okupiĝas pri la eblecoj de agado post la retiriĝo. Oni rulis dokumentajn filmojn kaj verkis analizajn librojn. Rockprogramoj eniras la solenaĵojn de gravaj naciaj jubileoj. La muzikistoj havas sian sindikaton. La plenumojn de kelkaj elstaraj muzikistoj aŭ kantistoj oni rekonis per ŝtataj artaj premioj.

Pop-muziko plenkreskis, sed ĝi ne povas senti sin plenaĝa. La kadrojn de ĝia ekzistado limigas juraj reguloj konceptitaj antaŭ jardeko(j). Preskaŭ ĉio koncentriĝas en la ĉefurbo. La sola diskoeldonejo de Hungario inter siaj muroj provas simuli merkatajn cirkonstancojn, sed konkurenco tiamaniere kreiĝas nur inter ensembloj, kaj ne inter diskoeldonaj firmaoj: tio ne pozitive influas la situacion de la nova generacio, kaj ankaŭ ne la evoluon de tiu ĉi arto. Ĝis nun okazis nur provoj por eldoni fakan revuon – la plej esperiga provo estas „POLIfon", de kiu eliris kvar numeroj dum 1985, nun ĝi atendas ricevi konstantan permeson por aperadi.

Dum okazis tiu ĉi nekompleta „instituciiĝo", kaj la gvidaj ensembloj prezentis ĉiam pli profesiajn – sed ofte ankaŭ pli anemiajn – programojn, en la jaroj 1980-81 en Budapeŝto aperis kelkaj ensembloj, kiuj ankaŭ ne tute eskapis la eksterlandajn influojn, tamen iliaj programoj estis individuaj, spite la ne tre altan muzikan nivelon ĝuindaj, ili parolis pri kaj por la nuntempo, pensigis la aŭskultantojn, kaj multfadene ili ligiĝis ankaŭ al aliaj artoj. Ili havis pli-malpli hungarecajn nomojn: *Bizottság* (Komitato), *URH*, *Kontroll Csoport* (Kontrolgrupo), *Európa Kiadó* („Eldonejo Eŭropo" aŭ „Eŭropo luota"), *Vágtázó Halottkémek* (Rajdantaj mort-ekspertoj), *Balaton*, *Trabant*. La nova ondo kiun ili reprezentis nur tre malfacile ricevis eblon atingi la publikon per la radio kaj diskoj, sed filmoj estis faritaj pri ili. Similan sorton havis ankaŭ aliaj ensembloj, kiuj pro iu kaŭzo ne respondis al la normoj (*Syrius*, *Kex*, *Beatrice*). La diskoeldonejo serĉis kaj trovis malpli „problemajn" junajn ensemblojn, kiel *KFT*, *GM49*, *Satöbbi*, *Első emelet*.

Krei la veran hungaran junularan muzikon – tion celas la nuna urba movado de „dancdomoj", kiu revivigas la originalan kamparanan muzikon, tion celis la muziko de la jam menciita Levente *Szörényi*, la ensemblo *Kormorán* kombinis la pulsadon de *rock* kun la melodiaro kaj instrumetada kulturo de la hungara popolmuziko kaj tiuj de la popolmuziko de la najbaraj nacioj. La ensemblo *P. Mobil* prikantis per la rimedoj de *hard rock* la hungaran patrujokupon, la ensemblo *Csiga-biga* vidas la solvon en la revivigo de la ŝamanismo, kaj dum tiu ĉi aŭtuno sur afiŝo pri koncerto en industria distrikto de Budapeŝto (ĝi informis pri la programo de la ensembloj *Teknősbika*, *Hóvihar* kaj *Szarvas Drops*) oni povis legi sekvan tekston: **„Devas ekzisti tia muzika gepatra lingvo, kiu nutras sin ne el la BLUES, kiu vivas kaj movas sin en ni, kiu estas praa kaj hungara, kiun kantis niaj gepatroj. Tio estas nia muziko."**

La ensemblo Neoton

La ensemblo Kormorán

MALGRANDA LANDO

EN AVANGARDO

VETÖMAG

Dum pasas la jaroj, oni nuntempe pli kaj pli avertas pri la „minaco", kiun prezentas la forta akceliĝo de la kreskado de la homaro. Iuj aŭguras, ke je la sojlo de la sekva jarmilo la loĝantaro de la Tero duobliĝos. Tamen, ĝenerale oni taksas reala la nombron pri 7 miliardoj da homoj sur nia globo.

Se tiel estos, la graveco de la nutraĵo por vivteni la socion ege kreskos. Pri tio jam nun povas atesti – kiel ajn bedaŭrinde – la mizere malsatantaj milionoj en granda parto de la mondo. Feliĉaj estas la landoj, kie la naturcirkonstancoj prezentas eblon por abundigi, ampleksigi la vivtenajn nutraĵojn, plivastigi ilian produktadon.

Hungario troviĝas inter tiuj bonŝancaj landoj! La tero kaj la pejzaĝo en Hungarlando prezentas tre favorajn eblecojn por la agrokultura produktado. Malmultaj estas la landoj en nia mondo, kie – samkiel en Hungario – la duono de la teritorio estas kulturata. Kaj eĉ pli malmultaj landoj troveblas, kie 55 procentoj de la agroj estas plugtero (la averaĝo en la mondo estas 10,3 procentoj).

La cirkonstancojn igas pli favoraj, ke la hungaran basenon kvazaŭ ŝirmas de la ekstremaj meteologiaj influoj la montarĉenoj de Karpatoj kaj Alpoj. Tiel iĝas agrable konvena, tipe kontinenta la klimato: varmaj someroj, kaj malvarmaj vintroj alternas kun humidaj printempoj kaj aŭtunoj. Sekve de pluraj, diversaj geografiaj faktoroj tri grandaj regionoj estas distingeblaj kaj alimaniere utiligeblaj el agrokultura vidpunkto. Estas do abunde da variaj agrokulturaj ebloj por produkti tre multe da specoj de vegetaĵoj.

Pro la menciitaj favoraj cirkonstancoj la hungara popolo ĉiam konsciis pri la graveco de la vegetaĵoj, kaj forte respektis la vivdonan grundon. La tre konvena naturo daŭre instigis novajn kaj novajn generaciojn malkovri ĝiajn latentojn, akiri pli kaj pli da spertoj por prosperigi la kulturadon, kio ja signifis pli da nutraĵo ne nur kvante kaj kvalite, sed ankaŭ vastiĝantan gamon de tre diversaj specoj.

La laboremon kaj spertecon de la kamparanoj nuntempe jam kompletigas la scienco kaj la tekniko per la modernaj metodoj. Ne estas mirinde, ke la evoluo de la hungara agrokulturo dum la jarcentoj akiris daŭre altan prestiĝon ankaŭ al la produktado de semgrajnoj. Tiu necesega branĉo de ĉiu altnivela agrokulturo ankaŭ nuntempe estas elstara bazo, avangarda parto de la hungara ekonomio.

Al tiu gravega agrokultura tasko multe kontribuas la

ENTREPRENO SEMGRAJNO.

Ĝia zorgo estas provizi la enlandajn plugterojn per la plej multaj specioj de legom- kaj florgrajnoj. Memkompreneble tiu agado inkluzivas ankaŭ la ree kaj ree bezonatajn novigojn de la produktataj subspecioj. Al tiuj aliĝas de jaro al jaro pli ampleksiĝante la eksportado de la altkvalitaj grajnoj.

Ni rigardu iomete – tamen ne tro detale – la ĉenon de la ĵus koncize formulitaj agadoj. La novajn speciojn oni devas unue tre zorge adapti al la enlandaj kondiĉoj, eĉ pli precize al certaj regionoj pro ties iugrade diversaj kulturaj cirkonstancoj, alivorte: igi ilin taŭgaj por specialaj grundo-cirkonstancoj kaj lokaj faktoroj. Tio bezonas ofte plurjaran laboron, ne malofte eĉ pli, kiun plenumas precipe la du esplorstacioj de la entrepreno.

La selektitajn, jam taŭgajn grajnojn la entrepreno zorge distribuas inter siaj propraj bienoj, ankaŭ al tiucele kontraktintaj eksteraj – kooperativaj, privataj – bienoj por amase produktigi semgrajnojn. Kompreneble la produktadon oni faras ĉie sub severa agroteknika kontrolado flanke de la entrepreno, pere de niaj sciencaj fakuloj. La produktado nuntempe okazas sur pli ol 300 mil hektaroj, kio signifas, ke sur tiu grandega areo oni kulturas pli ol mil speciojn da cento da vegetaloj, ĉiujn grajnojn kaj tuberojn sole por semado.

La akumulitajn, respektive aĉetitajn grajnojn kaj tuberojn la entrepreno per multspecaj teknikaj

(ankaŭ permanaj) metodoj kun alta zorgemo *purigas.* Tio estas farata en pli ol 20 purigaj uzinoj. Ekspertoj ekzamenas la purigitajn amasojn de la semgrajnoj, kaj nur post severega kaj rigora kontrolo povas okazi la enpakado, kiun permetala, markita fermilo garantias.

La diversgrandaj pakaĵoj, ofte paketoj estas distribuataj al centoj da vendejoj, specialigitaj por semgrajnoj, respektive al eksportado. Sed la zorgado ankoraŭ ne ĉesas: ĝi subtenas vastan servon por faka konsilado, kiun la plej diversaj agrokulturistoj, ankaŭ privataj, multe utiligas por certigi la plej taŭgan rezulton dum la produktado, do uzi la produktadrimedojn kaj manierojn plej konvenajn al la specialigitaj grajnoj de la entrepreno.

Kvalifikado kaj kvalito

Dum la tuta jam menciita procedo oni devas severe konsideri la rigorajn hungarajn normojn pri la semgrajnoj, krome ankaŭ la ekzistantajn internaciajn, respektive eksterlandajn preskribojn. Tiuj fakte estas tre multspecaj, tamen nepre respektendaj. Sume eblas aserti, ke la vojon de la hungaraj semgrajnoj sekvas vigla atento, disde la agro ĝis eĉ la envendeja aĉeto.

La difinitan kvaliton prezentas la atentoplena kvalifikado, sed efektive al tio pleje kontribuas la semgrajnojn speciale produktantaj bienoj, la entrepreno per sia priserva kaj prifaka reto, al kio aldoniĝas ankaŭ la harmonia kunlaborado inter ĉiuj partoprenantoj de tiu ĉi altgrava agado.

Nuntempe por ĉirkaŭ 500 bienoj la ĉefa – aŭ foje la dua plej grava – agado estas la semgrajn-produktado. Ili ĉiuj produktadas inter la plej konvenaj kondiĉoj teknikaj, biologiaj kaj mensaj.

Plurflanka garantio

En Hungario estas baza preskribo, kaj por la selektantoj severa regulo, ke en la ĝeneralan kulturadon enigi, tie utiligi eblas sole speciojn kun ŝtata kvalifiko. Tio estas tre grava garantio por la kulturistoj, ĉar post la tri-kvar jarojn daŭrantaj eksperimentadoj pri la interkomparado de la specioj, nur la plej eminentajn karakterizojn havantaj specioj, ties semgrajnoj ricevas la „stampon" de la aŭtoritataj kvalifikantoj. Sole tiuj semgrajnoj, la ŝtate kvalifikataj, havas la rajton eniri en la komercon kaj nur ili estas reproduktataj kaj kulturataj tra la lando.

La ekzamenadon de la speci-karakteroj plenumas dekkvin eksperimentejo-stacioj dise en la lando, diversregione. La opaj specioj estas ekzamenataj ĝenerale en dek diversaj kulturejoj, kvarses foje ripetante la provojn. Por akiri ĉi tiun oficialan aprobon, la selektantoj devas multe klopodi. La novigitaj specioj, respektive subspecioj, devas respondi al pli kaj pli da specifaj kulturaj pretendoj krom siaj internaj valoroj, gravaj ĝenerale precipe por la konsumantoj. Ne estas facile kunigi, akordigi la postulatajn trajtojn en la vegetalo, tamen tio eblas helpe de la modernaj sciencaj metodoj.

Tiucele pli ol sescent fakuloj laboras en la du esplorinstitutoj de la entrepreno kaj en ties eksperimentcelaj bienoj. Ili havas daŭre plenumendajn tri taskojn:

- produkti novajn speciojn,
- reprodukti kaj plibonigi per selektado la jam kulturitajn speciojn, kaj
- prilabori agrokulturajn metodojn por amasproduktado.

Tiuj tri celoj kaj ties plenumado daŭre certigas la internacian prestiĝon de la Hungarlandaj semgrajnoj, la speciojn, kiuj konvenas al la agroteknikaj postuloj, ankaŭ la abunde vastan gamon de la sortimento prezentata kaj al la enlanda kulturado, kaj al la eksterlanda merkato. En la selekta agado, konsiderante ĝin metio, la urĝema rapideco kutime ne alportas verajn rezultojn. Inter avantaĝoj kaj malavantaĝoj koncerne la speciojn la tempo juĝas, t.e. la sinsekvo de la maturiĝontaj generacioj; tamen niaj grandspertaj selektistoj faras ĉion eblan, ke la novaj kaj la renovigitaj specioj kiel eble plej frue ricevu la ŝtatan kvalifikon por baldaŭ disvastiĝi en la kulturado.

La aĉetantojn de la semgrajnoj ĉiam kontentigis, ke la Entrepreno Semgrajno bone sekvas la evoluon de la tekniko: en ĝiaj uzinoj funkcias la plej modernaj purigiloj, ankaŭ aparatoj klasifikantaj laŭ specifa pezo, mezuro kaj koloro. Ilin kompreneble kompletigas la plej kapablaj maŝinoj por draĝeigo (piloligo) kaj aŭtomataj pakmaŝinoj, ĉiuj en granda diverseco pro la multegaj formoj de la semgrajnoj. Ĉiuj ĉi aparatoj ŝirmas la valorojn de la grajnoj kaj tuberoj, kaj protektas ilian ĝermokapablon, avantaĝe al la kulturistoj.

Por prezenti ankaŭ kelkajn ekzemplojn el inter la novaj, eminentaj legomo-variantoj, ni en la sekvaj mencias tiajn, kiuj jam akiris famon en nia kontinento, unuavice pro altaj kvalitoj kiel bongustaj manĝindaĵoj. Ankaŭ nefakuloj povas rimarki en la komenta teksto almenaŭ iom pri la agroteknikaj pretendoj, kiuj efektive servis kiel celoj dum la multflanka selektado en la esplorejoj.



RAFANETO „Szentes – giganta buter' ". Ekstere ruĝa, interne blanka

Intense evoluanta specio, kiu konvenas same por forci, t.e. kreskigi subvitre, kaj por kultivi sur agroj. Vegeta daŭro estas nur 40 tagoj, kaj la produktokvanto atingas 110 pecojn sur kvadratn metro. Por akiri bonajn rezultojn, oni devas havigi al ĝi cirkonstancojn de abundeco, kontinue provizi per nutraj substancoj kaj akvo. Krevi kaj iĝi spongeca – difektoj de tiaspecaj legomoj – nia specio

RAFANO „Munkena bier' ". Blankkolora

malinklinas, kondiĉe ke ĝi ricevas sufiĉe da akvo. La proporcio de tubero-foliaro estas 60-40 procentoj, do tre avantaĝa. Ĝia karno estas blanka, kompakta, freŝgusta. La bezono pri semgrajno estas 1,5–2 g/m².

Ĝi estas produktebla por konsumi somere, sed ankaŭ por aŭtuna aŭ vintra konsumado, se oni kultivas ĝin antaŭ aŭ post aliaj vegetaloj. La vegetado daŭras 95 tagojn, kaj produktas 30-40 tunojn/hektaro. La karno estas malmola, blanka, kun agrabla gusto. Se ĝi ne ricevas sufiĉe da akvo dum la vegetado, la karno iĝas iomete akragusta. Ĝi bezonas difinitajn kultivajn kaj stokajn cirkonstancojn, tiukaze ĝi konvenas ankaŭ por vintra kaj fruprintempa konsumado. La bezono pri semgrajno estas 3,5-4,5 kg/ha.

LAKTUKO „Vintra buterkap' ". Flavverda, sferoforma

Tiu laktuko-specio estas rekomendinda por hejmaj ĝardenoj. Plej bone ĝi kreskas sur malkompakta grundo konvene utiliganta akvon. La vegetado daŭras 210-220 tagojn kaj la rezulto estas 13-16 pecoj sur kvadratmetro. Meŝgrade rezistas froston, ankaŭ malsanojn. Ĝi maturiĝas frutempe, se la vetero favoras, eblas ĝin kolekti jam komence de majo. Da semgrajnoj ĝi bezonas 1,5-3,5 kg/ha.

Karoto rekomendata por grandproduktado kaj ĝardenetoj. Tre bonrezulte ĝi estas kultivebla en profundplugita, argileca kaj bruna sablogrundo, kiu estas bone provizata per nutraj substancoj. La vegetado daŭras 190 tagojn, kaj produktas rimarkindan amason, 26-35 tunojn sur hektaro. Ĝi estas aparte eltenema varianto, ankaŭ bone toleranta malvarmon. Same, por stokado, ĝi estas tre bone uzebla; se la cirkonstancoj estas konvene aplikataj, tiu ĉi karoto ne perdas de siaj valoroj. Por unu hektaro necesas nur 2,5-3,5 kg da semgrajnoj.



KAROTO „Danwes-126". Oranĝkolora

Eksporto – importo

Eĉ se evoluas bone la produktado de semgrajnoj – en kia ajn lando – kaj la agrokulturaj cirkonstancoj ankaŭ estas eminentaj, ĝi povas iĝi stagnanta, se oni restas nur „hejme" kaj ne utiligas alies spertojn. Tia izoliĝo kaj postresto tute ne minacas la Entreprenon Semgrajno. Kaj enlande, kaj en la mondo pli kaj pli vastiĝas kaj abundiĝas ĝiaj rilatoj por kunlaboro kaj negoco.

Montriĝis pro la spertoj tre utila formo de negoca kunlaborado la celproduktigo. Ties esenca enhavo ebligas al firmaoj, kiuj sukcesis selekti eminentan semgrajnon, ke ili ĝin plimultigas inter la favoraj cirkonstancoj de Hungario. La tutan rikolton fine ili devige transprenas, ricevas.

Oni faras jaran kontrakton tiucele, interkonsentante pri la specio, la areo de la plimultigo, pri la ceteraj preskriboj, kiel prezoj, kvalitoj kaj liverkondiĉoj.

Pro la favoraj konsekvencoj, tiu kunlaboro kutime ampleksiĝas pli vaste, ĉar ambaŭ flankoj akiras plurajn avantaĝojn. Nome, ili ekkonas deproksime la „fremdajn" speciojn (variantojn), ties kulturadon, kaj komparas ĉiun ĉi kun la propraj specioj kaj metodoj. Ke tiel kvazaŭ trudiĝas ambaŭflanke plibonigi la laboron, ĉu esploran, ĉu produktan, tio klaras per si mem.

Fakuloj de la kontraktintaj firmaoj dum vizitoj spertis la avantaĝojn de la Hungarlanda kultivado de semgrajnoj, la metodojn kaj rezultojn de ties plimultigo, purigado kaj komercado. Superflue skribi, ke oni konvinkiĝis pri la monda nivelo de la hungara produktado de semgrajnoj, ties plej modernaj manieroj en la grandbienoj – kulturantaj averaĝe 5600 hektarojn –, en la bienetoj de la kampuloj kaj sur la areoj de la esplorinstitutoj. Ilia fidindeco kaj precizeco estas tiu de la bona partnero.

Estu menciinde, ke la entrepreno eksportas al 28 landoj.

Dum 20 jaroj iĝis kvarobla la eksporto de semgrajnoj kaj de aliaj varoj. Tiuj jam superas 143 mil tunojn.

Inter la gravaj komercaj partneroj troviĝas firmaoj el Nederlando, Federacia Respubliko Germanio, Danlando, Grand-Britio, Svedlando, Italio, Francio kaj Aŭstrio, krome firmaoj el pluraj socialismaj landoj. Ekiĝis daŭraj kontaktoj kun evolulandoj pere de liveradoj de semgrajnoj kaj pere de kompleksaj establaĵoj.

Ĉi-lastajn entreprenas nia „Sem-investo" eksportsekcio (Seed Invest), kiu laŭ mendo instalas eksterlande tutan sistemon de semgrajnojn produktantaj esplorejo, kultivejo kaj prilabora uzino. Ĉiuj ĉi estas transdonataj al la mendanto tutprete, tuj utiligeble – kune kun la samtempe fake edukita personaro.

Nova negoca formo inaŭguriĝis koncerne la internacian kunlaboron: la kontraktoj ofte jam alcelas trian merkaton por komuna vendado de semgrajnoj. Laŭ la prezentiĝantaj bezonoj, la tiaspeca komuna negoco plivastiĝas ankaŭ per delegado de plej kompetentaj ekspertoj kaj praktikospertaj fakuloj. En akordo kun la deziroj de la mondorganizaĵoj, per tiuj manieroj la solvo de la komence menciita ega problemo pri nutraĵoj ricevas ne neglekteblan subtenon.

H-1400 Budapest, Pf. 85.
VII. Rottenbiller u. 33.
Telefono: (1) 210–110
Telekso: 22–4864

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

NI LEGIS...

De tempo al tempo venas antaŭ nian publikon pli kaj pli da novaj eldonaĵoj. La belliteraturo (originala kaj tradukita) lasas jam pli da loko, kvankam ankoraŭ ne sufiĉan al la fakaj-sciencaj verkoj: tiujn oni devas konsideri tre gravaj el movada vidpunkto; laŭ mia opinio ili utilas eĉ pli, ol beletraĵoj de malalta nivelo. Rigardante ofte belaspektajn librojn, ni devas esti ankaŭ modestokulaj, kiam la valorojn vestas simplega eksteraĵo, kajera formato kaj multobligita teksto. Oni bone scias, ke la atendebla legantaro estos tre minoritata. Mi vere bedaŭros, se pro ĝia fakeco ne multaj legos la ekstere tre modestan, sed informriĉan *kolekton de prelegoj* el la Slovakia urbo Nitra. Mi volonte rekomendas por *zorgemaj* tradukantoj tre atenti la konsilojn de *Magda Šaturová:* la traduko devas interligi du – diversajn – literaturajn kulturojn, kaj tio postulas kreivan – ne mekanikan – interpretadon. Plej interesveka mi trovis la komparadon de la lingvoj Eo kaj slovaka (de *Eduard Gašinec*), tiun pioniran analizadon laŭ la fonetikaj kaj gramatikaj similecoj, resp. interrilatoj. Fekunda vojo lingvistike – probable utila ankaŭ pri aliaj slavaj lingvoj –, sed la vera graveco montras al la E-instruado en la bazlernejoj, kies plifaciligon celis unuavice la aŭtoro.

El Gotenburgo la geaŭtoroj Inge kaj Osa, kun subteno de la Sveda Poŝto (!) vere alloge konsilas:

Kor(r)espondu Esperante

kaj donas modelajn letertekstojn, aŭtentikajn kaj vivplenajn. Estas ĝuo foliumi tiun plaĉan libron, ankaŭ pro la multaj ilustraĵoj, ricevi kvazaŭ enciklopedie enkondukon en multajn angulojn de la ampleksa kaj disbranĉiĝinta E-movado, al la internaciaj korespondebloj. Ekde libron mendanta letero ĝis letervesperoj, aliĝoj al pac-alvoko aŭ al fakaj asocioj, ĉiuj specimenoj prezentas klaran kaj senriproĉan Esperanton. Same la abundaj listoj de uzeblaj esprimoj, ĝentilaĵoj kaj la amikaj admonoj pri internacieca konduto. Kvankam tiu ĉi korespond-gvidilo – laŭ mia scio *la plej elstara* ĝis nun – estis destinita por svedlingvanoj, oni povas bone uzi ĝin ankaŭ sen scio de la sveda. La eminente redaktitan libron indas *transplanti* en aliajn lingvojn: ĝi vigligos kaj aktivigos kaj junulojn, kaj ne-junulojn.

Ĉar tio estas ne kutima nuntempe, des pli salutinda mi opinias la iniciaton de Franca Esperantisto, la apartajn literaturajn numerojn kun prozaĵoj de elstaraj verkistoj: *Molière, Mérimée, Maurois, Cocteau* (pron. Moroa, Kokto), krom aliaj. Tiujn miavide legis lastatempe en tiu ĉi serio „eldonota antologieto" de la franca literaturo. La tradukintoj, i.a. *Roger Bernard* kaj *Hervé Gonin,* sukcese prezentis fluan kaj stilkonservan tradukon, ĝenerale arte eksplikante la (jam) klasikajn direndojn. Mi ne asertas, ke oni ekspluatis ĉiujn esprimeblojn de nia lingvo. La vorta riĉeco de la originalo ekzemple fojfoje ŝovis la tradukintojn al troa precizemo, kiu bremsis la elanon de dialogoj, kaj la pacienca detaligo sinkis en malpli ĝueblan „fidelecon". Sed tio – kaj bonvolu ne miskompreni min – estas nur negrava averteto.

Dum legado ne lasis sin flankenmeti libreto de la Nederlanda E-Asocio pri temo, bedaŭrinde daŭre premeganta la mondon:

Malarmado – komplika proceso

La fortoj agantaj sur tiu tereno estis tiel realisme en tutmonda rilato traktataj de eksa altranga oficiro, ke mi legis tuj ĝisfine lian tre kompetentan prezentadon. La sekureco devas ne baziĝi sur *minaco de amasneniigo* – deduktas la aŭtoro, kaj instigas ĉiun anon de la homaro kontribui al la interkompreniĝo, por eviti la plej teruran pereon. Dankinda ago estis ĝia tradukado kaj eldono fare de NEA, inde je plia disvastigo.

Proksimiĝante al la centjara jubileo, oni renkontos verŝajne pli ofte *dulingvajn E-librojn,* kiuj ankaŭ nacilingve prezentas E-literaturon al la ekstera publiko. La svisa poeto *Dante Bertolini* elektis „poeziajn florojn" el nia poezio por sia (efektive) verda libro:

El la nova ĝardeno

kaj li italigis 25 poemojn de dek aŭtoroj, de *Zamenhof* ĝis *Baldur Ragnarsson.* La paralelaj tekstoj celas pruvi al la itale legantoj la artan nivelon de la Ea poezio; tial Bertolini klopodis laŭeble formfidele speguli la originalon. Rimoj sonoraj, frapaj ritmoj, ofte kun kapklina obeemo rekreitaj, atestas pri lia lerteco, kies artaj efikoj eble plej klare reliefiĝas ĉe la melankolia Siberia lulkanto de *Julio Baghy.*

Ankaŭ tradukaĵo, sed humura prozo venis el Litovio, kolekto de dolĉ-amaraj satiraĵoj de verkistino. Kun delikata humuro ŝi protestas pro kontraŭdiroj interhomaj, malpaciencas kun espero, kaj groteske ridindigas neniofarantojn kaj ĉarlatanajn perbuŝe paradantojn en la kelkpaĝaj humuraĵoj de la libreto

Sekreto de senmorteco.

Precipe plaĉis la virinaj temoj, kie feliĉe mankis la ofte tedaj ŝablonoj de ni, virhumuristoj, pri la malforta sekso. Male, *Žilinskaité* serioze mokas pri la ina situacio per ne-rezignema virina elrigardo. La tradukintoj el Klaipéda atakinte tiun ĝenron ne surprenis facilan taskon, ĝenerale tamen ĝin venkis, kaj tio laŭdas ilin.

Ervin *Fenyvesi*

Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. Prelegoj. Eld. Slovakia E-Asocio, Poprad, 1983. Multobligita. 60 p.

Kor(r)espondu Esperante. Redaktis Inga Johansson kaj Osa Sahlquist. Eld. Sveda Poŝto, Stockholm, 1985. Dulingva, ilustrita, kun kolora kovrilo. 128 p.

Speciala Literatura Numero – serio: Prosper Mèrimée: Lokis (40 p.); Moliére: La nobela burĝo (68 p.); Jean Cocteau: La homa voĉo (32 p.); André Maurois: Noveloj (68 p.). Eld. Franca Esperantisto, Paris. Prezo por 3 numeroj: 50 Frankoj.

M.H. Von Meyenfeldt: Malarmado, komplika proceso. Eld. Nederlanda E-Asocio, Hago, 1983. Multobligita. 24 p.

Dante Bertolini: El la nova ĝardeno. Dua eldono. Edizioni Pedrazzini, Locarno, 1985. Dulingva, bindita. 108 p. Prezo: 9500 Liroj.

Vytauté Žilinskaité: Sekreto de senmorteco. Tradukis kaj eld. Klaipéda E-Klubo, 1978. Ilustrita. 154 p.

Lirika etoso per vortaj juveloj

Julian Modest: La ora Pozidono. Romaneto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 68 p. 21 cm. Prezo: 8,10 ned.gld.

En la apudmaran restadejon alvenas junulo kaj pasigas tie du semajnojn. La tagoj, kiujn li volis uzi por ripozo, estos la tagoj dum kiuj li travivos la unuan amon. En tiu enamiĝinta stato li fordonas la tutan bonecon de sia koro, li prezentas al ni la tutan fortecon de sia amo. Jen, tia estas la delektinda tempo de plena optimismo, kiam oni ŝvebas super ĉio ekzistanta. Ja, tiun ĉi staton tiel bele ankaŭ viroj kapablas priskribi!

Sed ne estas tie ĉi la enhavo kiu kaptis mian tutan atenton. Modest manipulas sian tekston en admirinda maniero. Ia lirika etoso kiu regas en lia interno estas sentebla ĉie ĉirkaŭe. La intimaĵojn de sia propra koro li vestas per vortaj juveloj, ĉar li estas verkisto kiu scias komponi ravajn melodiojn.

„La ruĝa bankostumo bone kontrastis al ŝia cinamkolora haŭto. Ŝia harmonia korpo estis forta kaj elasta kiel korpo de pantero. La tuta figuro de Klara; ŝia beduena vizaĝo, la delikata, sed iome agla nazo, la graciaj movoj eligis ian enigman ĉarmon kaj allogon, sed eble plej allogis ŝiaj okuloj; nigraj, migdalformaj, ili similis al du malhelaj putoj pri kiuj oni malfacile povis diri kiom profundaj ili estas.' (p. 19).

Kaj, jen, kiel bele li priskribas la belecon de la naturo:

„Dekstre brilis la ora sablo de la strando, videblis dunoj kaj boskoj, el kiuj gvatis koketaj hoteloj." (p. 13.) „Febla vento karesis la maron. Norde de la urbo videblis nigraj rokoj, sur kiuj, simile al mevoj, sidis kalkitaj dometoj. Ĉe la piedoj de la roko plaŭdis la ondoj, kaj la domoj kvazaŭ pendis en la aero." (p. 14).

Mi varme rekomendas ĉi verkon de nia juna talenta prozisto.

Zora *Heide*

recenzoj recenzoj

Sojle de pereo

Zsigmond Móricz: Varmega kamparo. Romano. El la hungara tradukis István Nagy. Lingve reviziis William Auld. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984. 169 p. 20 cm. Prezo: 18,- ned. gld.

Beletra verko prezentas ne nur artan ĝuon. Ĝi povas ankaŭ helpi pli bone kompreni individuan aŭ ĝenerale socian fenomenon, certan eventon aŭ tutan epokon ktp. Tion ĝi faras, se ĝi transdonas ion esencan pri sia objekto kaj ĉe tio ĝi povas esti pli sukcesa ol plej kompetenta kaj detala scienca studo. Zsigmond Móricz, hungara reprezentanto de kritika realismo, ŝajnas eminenta en tiu rilato.

La romano „Varmega kampo" de Móricz konatigas la leganton kun intermilita hungara meznobelaro. Temas pri popoltavolo plene degenerinta, sen espero pri futuro, homoj tute vanaj. Kiel la ŝvitige varmega somervetero preskaŭ sufokas la homojn de la romano, same tiel sufokiĝas spirite tiu klaso. „Inerte, stulte, ŝvite, rigidiĝe oni rigardas antaŭ sin, ne atribuante al la plej gravaj aferoj grandan signifon, kaj ĝuste pro tio, ĉio aŭ fariĝas tragedio aŭ eĉ mem la plej sankta tragedio dronas en teda enuo."

Tiun ĉi verkon Móricz realigis en la formo de krimromano. Okazas murdo. Aŭ ĉu ĝi estis memmortigo? Kial la ĉefpolicestro nepre devas prezenti ĝin kiel memmortigon? Se fakte okazis murdo, kiu ĝin faris? Enestas ĉiuj ingrediencoj, ankaŭ zigzagoj de amo kaj ĵaluzo, por tre kompleksa detektivaĵo, sed mi preferas ne malkaŝi pli multe el la intrigo.

Tamen, se en detektivromano onian ĉefan intereson vekas la krimo kaj kiu ĝin faris, en Varmega kamparo tio ĉi estas duaranga, alie ĝi ne estus tia verko, kian mi komence aludis. Fábján, kiu suspektas murdon kaj serĉas ties farinton, ekkomprenas meze de siaj meditoj, ke „lia spurado fakte ne estas la malkaŝo de nekaŝebla pafilpafo... sed la senmaskigo de la agonio de tuta socia tavolo". En tiu senmaskigo Móricz brile sukcesas.

Georgi Mihalkov konstatas en sia postparolo, ke la stilo de Móricz „proksimas al la stilo de ordinara parola lingvo". Tial mi emas pensi, ke tion ĉi oni pli bone sentus kaj la traduko de d-ro István Nagy ankoraŭ pli gajnus, se multloke li preferus formojn pli koncizajn. Tiel ekz. la participoj en „la sekvanta tago", „sufokanta varmo" kaj „senfortiganta vaporaĵo" fariĝus resp. „sekva", „sufoka" kaj „senfortiga". Same ekz. „kvazaŭ pli frue li ne estus havinta aferojn" cedus al „...li ne havus...". Ĝene impresas ankaŭ la ripetoj en „lia hararo estis tondita per tondilo" anstataŭ „tranĉita per tondilo" aŭ simple „tondita", same „la atesto pri la morto de la mortinto" anst. „la mortatesto (de la forpasinto)" k.a. Eraraj estas i.a. „ili igas la ringon porti de virinoj" anst. „ili igas virinojn porti la ringon" kaj „multajn mil kaj mil arpentojn" anst. „milojn kaj milojn da..." aŭ „multajn milojn da...".

Osmo *Buller*

Vangofrapo ĉiutage

Károly Aszlányi: Sep vangofrapoj. Romano. El la hungara tradukis László Somlai. Dua eldono. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984. 148 p. 20 cm. Prezo: 15,- ned. gld.

Inĝeniero Tenson MacPhab estas senlabora jam de pli ol unu jaro. Lia situacio fariĝis jam ege minaca, ĉar se li ne baldaŭ pagos la ŝuldon de sep pundoj, li perdos sian loĝejon. Sed oni vivas en ekonomia marasmo kaj ĝenerala senlaboreco. Do, Tenson decidas iri rekte al Astor Terbanks, potenca ŝtalreĝo, por peti dungiĝon. Lia peto estas tamen krude malakceptita.

Tenson, kiu „finis la mondmiliton kun bonegaj rezultoj", ĝisoste ofendiĝas kaj decidas venĝi sin. Per gazetanonco li sciigas, ke sinjoron Terbanks „dum unu semajno komence de morgaŭ mi vangofrapos unu fojon ĉiutage antaŭ atestantoj. En tio povos min malhelpi nek ĉiela nek tera potenco."

Ĉio ekfebras. Ĉu Tenson MacPhab sukcesos efektivigi la minacon ĝis la lasta vangofrapo? Vetado estas organizata kaj la sumoj plialtiĝas post ĉiu sukceso de Tenson. Terbanks randas freneziĝon. Ekrolas Maisie, lia filino,

recenzoj recenzoj

por savi la honoron de sia patro La tuta polica aparato estas alarmita. Ĵurnalisto Wennington-Laskett, fripono, kiu asertas abomeni la agadon de Tenson, vekas ĵaluzon de rivalaj gazetoj, ĉar ĉiun vangofrapon li raportas la unua. Per mirigaj spirito kaj ruzo Tenson triumfas de frapo al frapo. Sed kio okazas pri la sepa?

Tiu ĉi vere amuza verko aperis en 1936 kaj fariĝis la plej granda sukceso de Károly Aszlányi. Ĝi estis ankaŭ filmigita. László Somlai tradukis ĝin esperanten. La traduko estas tre klara, tiel ke mi volonte rekomendas la libron tute aparte al tiuj, kiuj ankoraŭ ne havas multan legosperton.

HEA represis la unuan eldonon de 1943 tiel fidele, ke eĉ la librofina katalogo de la tiama eldonejo estas kunprenita. Tiun superfluaĵon ĉiu kolektanto povas nur saluti.

Osmo *Buller*

Pri malgranda lingvo

La retoromanĉa. Sorto de la plej malgranda nacia lingvo de Svislando. Studo de Arthur Baur. Eldonis: „Hans Dubois" Bellinzona (Svislando), 1984. 59 p. 30 cm.

La retoromanĉa estas lingvo de malgranda homgrupo, vivanta en Svislando. En la jaro 1980 loĝis en tiu lando 51 128 retoromanĉoj, 0,8 procentoj el la tuta loĝantaro.

Oni povas demandi, kial estas interesa studo pri tiu malgranda etna lingvo por esperantistoj? Ĉar per tiu studo oni povas sekvi la elformiĝon, la evoluon, kaj la reduktiĝon de iu etna lingvo pro diversaj eksteraj kaj internaj kialoj, kaj per tio oni povas fari ankaŭ ĝeneralajn konkludojn.

La prauloj de la retoromanĉoj, la retianoj iam vivis sur la teritorio de Svislando kaj Norda Italio; de Gotthardo ĝis Adriatiko. Pri ili, pri ilia lingvo oni scias tre malmulte, la nuna lingvo konservis nur kelkajn vortojn el la originala lingvo. Tiun teritorion konkeris la Romia Imperio en la jaro 15 a.K. La transpreno de la latina lingvo estis simila en ĉiu konkerita teritorio. Kun la Romiaj soldatoj venis komercistoj, oficistoj, juĝistoj, estis necese interkompreniĝi kun ili. La Romianoj ne subpremis la kulturon de la konkeritaj popoloj, kaj ne trudis al ili sian lingvon. Sed ĉar ili havis pli altan nivelon de la civilizo, tio la praloĝantojn instigis transpreni kiom eble plej multe el ĝi. La etimologia origino de la vorto „romanĉa" estas „romanicus"; ĝi signifas „laŭ roma maniero".

La latina lingvo, kiun transprenis la retianoj (kaj aliaj konkeritaj popoloj), ne estis la klasika latina lingvo, sed la ĉiutaga „vulgara latino", inter kiuj ekzistis granda diferenco jam ankaŭ en la klasika tempo. Sed la lingvotranspreno okazis ĉe ĉiu aparta popolo iom alimaniere. Influis ĝin la originala etna lingvo en la prononco kaj en la gramatikaj eraroj. Ĉar en tiu tempo la komunikado okazis ĉefe per parolo, tio helpis la elformiĝon de diversaj dialektoj.

Inter la du brancôj de latinidaj lingvoj la romanĉa apartenas al la okcidenta. (Same kiel la iberiaj kaj franca lingvoj.) La ĉefa diferenco inter la du grupoj estas la formado de la pluralo.

Post kvincent jaroj la alemanoj invadis Helvetion, ilia germana lingvo parte forpuŝis la roman lingvon. En la orienta parto de Svislando, en la plej superaj valoj de Alpoj pluvivis la latina lingvo en retoromanĉa formo.

En la elformiĝo de la nuna lingvo havas la plej grandan influon la germana lingvo. (Pli precize la svisgermana, kiu sufiĉe diferencas de la germana.) La romanĉoj vivis en najbareco kaj amikeco kun germanlingvanoj en ĉefe germanlingva teritorio, do en la rilatoj kun la ekstra mondo ili uzis la germanan lingvon. La influo de la germana lingvo manifestiĝas ne nur en la transpreno de germanaj vortoj, sed en la tuta karaktero de la retoromanĉa lingvo. Nuntempe la romanĉa vortaro en dek-dekkvin procentoj estas germandevena. Sed tiuj vortoj grandparte aliformiĝis romanĉaj vortoj.

La studo estas interesa legaĵo por lingvistoj, por interesiĝantoj pri latinidaj lingvoj. Ili trovas en ĝi la priskribon de la evoluo, de la historio, de la karakterizaĵoj de la retoromanĉa lingvo. Ĝi estas leginda ankaŭ por tiuj, kiuj speciale interesiĝas pri Svislando.

Sed la ĉefa celo de la libro estas veki la interesiĝon tutmonde pri tiu malgranda malmulte konata popolgrupo.

János *Sárközi*

Lupo kaj Urso – trompitaj

Urso invitas Lupon. Bildlibro. Teksto kaj bildo de Mej Jing. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 20,5x18 cm, 35 paĝoj.
Prezo por Hungario: 35,- forintoj.

Kiel ankaŭ en aliaj ĉinaj bildlibroj, ankaŭ en tiu ĉi ĉefrolas la belaj, viglakoloraj desegnaĵoj. La tre koncizaj subskriboj, kiuj akompanas la desegnaĵojn, rakontas pri tio, kiel la ruza Vulpo trompas kaj interkvereligas Lupon kaj Urson.

Lupo kaptis foje du grasajn kokojn, kaj invitas al festeno sian amikon, Urson. Sed Vulpo, kiu deziris mem manĝi la du kokojn, per lertaj artifikoj ŝtelas ilin, kaj per mensogoj interkvereligas, eĉ interbatigas Lupon kaj Urson. Nur post la interbatado tiuj komprenas, ke ili estis trompitaj.

La libreto bone taŭgas por infanoj kaj ĉiuaĝaj komencantoj: la lingvaĵo estas facila kaj korekta.

V. *Benczik*

★★★

Malmultaj homoj konis pli bone la Esperantan literaturon, ol Kalocsay. Jen, en tiu ĉi volumo estas kolektitaj dek prelegoj de la fama majstro. Ili estas profundaj, pompaj – kaj tamen ankaŭ simplaj lingve, ĉar Kalocsay ĉiam parolis klare kaj kompreneble por la publiko. Kontrolu la verecon de tiu ĉi aserto, aĉetante la libron:
K. Kalocsay: Dek prelegoj. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1985. 21 cm. 126 p. Prezo: 13,80 ned.gld.

★★★

Sur la Monto vivas eta komunumo, en paca kvieto, fôr de la monda bruo, laŭ respektinde simplaj moralaj reguloj. Tamen kvar soldatoj, kiuj supreniras la Monton, neniam plu revenas. Ĉu la pacaj montanoj mortigis ilin? Por ekscii tion, mendu la libron:
István Nemere: La Monto. Originala romano. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 166 p. 21 cm. Prezo: 16,50 ned.gld.

GAJA PAĜO



Estu viro

kaj montru nun al via edzino, *kiu* estas la mastro en la hejmo.

– Tro malfrue, amiko, ŝi jam scias!

Helpon! ?

– Kial vi ne kriis por helpo, filino, kiam tiu junulo vandale brakumis vin?

– Ĉar mi ne estas ventro-parolisto!

Korekta civitano

– Dum mia vivo mi feliĉigis sennombrajn virojn – kiam mi forlasis ilin!

Jen la solvo!

– Mi tro ofte devis serĉadi muntiston, estis terure! Sed kial postkuri ilin? Finfine mi edzigis muntiston!

Kaj dum eksedziĝo

– La amikinoj forte rekomendas al mi iun lertegan advokaton tiucele... Sed mi jam trovis por mi tre simpatian inĝenieron...

Serioza vir'

– Hieraŭ mi nur ŝajnigis malbonan humoron, sed hodiaŭ! Hodiaŭ mi havas eĉ kaŭzon esti tia!

Senindulga vir'

– En mia hejmo ordonas mi! Aŭskultu bone, edzino! Ĉio okazos kiel *vi* volas! Komprenite? !

La minac' de Ignac'

– Atentu, atendu nur! – kriis Ignac' trapasante meze de la kureganta aŭto-lavango. – Baldaŭ ankaŭ mi ŝoforos inter vi!

Zoja ĝoja

alridis la edzon: Ĉu vi vidis, karulo, kiel facile mi rekondukis la aŭton el la montrofenestro?

Kurioza vir'

– Mi skribis grandioze ardan kaj pasioplenan amleteron. Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne scias, al kiu virino sendi ĝin.

Ok-azas? Nur kvar!

– Admirinde vi kisis, karega Joĉjo!

– Pardonon Eva, mi estas Laĉjo.

– Sed mi nomiĝas ja Marta!

Am-bulanco

Marta (la sama!) iris plendi al la ambulanco.

– Kio ajn estas okazanta al mi, post kvin minutoj mi ĉion forgesas.

– Grandioze! – kriis la kuracisto. – Bonvolu tuj senvestiĝi kaj kuŝi sur la divanon.

Hej, hej...

Amikinoj interparolas pri la edzaj pasioj, kaj aŭdeblas la sekvaj:

– Nu, mia edzo ege ŝatas la sporton. Li estas hejme en la atletiko, en la skermado, en la pafado... Nur en nia hejmo li neniam estas hejme!

Ardaj ĝemoj

– La unua amo, ho! ĝi estas la plej bela en la mondo! – ĝemas knabo el profunda koro.

– Jes, jes – konsentas knabino – vi pravas. Tamen ankaŭ kun vi estas agrable...

Pri gustoj ne...

– Ĉu plaĉas, diru, mia nova ĉapelo? – demandis edzino.

– Nu jes, vere ĝi plaĉas al mi, karinjo – diris la edzo.

– Nu, tiam mi ne portos ĝin. Via gusto estas ja tro malbona!

Kelnerajo

– Kelnero! ĉu vi povas rekomendi al mi ian leĝeran manĝaĵon?

– Kompreneble, sinjoro. Mi rekomendas nian ducent graman stekon, ĝi pezas nur cent gramojn.

Majstraĵo

– Ho, knabo! – kriis la elektristo al la metilernanto. – Ektuŝu la dekstran kondukilon! Ĉu vi sentas ion?

– Nenion, majstro.

– Brave, tiam ne tuŝu la alian! Ĝi enhavas kurenton de trimil voltoj!

Ervin Fenyvesi



Mia kredo

En la ĉefaj linioj de nia enigmo (H.2. kaj V.28.) ni citas la du lastajn versojn el samtitola poemo de Marjorie Boulton (ensendendaj linioj). Inter la solvantoj ni lotumos premiojn. *Limdato:* du monatoj post la apero.

Horizontale: **15.** Kialo; **16.** Entomologia Rondo Esperanta; **17.** Komencis paŝi; **18.** Parenco de ĉevalo; **19.** Ĉion ampleksanta; **20.** Rigarde al...; **21.** Nenormala malgrandegulo; **22.** Ilo por balanceti infanon; **23.** Tagdeko (R); **24.** Femalo; **25.** Kartludo farata per specialaj kartoj; **26.** Subtera ĉambro; **27.** Tiel nomata; **28.** SĜ; **29.** Veturado sur maro; **30.** Korta birdo; **31.** Iom da greno (!); **32.** Pentrita sceneja dekoraciaĵo; **33.** Formi kaj kunligi ideojn (R); **34.** Kolor'; **35.** Saltanta insekto (R); **36.** Rando de ŝtofo (R); **37.** Fari linion per krajono; **38.** Kore ŝatos; **39.** Pezo de pakaĵo; **40.** Speco de poezio; **41.** Nuanco de la voĉo (R); **42.** Ago sciigi ion perbuŝe; **43.** Baldaŭ ruinigonta, malfortika; **44.** Dumil (Romiaj ciferoj); **45.** RJ; **46.** Ago havi en la manoj; **47.** La sidrimeno sur rajdbesto (kun artikolo); **48.** Porflegada kotono (R); **49.** Distanco inter vojaĝpunktoj; **51.** Mamulo kun mallonga rostro en Suda Azio; **52.** Ne piede; **53.** Azia formo de bovo kun grasĝibo (R); **54.** Senti fizikan doloron; **55.** Masiva, firma (R); **56.** Publika parolanto (R); **57.** Valormetalo; **58.** Perfidulino de Ŝimŝono.

Vertikale: **1.** Elradii nevideble; **2.** Romboforma objekt'; **3.** Eŭropa ĉefurbo; **4.** Alkoholaĵo; **5.** Kapablo – kiel sufikso (ankaŭ virnomo); **6.** Reen: kovaĵo de birdoj (R); **7.** Specialisto de religiaj aferoj; **8.** Pikanta vegetaĵo; **9.** Tio, kio efektive ekzistas; **10.** Eta rabobesto; **11.** Komence; **12.** Grado de alteco; **13.** Faro de ŝtrumpo; **14.** Opero de Verdi; **19.** Grupo da fremdaj vizitantoj; **22.** Purigistino por vestaĵoj; **23.** Apartenanto al malprogresema partio; **25.** Deklivo ĉe fosaĵo (R); **26.** Mense atente ekzameni; **27.** Artifiko ekz. ĉe filmado; **29.** Malantaŭan kolo-parton; **30.** R. de H.26.; **31.** Tia estas V.3.; **32.** Interpunkciaj signoj; **33.** Prepozicio; **34.** Argilaĵo por konstruado; **36.** Kiel H.57.; **40.** Aromigita sukersolvaĵ' (kun artikolo); **42.** Delegi en parlamenton; **43.** Agi kiel korsaroj; **44.** Rilata al Filipina ĉefurbo; **46.** Fumaĵ'; **47.** Vulkanan elfluaĵon; **48.** Ankoraŭ valoranta (R); **50.** Unu el la kvar antikvaj elementoj; **51.** Movi ĉirkaŭ akso (R); **52.** Digo en havenoj (R); **54.** Iama franca monero (sou); **55.** Numeralo; **58.** Konjunkcio.

I. Z.

Solvoj de la krucenigmo en la **n-ro 1985/4:**

Sur marplata region' Ebena
estas mia mondo, hejmpejzaĝo,
ĝin vidante, la animo estas
aglo eskapinte el la kaĝo.

(*Petőfi – Kalocsay*)

Premion gajnis per lotumado: Jerzy *Dembicki,* Nowy Sacz, PL; Vladimir *Kononjuk,* Kiev, SU kaj Helena *Štruncovà,* Prago, CS.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Sep vangofrapoj

de Károly Aszlányi

La gaja romano „Sep vangofrapoj" apartenas al la amuza literaturo. Per ĝi la aŭtoro Károly Aszlányi celis nur amuzi la legantojn, kaj la leganto konstatas, ke li sperte kaj talente faris tion.

1. Kiu estis la sola parenco de Astor Terbanks?
2. Kiuj estis la nomoj de la ĵurnaloj, kiuj aperigis la informon de William Tenson MacPhab?
3. Kio estis la profesio de Paterson?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1985/4:

1. La edzo de Anna nomiĝas Jozefo Danai.
2. Geedzoj Danai vojaĝis al Italio.
3. La amanto de Anna estas verkisto.

(István Nemere: FEBRO).

Premion gajnis per lotumado: S-ino *Bosnyák* Mihályné, Egerág, H kaj s-ro Boris *Glozman,* Zaporojje, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:
En la n-ro 1986/1: Varmega kamparo de Zs. Móricz,
en la n-ro 1986/2: La Damo de l' Fatalo de L. Tabi.

Leterkesto

Leipnik Noemi, Bucuresti, R: Kontente ni legas, ke laŭ niaj konsiloj vi sukcesis kontakti la E-asocion de la handikapitoj, kaj tiamaniere malfermiĝis nova horizonto. Ni volonte atendos pluajn informojn pri la aliĝontaj samsortanoj, kiuj same malkovros la plezurojn, kiujn la IL pretas prezenti al ili. Ilia asocio certe akceptos viajn poemojn, kompreneble E-lingve, kiujn vi aŭ viaj proksimuloj tradukos el la gepatra lingvo. Niajn salutojn al vi!

D-ro Jozefo *Kondor,* Neuwied, FRG: Vi certe jam rimarkis la 5-minutan E-programon ĉiudimanĉe de la Hungara Radio, kiun vi de longaj tempoj atendis. Se multe plezurigis vin la Budapeŝtaj sonraportoj de Radio Polonia, ankaŭ la informoj de ĝia redaktoro, *Andrzej Pettyn,* pri H.V., resp. la laŭtlegitaj fragmentoj el – Gaja Paĝo k.a. – vi certe esprimis tion ankaŭ al la pola radio. Neniu devas forgesi, kiom gravas la salut-konfirmoj pri la E-programoj al la stabiligo de nia lingva pozicio ĉe la radiostacioj: tial ni forte instigas niajn legantojn fari tion. Vi daŭre brave agas tiel!

Klaus-Dieter *Dungert,* Magdeburg, GRD: Nia fidela leganto lanĉis la ideon al nia redakcio, meti de tempo al tempo ŝak-rubrikon en H.V. Estas ne tuj videble, ĉu duonjare unu-du publikigoj kapablus doni vere ion interesan al ŝakistoj. Ĉu ion alian ol kion la nacilingvaj gazetoj publikigas ofte ĉiusemajne? Tion ni ne scias ankoraŭ. Sed ni esploros vian proponon por konsideri, kio estos farebla en tiu rilato.

Nica Olga, Oradea, R: Pro la informoj en iu letero, *ni nur suspektas,* ke ĝin ni ricevis de vi. Probable. Eble. Ĉar nek via nomo, nek la adreso troviĝis en tiu ĉi letero. Vane ni serĉis eventualan *daton,* kiu malkaŝus almenaŭ vian urbon. Kion vi petis, ni volis jam ekspedi... sed kien? Eble sur la *koverto* estis via adreso, sed kiel konate, kovertoj kutimas foriĝi, ja gravas *sole* la teksto! La redakcio petas do ĉiun: ne forgesu sian adreson *enskribi!*

Jan *Kafka,* Klášterec n.O. CS: Ne nur vin, sed ankaŭ nin vere kontentigis la fina solvo de viaj zorge kolektitaj kaj jam binditaj volumoj da E-revuoj. Sistema kolektado neniam estis tre facila afero! Pro tio ni devas respekti viajn penojn por la necesa kompletigo de la revuoj, kiuj havos jam sufiĉe da loko en la bonŝance akirita nova loĝejo. Akompanu ĝin bona sorto!

Jefim *Zajdman,* Jalta, SU: La kantoj de József Dinnyés kaj lia agado (en n-ro 1985/5) vekis pli da intereso inter niaj legantoj ol nia redakcio supozis. Kun aliaj, ankaŭ vian leteron ni transdonis al li, kiu laste grandsukcese prezentis E-kantojn dum la Jubileaj Tagoj de HEA. Dum la eksterordinaraj E-lecionoj en lernejoj – pri kiu vi demandis – Dinnyés intencas konigi al la E-on lernantaj etuloj la plej belajn E-poemojn. Do temas pri nekutima lerneja literatura „leciono" kaj certe kun emociplena eduka efiko.



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXVa jaro, 1985 n-ro 6
(124)

ENHAVO

János Kádár salutis Hungaran Vivon 201
Eŭropa Kultura Forumo 202
Köpeczi, Béla: La hungara kulturo en eksterlando (*V. Benczik*) 204
Sekelj, Tibor: UNESKO rekomendas Esperanton 206
Gergely, Mihály: La pentroarto de Eŭropo en Budapeŝto 208
Benczik, Vilmos: Librooferto por 1986 210
Juhász, Ferenc: La Unua Henego de Apokalipso (*I. Szabó*) 211
Rados, Péter András: Ne-katolikaj preĝejoj en Budapeŝto 212
Jubileaj tagoj de Hungara Esperanto-Asocio 213
Chiti-Batteli, Andrea: Por internacia peranta lingvo 215
Deme, László: En la aferoj de la internacia peranta lingvo (*I. Szabó*) 216
Seifert, Jaroslav: Kanto Novjara (*J. Kořinek*) 217
Szabó, Imre: Romanco 217
Földeák, János: Trompantoj (*I. Nagy*) 218
Panoramo 220
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 223
Nemere, Istvân: La trezoro 6. 224
Bálint, Szilárd: La kuracisto kaj la virino 227
Szőnyei, Tamás: De internacieco al nacieco kaj reen 228
Malgranda lando en avangardo (*Ervin Fenyvesi*) 230
Fenyvesi, Ervin: Ni legis... 235
Recenzoj 236
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 238
Krucenigmo 239
Mihalkov, Georgi: Ekzameno sen risko 239
Leterkesto 240

Sur la frontpaĝo: pravoslava preĝejo en Budapeŝto (Foto de Z. *Fejér*)

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik. * Arta redaktoro: András Kucsera. * Redakta komitato: Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Varga-Haszonits Zsuzsa. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. * Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonisto: Tibor Vaskó. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas ĉe ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Hungara Poŝto (K.H.I. 215-96-262. 1900 Budapest József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 96,- Ft, al eksterlando por unu jaro 114,- forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest
Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704

VIA DOMMASTRO EN BUDAPEŜTO:
BUDAPEST TOURIST

La vojaĝoficejo de l'ĉefurbo

Uzu niajn servojn

- organizado de grupoj vojaĝoj
- organizado kaj aranĝado de kongresaj vojaĝoj
- organizado de vojaĝoj
- entreprenoj kaj premiaj vojaĝoj
- interpretistaj servoj
- servo de privataj ĉambroj

IDEGEN-FORGALOM

Turisma
Propaganda kaj
Eldona
Entrepreno

Magyar Konyha

UTAZÁSI MAGAZIN

Túrázás · Szórakozás · Üdülés

NIMRÓD

jó utat

autós magazin

Autósélet

A MAGYAR AUTÓKLUB LAPJA

NR NIMRÓD rejtvényújság

Magyar Hírek

1986 FEB 24